Ĉu vi kuiras ĉine?

Johan Valano

Ĉu vi kuiras ĉine?

Detektivromano originale verkita en esperanto

Johán Valano

HTML-eldono kreita laŭ la libroformaj eldonoj:

 Aabyhøj: Dansk Esp. Forlag, 1976. ISBN 87-85020-885.

 Vieno: IEM, 1996. ISBN 3-901752-02-1.

Kembriĝo: Edmundo, 2012-05-04.

1

Polica detektivo Jano Karal ridetis ravareve. Piediri oficejen en la printempa fruo jam estis plaĉa tagkomenco, sed kiam li eniris la ĉambron kaj konstatis, ke jen la suno ĝin oras, li sentis sin ŝvela je ĝojo infana. Kiel reviglige, post plena semajno da pluvo!

La vortoj de Lena en li reeĥis: “Mi ne envias vin!” Tiu nova najbarino, ĵus enloĝiĝinta en la apuda domo estas tute ĉarma, kaj ŝia edzo vere simpatia homo – estus plaĉe ilin denove inviti

– sed tiu kompata vizaĝo tute mistrafis. Eble li tro verve priskribis la malagrablaĵojn: longe atendi subpluve, pridemandadi malbonvolulojn, efektivigi tiun kaj tiun ĉi kaj alian rutinajn taskojn, ktp, sed ĉu ŝi ne estus povinta diveni la alian flankon? Ke mistero defias, kaj estas vera ĝuo ĝin aliri, palpi, penetri por fine elpremi triumfe ĝian solvon?

“Se solvon vi trovas!” ironiis interna voĉeto. Efektive, da sensolvaj misteroj kuŝas pli ol dezirate. Tamen tio ne grumbligu. Eĉ kun ili detektiva vivo spertindas.

Grandparte dank' al Ĝoja, verdire. Komence la kolegoj amike lin mokis, kiam li anoncis, ke li edziĝos al psikologino, sed baldaŭ montriĝis, kian bonegan apogon ŝi donas al li en la vivo, kaj la ironio ĉesis. Senti sin komprenata ja estas unu el la ĉefaj bezonoj de homo, kaj de Ĝoja li ricevis komprenon sen ia manketo. Ke li ne devus ĉion rakonti al ŝi, kiel li faras, tion li scias perfekte. Sed ĉu malobservi regulon povus esti peko, dum ŝia konfidencula rolo fakte dekobligas lian efikecon? Kara Ĝoja! Ŝi ...

“Tintin tintin tintin” – telefono rompis la pensoĉenon.

“Saluton, Jano! Bonvolu veni al mi tuj. Urĝaĵo!”

Estis leŭtenanto Remon, kiu prezentis per si (plu pensis Jano, elirante el sia oficejo) plian faktoron en lia feliĉo: tia afabla, humana, kompetenta ĉefo estis ĉiela beno por la subuloj.

La ĉiela beno bonvenigis Janon per larĝa rideto.

“Sidiĝu!”

“Pri kio t...?”

“Kiel scii?” la leŭtenanto interrompis, akompanante la vortojn per levo de siaj larĝaj ŝultroj.

“Eble sinmortigo, eble akcidento, eble murdo. Vi tuj iru. Fagostrato 25, ĉe s-ino Satej. Viro dudektrijara. La sinjorino lin trovis morta ĉi-matene. Ŝi vokis kuraciston, kiu suspektas ion nenormalan kaj rifuzis subskribi la permeson enterigi. Nekropsio necesos. Mi ne perdu tempon per detaloj. Vi konas la rutinon. La teknikistoj jam iris. Rapidu tien kaj tenu min informata.”

*

Uniforma policisto staris garde antaŭ kvinetaĝa domo. Li tuj rekonis Janon, salutis dirante:

“Unua etaĝo.” Kiam la detektivo sonorigis ĉeporde, malfermis al li polica serĝento.

“S-ino Satej sidas en la salono. Eble vi volas pridemandi ŝin unue?”

Li kapjesis kaj sekvis la serĝenton al la bela, relative vasta ĉambro, iom tro plena je mebloj kaj plantoj, el kiuj unu grimpis ĝis la plafono, de kie pendis dense grapoloj da etaj hele verdaj folioj. Apogseĝe sidis grizharulino, kies vizaĝo esprimis mikson de doloro kaj nekapablo kredi. Ŝi videble ĵus ploris, kaj tenis enmane malsekan poŝtukon.

“S-ino Satej? Jano Karal, el la polico.” Li provis uzi tonon kompreneman kaj kuraĝigan.

Ŝi nur kapjesis, kvazaŭ sonĝe, kaj gestis al simila seĝo, ke li sidu apud ŝi.

“Mi bedaŭras, ke mi devas vin ĝeni, sed estas necese. Eble senpezigos rakonti al mi precize, kio okazis?”

El ŝia delikata eta korpo Jano atendis ĉu murmuron, ĉu ĉirpan birdovoĉon, sed per belsona, harmonriĉa tono ŝi respondis:

“Ne estas multo dirinda. Li kuŝis sur sia lito, kun okuloj malfermitaj. Li aspektis strange, mi ne sciis kial. Mi tuŝis mane lian frunton. Ĝi estis glacia. Nekutima odoro ŝvebis. Mi pensis: jen mi svenos, kaj tuj eliris sur la seĝeton telefonan, dum mi sentis, ke mia koro misbatas. Mi venigis d-ron Falmundon, kaj li ĉion prenis sur sin.”

Ŝiaj lipoj formis duonrideton plenan je malĝoja laco. Unuafoje ŝi rigardis Janon rekte okulparen. Ŝia kapo skizis “ne”-movon, kvankam

al kiu sindemando ŝi tiel respondis, neniu povus taŭge klarigi.

La detektivo respektis ŝian silenton.

“Kiu li estis?” li demandis post mallonga tempo.

“Farbisto-murŝmiristo nomata Paŭlo Jorli. Li luis ĉambron ĉe mi jam kvin aŭ ses monatojn.

Trankvila knabo, pagis akurate. Mi ne multe konis lin, sed lin tre ŝatis.”

“Ĉu vi havigis la manĝojn?”

“Ne. Nur la ĉambron. Sed li povis disponi pri l' kuirejo, kaj ĝenerale vespermanĝis ĉi tie.”

“Kiam vi vidis lin lastfoje viva?”

“Hieraŭ posttagmeze, je la kvina proksimume. Mia filino invitis min. Li staris en la kuirejo, pecetigante viandon, kiun li metis en mi-ne-scias-kiun saŭcon. Mi diris: ‘Vi estos tute sola ĉi-vespere, mi iras al mia filino.’ Li respondis: ‘Bonan plezuron! Morgaŭ mi proponos al vi eksterordinaran manĝon.’ Li ridetis, tute gaja, tiel plena je vivo! Oj!”

Ŝi ne povis reteni la larmojn, kiuj fluis longan minuton, dum kiu ŝi ripete snufis. Kiam ŝi sukcesis regi sin denove, ŝi direktis al li paron da palbluaj okuloj.

“Kion pli?” la riĉa voĉo eksonis, refirmigita.

“Mi ne scias. Mi ĝenos vin refoje, pli poste, ĉar mi certe havos aliajn demandojn. Sed mi unue iru vidi lin. Li kuŝas en sia ĉambro, ĉu ne?”

Kun ektremo, ŝi silente kapjesis.

“Ĉu oni informis la parencojn?”

“Li havis neniun. Plurfoje li diris al mi: ‘mi estas tute sola en la vivo’.”

“Ĉu vizitojn li ricevis?”

“Preskaŭ neniam.”

“Leterojn?”

“Verŝajne iom. Mi ne scias, ĉar li iris mem preni la poŝtaĵojn malsupre,

alportis miajn en la kuirejon.”

“Ĉu vi loĝas sola kun li?”

“Ne. Krom li estas du studentoj, iu afrikano, medicina studento, kaj studento pri fiziko, el Tjazo-Alta.”

“Ĉu ili enestis hieraŭ?”

“Ambaŭ estis for vespere, sed mi ne scias ekzakte, kiam ili foriris. Ili reiris universitaten ĉi-matene, antaŭ ol mi malkovris la kompatindan ...”

Plorsingulto malhelpis finon de la frazo, sed ŝi baldaŭ aldonis, kvazaŭ al si mem:

“Ili sendube ne scias ...”

*

Detektivo Karal iris al la ĉambro. Ene troviĝis polica fotisto, kiu, fulmfarinte lastan foton, diris:

“Mi faris la ĉefaĵojn. Vi diros al mi, ĉu mi revenu, ĉu ne?”

Jano jesis kaj rigardis ĉirkaŭ si. Ne tre granda, sed bela ĉambro, malmulte meblita: librobretaro, skribotablo, unu simpla seĝo, du apogseĝoj. Kaj sofo aranĝebla kiel lito, kia ĝi estis nun, kaj sur kiu kuŝis *li*.

La detektivo ekmiris, samtempe konsciante, ke li jam antaŭformis en si mensan bildon pri la forpasinto: li imagis lin ĉiurilate mezulo. La realo tute diferencis. La kuŝanto ja belis, eĉ

belegis, eksterordinare. La brunaj okuloj portis la sigelon de l' morto, sed la fajneco de l'

trajtoj, la densa nigra hararo, la rekta nazo, nek tro longa nek mallonga, la delikata buŝo, kiu lasis videti perfektan blankegan dentaron, la ankoraŭ perceptebla melankolia esprimo, ĉio disradiis neoftan belecon, kiun la morta rigido ne sukcesis venki.

‘Tro bela’, la detektivo aŭdis sin pensi, tuj konsciante, ke tia takso jam implicas antaŭjuĝon, kvazaŭ la tragika sorto iel ligiĝus al tiu trobeleco; tiun penson li nepre forpuŝu, se li volas ne fuŝi la objektivecon necesan al ĉia ĝusta rezonado.

La junulo kuŝis surdorse. Mezaj estis la vestoj: ordinara pantalono, banala torsotrikaĵo, kovrantaj bele – apenaŭ tro delikate? – proporcian korpon. Dum lia menso registris ĉiujn ĉi detalojn, Jano miris pri stranga odoro, preskaŭ neperceptebla, kiu ŝvebis ĉirkaŭe, sed kiun identigi al li ne prosperis.

Li turnis sin al la libroj. Markso, Lenin, Maŭ Zedong, du papaj enciklikoj, libroj pri Afriko, Azio, sociaj problemoj ... malmultaj romanoj; sed relative larĝa vico da verkoj pri poluado, la venonta jarcento, la antaŭvidebla scienca evoluo ...

Li traserĉis la skribotablon, kun malpreciza espero trovi klarigan leteron de sinmortigonto.

Nenion tian li vidis. Li eliris.

S-ino Satej ekstaris ĉe lia eniro en la salonon. Ŝi lin rigardis kompatige.

“Mi ne povas resti ĉi tie. Ju pli ... ju pli ... des pli mi sentas, ke mi ne elportos. Ĉu mi ...”

“Via filino sendube povas vin akcepti siahejme, ĉu ne?”

“Kompreneble.”

“Do iru al ŝi. Policisto restos ĉi tie. Li klarigos al la du studentoj, kiam ili revenos. Venos aliaj oficistoj por la rutinaĵoj, kaj poste ni forportigos la korpon kaj sigelfermos la pordon de la ĉambro.” (Ŝi ektremis, kiam li gestis tien.) “Ĉu helpos, se mi telefonos al via filino kaj vin kondukos en mia aŭto al ŝi?”

Ŝiaj okuloj plenis je danko, dum ŝi diris la nomon kaj telefonnumeron.

2

Leŭtenanto Remon rigardis atende-atente. Jano prenis el poŝo paperon kaj komencis:

“Mi ĵus ricevis la nekropsian raporton. Stranga afero. La stomako enhavas diversajn legomojn ne tre rekoneblajn, se escepti pecojn de paprikofrukto, kiu digestiĝas pli malrapide, kaj kaĉon ankoraŭ ne tute digestitan, eble el salikokoj, porka viando kaj rizo. ‘Doktoro

tranĉisto’ trovis spurojn de nekonata substanco, al kiu li emas alskribi la morton, sed li mem neniam renkontis ĝin antaŭe, malgraŭ sia longa sperto. Li konsultos ĉefurban toksologon. La stato de la korpo estas la sama, kiel ĉe ... la ĝusta fakvorto estas ĉi-papere, se vi volas, ke mi serĉu ... mi diru simple: korohalto, vi scias: kiam la koro malsanas, kaj oni tro strečas la fortojn, kaj korbatado subite fiaskas mortige.”

“Kion pri lia koro? Ĉu vi havis tempon informiĝi?”

“Bona hazardo helpis. Mi trovis dokumentojn de la kontraŭmalsana asekuro, tie demandis.

Nu, li antaŭ du semajnoj submetiĝis al perioda medicina kontrolo. Li estis perfekte sana. La asekurkompanio donis al mi la adreson de atleta klubo, kies ano li estas. Ili konfirmis: li gajnis plurfoje kurkonkursojn. Ankaŭ tie estas kuracista kontrolo. Neniu kardia malordo povus ekzisti.”

“Ni do atendu la toksologian raporton.”

“Jes, verŝajne kulpas tiu substanco.”

“Je kioma horo li mortis?”

“Provizore metite je noktomezo, kun unuhora erarmarĝeno ambaŭflanke.”

“Ĉu povas esti akcidento?”

“Estas tro frue por diri.”

“Sinmortigo?”

“Ne tre probable. Li elmetis neniun noton, kian lasas multaj sinmortigontoj. Aliflanke, ĉu persono, kiu intencas fini sian vivon,

preparas por la morgaŭo delikatan manĝon kun viandopecoj lasataj dum horoj en iu spica-saŭca miksaĵo?”

Ŝvebis silento, densa per pripensado, tiel koncentrita, verdire, ke impresis, kvazaŭ eblus ĝin palpe percepti. Ĝin rompis Jano.

“Ĉu vi volas vidi la fotojn?”

Ekrigarde, la leŭtenanto mire-admire fajfetis.

“Bela peco!” li komentis. “Ĉu amrilatoj?”

“Poŝtkarto ne lasas dubon pri tio. Ĝi estis sendita enkoverte kaj finiĝas per ‘Mi sopiras senti vian korpon ĉe l' mia, karesi la vian ĝissate. Adore via, Lejla’.”

“Familia nomo? Adreso?”

“Ne. Sed ŝi facile troveblos pere de la aliaj konatoj, espereble.”

“Parencoj?”

“Ne, laŭ la loĝiga sinjorino. Gepatroj mortis, kaj ankaŭ la sola fratino. Laŭ ŝi, eĉ kuzon aŭ

onklinon li ne havis.”

“Kion pri la aliaj konantoj?”

“Mi intencas viziti lian mastron, kaj la diversajn personojn listigitajn en lia adresaro. Ĉi-lasta estas enmetita en poŝa notlibro, kiun mi foliumis. Mi ne trovis en ĝi ion specialan, krom la fakto, ke regule troviĝas mencio de horo sekvata de triangulo. Tio povas esti banalaĵo, eble amrendevuo. Se jes, ĝi signifus almenaŭ du virinojn, ĉar unu el tiuj ‘horo-plus-trianguloj’

aperas je la dato, kiam ‘Lejla’ estis ducent kilometrojn for, elsendanta sian amon poŝtkarte.”

“Tion vi devas esplori. Lia beleco povas agi ĵaluzige. Kion alian?”

“La libroj. Plejparte maldekstra-revolucia literaturo. Tuta kolekto da ‘El Popola Ĉinio’, k.s.”

“Tion vi trovos ĉe multegaj junuloj niatempe!”

“Jes. Sed mi ne povas preterlasi tiun direkton. Ankaŭ ĉe tiaj grupoj

povas naskiĝi terura ĵaluzo, politika, sed ne malpli danĝera ...”

Elirinte, Jano Karal iris rekte al sia oficejo. Ĉio okazinta ĝis nun estis kvazaŭ antaŭparolo.

Nun komenciĝos la vera laboro.

Preterpasante, li donis kelkajn instrukciojn al Izabela, la policeja sekretariino-referencistino, tre kompetenta virino, ĉiam kapabla diri, kiun personon kontakti por ricevi tiun aŭ alian informon, kaj trovi post nuraj minutoj la gazeton, en kiu pritraktiĝis iu esplorinda evento.

Metodema, Jano faris liston de la pridemandotoj. Li aliros ilin sinsekve.

3

S-ino Valdunja lin akceptis tre afable. Verdire, polica detektivo Karal sentis sin favorata de la dioj ankaŭ rilate la regionon, kie li plenumis sian serĉistan funkcion. La sanktavala distrikto –

laŭlonge de l' rivero Tjazo, la ‘Sankta Valo de Tjazo’ – estas fama pro sia milda vivo kaj la natura ĝentileco de sia loĝantaro. Eĉ en relative granda urbo kiel Valĉefa, kie disvolviĝas ĉi tiuj okazaĵoj, regas ĝenerala afableco. Kia kontrasto kun la zono ĉirkaŭ Farobel, kie li antaŭe deĵoris! La farobelanoj estas agresemaj harditoj kaj ilia parolmaniero staras ĉelime de vulgareco, kion Jano tre malŝatis. En Sanktavalo, kontraŭe, oni sentas sin kvazaŭ ĉe elito, tiel dignaj, bonedukitaj, dolĉavortaj aperas la loĝantoj. Des pli plaĉa tio estas, ĉar ili havas neniun senton de supereco, neniun malestimon al la alilokanoj. Ne. Ili dignas nature, kaj se ilia sinteno enhavas ion subtile nobelan, eĉ en la plej humila manlaboristo, tio entenas nenion afektan; aristokrata, ilia konduto restas spontana kaj simpla.

Tion Karal alte taksis. Li naskiĝis en la ĉefurbo, sed, eble pro sia kampara deveno, neniam kutimiĝis al la tiea snobeco. Spertinte la orgojlan ĉefurbon kaj la trivialon de Farobel, li trovis plaĉe valora la ekvilibron de l' sanktavalanoj. Li ŝatis ĝin en Ĝoja, sia edzino; li ŝatis ĝin en Remon, la estro; kaj li tuj sentis, ke li ŝatos ĝin en la bonvenigema edzino de l' mastro-farbisto.

Ne, la edzo ne estas hejme. Li ne finas la laboron fiksahore. Tute malgrandan entreprenon li havas. Entute estas nur du laboristoj, plus li. Unu el ili – eble malsana? – ne venis hodiaŭ.

Espereble nenio serioza okazis, ĉar li ĉiam sciigas, se hazarde li ne povos veni labori, kion li ne faris ĉifoje. Ĉu eble ŝi povas helpi al la oficista moŝto?

Jano hezitis. Ĉu pli bone tuj diri aŭ ĉu lasi ŝin paroli? La unua ebleco estus pli honesta, kaj Karal ne ŝatis trompi konfideman personon. La dua enhavus ion perfidan, ĉar normale, en similaj cirkonstancoj, homo tuj anoncus la kaŭzon de sia vizito. Aliflanke, li estas policano, kaj utilaj informoj eble riceviĝos, se li prokrastos la eldiron. Li do elektis la duan eblecon.

“Ĉu vi bone konis Paŭlon Jorlin?”

“Ke mi bone konas, mi ne rajtus diri,” ŝi respondis kun la plaĉa

frazmuziko de la sanktavalanoj, “sed mi tamen relative ofte babilis kun li.”

“Tamen vi diras, ke vi ne konas lin.”

“Por koni homon, oni devas manĝi kun li kilogramon da salo. Paŭlo fojfoje manĝis ĉe ni, sed ne tiakvante! Des pli, ke ni ne multe salas.” Ŝia rido sonis gaje. “Cetere, li stas sekretema. Li rajtas, ĉu ne? Se li ne volas konfidi, mi respektu lian deziron. Diru al mi! Ĉu vi scias ion prie?”

Janon, kiu pase notis la dialektan formon “sti” anstataŭ “esti”, ĉiam amuzis la regiona vorto

“prie”. Li ofte taŭzetis pri ĝi sian edzinon, certa pri ŝia indigna reago, t.e. rebato, ke ĝi estas tute regule formita kaj tre praktika vorteto, kiun ne uzi estas nur afekta ĉefurba snobaĵo.

“Mi tuj klarigos, sed bonvolu unue diri: kia homo li estas, krom sekretema?”

“Bela, sinjoro, bela! Fajne skulptita vizaĝo. Svelta, rapidmova korpo. Kelkfoje mi timas, ke mi tro ametas lin, kio ne decas al edzohava mi, ĉu?”

“Sed la karaktero?” diris Jano, samtempe pensante, ke la lasta konfeso de s-ino Valdunja ne faciligos lian taskon.

“Kiel diri? Retiriĝema, inklina silenti li estas. Kelkfoje tre gaja, kelkfoje, eble pli ofte, kvazaŭ

perdita en malĝoja revo. Vi scias, okazis katastrofo en lia vivo. Li ne havas familion. Tio ne beligas la vivon. Por diri la veron, mi trovas lin iom mistera. Kiam li elmetas sian malĝojan rideton, onin trafas mikso de kompato kaj deziro koni, kaj samtempe oni sentas, ke neniam oni scios ...”

“Ĉu vi konas liajn amikojn?”

“Tute ne. Mi foje vidis lin hazarde sur la ponto de Pontostrato, tenanta knabinon ĉebrake, sed li neniam parolus pri tiaj intimaĵoj kun mi. Sed kial vi faras al mi tiom da demandoj? Kio okazis? Ĉu li faris ion malbonan?”

Jano petis pardonon, ke li ne tuj diris, kaj nun rakontis kelkavorte pri la morto. S-ino Valdunja iĝis tute pala. Videble ŝi ne atendis similan

novaĵon.

Precize je tiu momento la pordo malfermiĝis. Eniris laborvestita kvindekjarulo, kiu ekhaltis vidante fremdulon, sed tuj prezentis la manon kun afabla rideto, dum la okuloj rigardis demande la detektivon. Nur poste li rimarkis la ŝokitan vizaĝon de sia edzino. Liaj brovoj kuntiriĝis.

“Kio ...?”

“Timoté! Paŭlo ...”

“Io okazis al Paŭlo”, li prononcis malrapide, duon-demande, duon-aserte.

“Jes, sinjoro,” Jano diris per voĉo mallaŭta, “kaj mi ŝatus pridemandi vin, ĉar ...”

“Akcidento?” la murŝmiristo interrompis.

“La afero ne estas klara, s-ro Valdunja. Tial, se vi bonvolos doni al mi kelkajn precizigojn ...”

La mastro sin turnis al la edzino.

“Lasu nin”, li diris, kaj ŝi pantoflis kuirejen.

Jano klarigis, ke li apartenas al la polico, kaj ripetinte la okazaĵon, demandis:

“Ĉu Paŭlo Jorli venis labori hieraŭ?”

“Jes, tute normale. Ni finis laboron je la kvara, kaj mi diris, ke li povas reiri hejmen.”

“Kia li estis?”

“Kiel kutime. Li neniam kantas ŝmirante muron, kaj li ne kantis ĉifoje. Li ne estas tre komunikiĝema, sed ne malpli hieraŭ ol iam ajn.”

“Ĉu la alia laboristo estis kun vi?”

“Ne, li faras laboron aliloke.”

“Vi do rimarkis nenion specialan, ĉu?”

“Nenion.”

“Kia homo estas Paŭlo Jorli?”

“Bona laboristo, kvankam li ne faras ion pli ol li strikte devas. Sed kion li faras, li faras bone.

Mi supozas, ke kun tia vizaĝo, li havas ĉiujn knabinojn, kiujn li volas. Tamen prie mi scias nenion, nur supozo mia. Mi persone trovas lin tro belkapa por impresi vire, sed se kredi la kinon, tiaj uloj allogas.”

“Kion politike?”

“Kiel scii, kun tiuj knaboj? Ilia buŝo flamas pri revolucí,” respondis la mastro, kun la tipa sanktavala kutimo elizii de tempo al tempo substantivon, “sed koncerne posedadon ili estas pli burĝaj ol maljunaj laboristoj. Ili ne suferis, kion suferis ni, jen ilia manko. Por ili, politika ago stas maniero montri sin, konvinki sin pri sia heroeco, kaj ne kio ĝi estas ĉe ni: malfacila rimedo igi la mondon pli justa ...”

Jano mense notis la pronomon “ili”: la diroj de mastro Valdunja verŝajne pli esprimas ideojn pri la junularo ĝenerale ol la veran eston de Paŭlo. Li revenigis al la temo sian kunparolanton:

“Ĉu vi opinias, ke li povis mortigi sin mem?”

“Ej, mi ne konis lian koron. Tamen mi dubas. Li tro ŝatis manĝi. Homo, kiu ŝatas bongustaĵojn, eĉ se lipe revolucia, ne inklinas ĉesigi sian vivon, ĉu? Jen mia opinio. Sed kial vi parolis pri akcidento? Ĉu li falis, aŭ io simila?”

“Mi ne rajtas diri ĉi-stadie de enketo. Vi scios pli poste. Ĉu lia koro estis sana?”

“La koro? Ne. Li foje aludis, ke lia koro misfunkcias. Mi vidis lin gluti kuracilon kun sia manĝo. Mi scivolis, sed demandis nenion, ĉar li ne volonte parolis pri si.”

“Ĉu vi konas lian kuraciston?”

“Ne. Sed la asekurkompanio verŝajne ...”

Jano pensis, ke gravos certiĝi ĉi-rilate. Ĉu la raportoj pri la “perfekta sano” preterlasis ion?

La konversacio ne liveris pliajn interesaĵojn, kaj la detektivo adiaŭis siajn afablajn gastigantojn, kontenta konstati, ke la bildo pri Paŭlo Jorli nun iĝas pli preciza. Al la skemo de korpo iom post iom aldoniĝis

trajtaro psika, kaj la personeco, kvankam nur elemente konata, pli klare konturiĝis.

La suno kaŝis sin malantaŭ okcidenta monteto. Reaŭtante hejmen, Jano retrovis plezure la mil detalojn, kiuj prikantis printempon. Nun, kiam la labortago finiĝis, li tute flanklasis la pensojn pri la juna forpasinto. Li laŭiris la riveron, sorĉata de la belo de l' pontoj kaj de la akvaflua muaro. Li pensis, ke Ĝoja lin atendas, kaj dum li mense konsideris sian agrablan sorton, ombro da kulpeco lin trafis: ĉu vere decas al homo tiel kaj tiom feliĉi?

4

De la trotuaro Jano rimarkis, ke la apoteko estas senhoma. Li eniris. La porda sonorileto venigis grandan sveltan blondulinon, kun lipoj tro ruĝaj por plaĉi al Karal, kiu ĉe virino ne ŝatis maldiskretan artefaritecon.

“Mi volus paroli kun f-ino Karina Frisk.”

“*Sinjaŭlino* Frisk”, ŝi respondis. “Estas mi.”

‘Ano de la Virinliberiga Movado’, pensis Jano, kiu persone tute aprobis la uzon de unusola dirmaniero por “f-ino” kaj “s-ino”, sed kiu trovis ridinda la formon *sinjaŭlino*: kial ne simple uzi ĉiam *sinjorino*, kiel oni faras pri *sinjoro* sen distingi la edzojn disde la fraŭloj?

Li malfermis sian paperujon kaj montris la polican pruvilon murmurante:

“Polico.”

Ŝi atendis, ke li daŭrigu. Ĉu la defia esprimo estis reala, aŭ nur subjektive fantaziata de Jano?

“Ŝajnas, ke vi konis iun Paŭlon Jorlin.”

“Ha, lin? Efektive.” Naza muskoleto leviĝis malestime, kvazaŭ la nura ideo odoraĉus. Ŝi videble intencis daŭrigi, sed tuj sin regis, singarde.

“Kiam vi vidis lin lastfoje?” la detektivo demandis.

“Mi ne scias. Antaŭ tri, kvar monatoj. Kial vi volas scii? Ĉu li faris ion fuŝan? Malaperis?”

“Mi diros al vi poste. Kial vi pensas, ke li eble faris ion fuŝan kaj malaperis?”

“Se ne, la polico ne interesiĝus pri li, ĉu? Krome, tia ulo kapablas fari ion ajn. Se vi diros al mi, ke li prirabis bankon, mi ne miros. Sed konkretajn detalojn pri lia vivo mi ne povus doni.

Li nun estas tute ekster mia sfero.”

“Antaŭe li do estis en ĝi! Kiarole?”

“Li estis en ĝi, kaj tion vi scias; alie vi ne demandus min. Mi konatiĝis kun li pere de politika grupo, kiun mi ekkonis kiel studentino, kaj kies ĉefo li poste fariĝis. Ni amikiĝis. Li estis sprita. Komence mi trovis lin gaja, sed baldaŭ konstatis, ke li estas ne vere ĝoja, nur ekscitita.

Malseriozulo, fakte. Mi kontentas, ke mi ne plu rilatas kun li.”

“Pri kio li ŝatis paroli?”

“Revolucio. Ŝanĝi la socion. Organizi la lukton kontraŭ la potenculoj. Ĉiam la samo.”

“Ĉu vi konsentis kun li?”

“Ĝis certa grado, jes. Mi volonte batalos por pli justa socio. Sed al li realismo komplete mankas. Mi ne tre miras vidi vin. Li verŝajne faris ion fuŝan. Se polico kuras post ulo, tio pruvas, ke la ulo misorganizis sian agadon. Li neniam kapablis ĝuste taksi la konsekvencojn de siaj agoj.”

“Ekzemple?”

“Ekzemple, foje li iris skandali dum publika parolado organizita de *Ordo kaj Disciplin'* , la ekstremdekstra movado. Li sentis sin glorkovrita, ĉar li ilin insultis kaj kriaĉe perturbis la kunvenon. Nu, mi estas preskaŭ certa, ke tiuj faŝistoj havas informantojn. Ne estas dubo, ke ili facile malkovris, kiu li estas kaj kion li faras. Aliflanke, la trankvilaj burĝoj, kiuj sidis en la salono, evidente ne faris eĉ unu paŝeton maldekstren pro la paŭlaj kriaĉoj, sed iom pli

konvinkiĝis, ke ‘ordo’ necesas. Rezulto: li endanĝerigis sian revolucieman grupon kaj perdigis al la Afero maldekstra kelkajn eblajn simpatiantojn. Ĉu inteligente?”

“Vi juĝas lin laŭ tre fakta maniero. Ĉu vi ne opinias, ke lia entuziasmo kaj aŭdaco ion valoras?”

“Vi, policano, tion sugestas? Nekredeble! Ne, tiakampe oni devas juĝi laŭ la konkretaj rezultoj. Entuziasmo! Se vi scius ... Pro tiu lia ‘heroa’ skandalo, iu nana sencerba dikulineto amflamiĝis por li kaj tiel bone laŭdis kaj okulumis al li, ke li ekkonfidis al ŝi respondecojn, kiuj kondukos la grupon al katastrofo. Blinda li estas. Se eta nigraharulino komplete stulta tiel facile kun li manovras, imagu, kion la politikaj kleruloj faros! Eble vi estas ĉi tie, ĉar ili jam sukcesis kompromiti lin.”

“Ĉu vi konas la nomon de tiu virino, kiu lin ...”

“Virino? Tiu karnobulo, vi volas diri! Jes, Lejla Gorazdo ŝi nomiĝas. Ŝi verŝajne kunkulpas en lia fuŝaĵo.”

“Ĉu vi opinias, ke Paŭlo Jorli estas sinmortiga tipo?”

Ŝi rigardis lin dum sekundo tre intense, kun malfermita buŝo. Evidente, ŝi ĵus komprenis, ke ŝi tute misinterpretis la kaŭzon de lia veno. Per obtuza voĉo ŝi diris mallaŭte, kvazaŭ ŝi timus la proprajn vortojn (kaj eble la eventualajn konsekvencojn de l' ĵusa sin-esprimo):

“Ĉu li mortis?”

Malrapide, Jano kapjesis.

“Pro kio? Kiel?”

“Mi ne rajtas diri. Ni serĉas. Vi diris, ke vi amikiĝis al li. Kiagrade?”

“Mi ne timas la vortojn. Ni estis samlitaj. Pli bone, ke mi tion diru mem, vi certe ekscius finfine. Jes, mi estis lia amdonantino. Pri sinmortigo vi volas scii, ĉu? Ne estas facile respondi. Kiam li ne estis ekscitita, li emis deprimiĝi. Krome, li parolis, kvazaŭ morti por li signifus nenion. Tamen, por mortigi sin mem, oni bezonas kuraĝon, ĉu ne? Li estis kuraĝa, kiam tio povis veki admiron, kiun li videble ĝuadis. Sed la kuraĝo sin mortigi estas io alia: ne estas publiko por aplaŭdi, oni devas fronti la finon de ĉio, scii, ke oni ne plu gustumos la bonajn fruktojn de l' tero ... Mi ne povas imagi lin kapabla kunstreĉi la kuraĝon necesan por tia fina decido. Aliflanke, se li ne plu povus fronti siajn admirantojn, se io fia, kion li faris, neeviteble koniĝus, eble tiam li akceptus tiun lastan solvon. Vere, mi ne povas diri.”

Eniris kliento, kio interrompis la dialogon. Antaŭ ol foriri, Jano, kompletigis sian informiĝon per kelkaj personaj demandoj pri ‘sinjaŭlino’ Frisk – kiu, li eksciis, nur antaŭ tri jaroj finis la farmaciajn studojn – kaj havigis al si liston de personoj, kiuj formis kun Jorli politikan grupeton. Kompreneble, tiu listo ne estis kompleta, kaj enhavis precipe individuajn nomojn (ĉar la familiajn ŝi multokaze ne sciis), sed ĝi tamen povis utili. Ŝajnis al Jano, ke ŝiaj okuloj alprenis venĝplezuran brilon, kiam ŝi skribis por li la koncernan nomaron.

Nur kiam li sidis denove en sia oficejo li ekpensis, ke la alveno de l' kliento en la apotekon, rompante la interparolon, forgesigis al li informiĝi pri la sanstato de Paŭlo Jorli kaj pri la medikamento menciita de s-ro Valdunja. Pri tio li devos demandi alifoje.

5

Trovinte la adreson de Lejla Gorazdo, detektivo Karal decidis tien piediri. Estis trans la parko, kaj en tia blucĉiela tago, speco de sento naturreligia forte invitis lin omaĝi printempon per parka promeno. Li sciis el longa sperto, ke trankvile paŝadi estas por li unu el la plej bonaj rimedoj meti ordon en la impresojn kaj lasi la ideojn interkonektiĝi.

Fakte, dum li promenis en la plaĉa tilia parfumo de parka vojeto, la sama penso ripetiĝis en li, nome, ke li ne povos utile mediti pri la afero antaŭ ol ricevi la toksologian raporton kaj diversajn detalojn pri la deveno kaj vivhistorio de la juna forpasinto. Sen scii la fizikan kaŭzon de l' morto, li povas nenion konjekti pri la interpersona, se tia eĉ ekzistas. Se venenado okazis, la tempa faktoro tre gravos por difini, kiu – ĉu vole ĉu nevole – respondecas pri ĝi. Sed tio implicas, ke oni konu la daŭron, kiun la veneno bezonas por havi sian funebran efikon. Aliflanke, por kompreni la kazon, necesos kelkaj bazaj informoj pri la bela Paŭlo, kiujn la koncerna polica servo nun serĉas.

Tamen, ĉiu konversacio kun iu, kiu konis la junulon, alportas novajn elementojn, kaj la dialogo kun la “karnobulo” certe ne malhavos intereson, se juĝi laŭ la mieno de *sinjaŭlino* Frisk. La vorto “karnobulo” igis Janon rideti. Pensante, ke, laŭ la apotekistino, Lejla havas nigrajn harojn, la detektivo demandis sin, ĉu kontrasta impreso ludis rolon en la sukceso de fino Gorazdo kun Paŭlo Jorli. Post blonda sveltulino, dikulino nigrahara. Ĉu post la intelektulino, ŝi aperis konkretema? Kaj pasia, post la racia faktulino, verŝajne pli ol iom malvarma? Atentu, Jano, amiko! Tiaj diametraj kontrastoj pli ofte ekzistas en homa menso ol en vivo reala. Ne lasu kliŝojn trompi vin!

Ke ne temis pri subjektiva antaŭjuĝo, tion pruvis Lejla Gorazdo en la kvin unuaj minutoj da babilo. Sed por tio, detektivo Karal devis iom atendi. Montriĝis, ke la knabino laboras en

“superbazaro” – en ties viandopaka sekcio, se paroli pli precize – kaj Jano ne vidis ŝin antaŭ

ol la labortago finiĝis, je tagmezo, kiel ĉiusabate. Li ja ne volis perturbi ŝian deĵoron, kaj veki scivolon inter la gekolegoj.

Li alparolis ŝin, dum ŝi eliris el la laborloko. Demandito estis montrinta al li tre malaltan virinon, ‘sferecan’ (li diris al si), kun abundo da nigraj haroj kaj tre bruna haŭto, kiu parolis kun kolegino,

farante tutan nervan koregrafion de rapidaj gestoj.

Kiom ajn la detektivo penis kontroli sian subjektivecon, li nur povis klini sin antaŭ la faktoj: la vivo liveris al li perfektan kontraston. Lejla Gorazdo prezentis la stereotipon de sudulino tiel senmanke, kiel Karina Frisk la nordulinan.

Tiel emociiĝa ŝi estis, ke kiam Jano diris sian funkcion, ŝi eksaltis, paliĝis, ruĝiĝis, metis la manon al la koro, poste al la buŝo, kaj ripetis, kvazaŭ estus la plej agonia novaĵo tutmonde:

“Polico?!”

Videble ŝi apenaŭ kapablis kredi, ke tia aŭtenta ŝtatfunkciulo ŝin alparolis.

“Vi konas, ĉu ne?, viron nomatan Paŭlo Jorli.”

“Pli ol iom!” ŝi preskaŭ kriis, “sed kion ...”

Klare, ŝi ankoraŭ ne sciis pri lia morto. Male al tiuj de aliaj lokoj, la gazetoj de Sanktavalo ne ĵetas sin kiel rabbirdoj preden sur la sensacion, kiun mistera morto prezentas. La loĝantaro –

almenaŭ la origina, pli kaj pli invadata nuntempe de alilokanoj – tro respektas la homajn sentojn por ŝati tian kutimon. Tiu sindeteno de la loka gazetaro ofte montriĝis valora helpo por tasko polica, kaj Jano Karal ĝin ege aprobis.

Denove lin tiklis la demando: ĉu diri aŭ ne diri tuj? Ke tia skrupulo lin trafis, montras, ke la sanktavala influo (kaj tiu de lia sanktavala edzino, kompreneble) ne preterpasis lin. Alie, efikeco estus la sola konsiderata faktoro. La skrupulo do venis, sed ne venkis:

“Mi tuj klarigos, sed mi unue devas peti vin respondi kelkajn demandojn.”

“Li estas arestita, ĉu ne? Pro kio? Pro ŝmire skribi sur la Granda Ponto?”

Jano apenaŭ notis la regionan uzon de “pro” kun infinitivo. Interesis lin la rivelo, ke Paŭlo Jorli partoprenis en la “ŝmira milito”, kiun faris unuj al la aliaj la ekstremismaj grupoj de la urbo. Oni ne plu memoras, kiel ĝi komenciĝis. Estis batoj kaj rebatoj, plus la interveno de sprituloj, eble politike ne tre precizaj, sed inspirataj de la skribaĵoj. Ekzemple iun matenon sur granda muro aperis:

MARKSISMO = MURDO

La sekvan matenon estis korektite al:

MARKSISMO = MERDO

Dum la posta nokto, iu ŝmiris ĉion nelegebla, kaj grandliteris apude:
FAŜISTOJ = FUŜISTOJ

ktp, ktp.

La farba skribo grandponta iom malsimilis. Ĝi tekstis:

BOJKOTU Ĉ-T

“Ĉ-T” estas mallongigo de “ĉiotrovejo”, nomo plej ofte uzata de la popolo por signi la grandan magazenon “Alta Turo”. Kial tiu ĉiovendejo vekis la koleron de iu dekstra aŭ

maldekstra grupeto, tute ne estis klare.

Estu kiel ajn, Karal plezure konstatis, ke kun tia homo, kia Lejla Gorazdo, li devos malmulte demandi. Ŝi mem elbabilos al li ĉion, kion ŝi scias, proprainiciate. Fuŝa revoluciulino, verdire! Se la politika agado de Jorli estus pli ol ludo, neniam li uzus la servojn de tia emociiĝa parolŝprucigilo.

Ŝi daŭrigis antaŭ ol li malfermis la buŝon:

“Li estas kuraĝa. Tion mi ŝatas en li. Li ne konsideras la propran riskon. Li pretas arestiĝi, eĉ

morti, pro sia idealo. Ne kiel aliaj, kiuj, pretekste de realismo, malkuraĝus fari ion ajn ...”

(Ĉu tio aludis al Karina Frisk?)

“Ankaŭ mi ne timas vin”, ŝi daŭrigis. “Ĉar vi estas policano, vi kredas, ke ĉio estas ebla al vi.

Sed mi ne lasos vin agi. Ni liberigos Paŭlon, kaj kun lia helpo ni liberigos la tutan laboristan klason. La tempo agas kun ni.”

Ŝi marŝis antaŭen, farante grandajn gestojn, kvazaŭ perdita en revo, ne demandante, kien li iras, kion li volas. Tiel obsedata ŝi estis pri sia revoluciismo, ke ŝi ŝajne ne suspektis, kion implicas lia nuna demando:

“Kiam vi vidis lin lastfoje?”

“Ĉu vi imagas, ke mi respondos? Aŭ ke mi respondos la veron? Ne naivu, sinjor' policano. Ni estas sekreta grupo. Eĉ per torturo vi ne paroligos min!”

‘Mi vetus,’ pensis Jano, ‘ke eĉ per torturo oni vin ne silentigus.’ Li decidis igi ŝin pripensi.

“Mi ankoraŭ nenion diris pri Paŭlo. Ke li estas arestita, estas konkludo via, ne informo de mi.

Vi volas lin helpi, lin liberigi. Sed kiel vi scias, kiu respondo al li plej utilos? Mi donos al vi konsilon – sekvu ĝin aŭ ne, al mi estas egale, ne mi portos la konsekvencojn; se vi havas iom da sana prudento, vi scios, ke mi pravas – kun la polico plej saĝe estas tuj diri la veron, ĉar finfine ĝi ĉiam sukcesas informiĝi, kaj via pozicio estas pli bona, se vi ne mensogis. Mi do ripetas la demandon: kiam vi vidis lin lastfoje?”

“Se mi dirus: hieraŭ vespere, ĉu vi estus kontenta?”

“Tute ne, mensogo ne kontentigas min. Sed ni ludu la ludon. Kion vi faris kun li hieraŭ?”

“Nenion kompromitan. Ni babilis.”

Jano preskaŭ diris: ‘ĉu vi kutimas babili kun mortintoj?’ Sed li regis sin ĝustatempe. Diri tiaĵon povus eligi interesan reagon, eble riĉan je informo; krome, ŝia infaneca sinteno lin incitis. Tamen estus tro kruele, kaj li sendube povos ricevi la samajn sciojn per pli bonkora aliro, nerekta.

“Vi deiras de la supozo, ke ni lin arestis. Sed se mi enketas pri li, tio povas havi aliajn kaŭzojn, ĉu ne?”

Unuafoje ŝi restis senvorta, kaj en tiu silento li sentis ŝian timon. Per pli obtuza voĉo ŝi fine asertis, kvazaŭ por konvinki sin mem:

“Vi diras tion por min paroligi.”

“Ne. Mi diras tion, ĉar mi scias, ke vi ne povus babili kun li hieraŭ. Estus tempo forlasi vian infanan konduton por fronti al realo.”

“Ĉu io okazis?” ŝi diris paliĝante.

Li preferis ne respondi.

“Akcidento? Ĉu lin surveturis aŭto? Ĉu li estas vundita?”

Nun ŝi rigardis lin intense, esperante vidi sur lia vizaĝo esprimon, kiu ŝin trankviligus kaj evitus fronti veron pli kaj pli timatan. Sed lia mieno restis imprese serioza.

“Ne diru, ke li mortis!”

Silenta kapgesto konfirmis ŝian hipotezon, kaj li sentis ŝin ŝanceliĝanta. Jam kelkajn minutojn ili paŝis en la parko, kaj ili ĵus alvenis apud lageto. Tenante ŝin ĉeŝultre, li sidigis ŝin sur benkon, kaj mem eksidis apude. Antaŭ ili vico da anasoj pasis, kvazaŭ ludiloj, sekvata de majesta cigno.

Salikaj branĉoj desupris ĝis la akvo, lulataj de facila vento. Neniu bildo povus pli perfekte elvoki serenon. Sed al Lejla sereni ne estis donite.

Jano antaŭe pensis, juĝante laŭ ŝia videble histerieca karaktero, ke la ekscio ŝin eksplodigos en kriojn, grandajn gestojn, koleron aŭ ian ajn alian bruan dramaĵon. Ne tiel ŝi faris. Ŝi nur ploris silente. Ĉio antaŭa – la revoluciaj ideoj, la stulta eldiro pri torturo, la defia sinteno – ĉio ĉi estis teatraĵo. Sed nun la supraĵa krusto estis tratranĉita, kaj montriĝis la korŝira vundo interna. Ke ŝi amis Paŭlon ne estis teatre.

Kun la tono amika de suferkomprenanto, li ŝin alparolis milde:

“Vi amis lin, ĉu ne?”

Ŝi ploris plu senbrue. Post longa minuto ŝi ekparolis, kvazaŭ al neniu, per voĉo apenaŭ

aŭdebla:

“Li estis tiel bela ...”

Kaj subite, laŭ unu el tiuj abruptaj ŝanĝoj de personeco, kiuj ŝajne karakterizis ŝin, ŝi turnis sin al li, ekkaptis ambaŭmane liajn ŝultrojn kaj, lin skuante, sendis al li rigardon de infera malamo. Raŭke ŝi diris:

“Ne estas eble. Ne estas normale. Li estis bela, kiel greka dio, li havis doneman, suferan, homan koron, li estis vigla kaj viva. Energion donis al li pli ol sate liaj altaj idealoj. Kion oni faris al li? Kiu? Ĉu vi? Ĉu la polico lin murdis? Kial vi turmentas min? Diru, parolu, konfesu, aĉa torturisto!”

“Vi pravas, ke ne estis normale”, li respondis per tiel kvieta voĉo, ke ŝi iom trankviliĝis.

“Precize tial mi enketas. Mi bezonas kompreni, ekkoni la veron, por ke la kulpulo ne fuĝu senpuna. Nia ne estas diktatora lando, kie la polico agus kontraŭ la civitanoj. Nia rolo estas protekti vin, kaj certigi, ke justeco respektiĝu. Ne estas juste, ke juna homo plena je pulsa vivo, dediĉita al Afero, kiun li trovas bona, malaperu el ĉi-mondo pro ies ago, sen tio, ke la vera kulpulo trafus sian punon. Pro tio vi povas multe helpi min, donante ĉiujn klarigojn, por ke mi trovu la veron. Ĉu vi konsentos?”

Ŝi ne povis respondi. Li sciis, ke al ŝi ne estas facile. Unuparte, ŝi volus venĝi sian Paŭlon, sed dua parto de ŝi tiel kutimis malfidi la policon, ke ŝi timis fali en kaptilon. Des pli, eble, ĉar la voĉo de Jano Karal scipovas esprimi tian homan kunsenton, ke rezisti lian konvinkemon al multaj malfacilas, kio estas unu el la kaŭzoj de lia detektiva sukceso: io samtempe varma, komprena kaj respektoplena en lia personeco nature invitas al konfido. La allogon de tiu personeco ŝi forte sentis, kaj post la suferita ŝoko, konfidi al amika koro agus liberige. Tamen ŝi hezitis pro la longa sinnutrado per sentoj kontraŭpolicaj.

Karal bone komprenis la konflikton en ŝi. Li sciis, ke tiaokaze nenio efikas pli bone ol la vero. Tial li esprimis ĝin.

“Vi komprenu. Ni nenion scias. Li mortis pro koroĉeso. Tio signifas nenion, krom tio, ke li vivis kaj nun ne vivas plu. Ĉu estis akcidento? Povas esti. Sed ankaŭ povus esti murdo, povus esti sinmortigo.”

“Ne”, ŝi vigle reagis. “Paŭlo ne mortigis sin. Ne li.”

“Kial vi estas tiel certa?”

“Mi konis lin. Li estis plena je projektoj, je agado. Li ŝatis la vivon. Li ŝatis bone manĝi, ĝui sekse. Li luktis por justeco. Li vivis por idealo, sed ankaŭ por si, por la propra plezuro, kaj por aliula plezuro. Li volis, ke la suma kvanto da feliĉo en la homaro kresku. Tion li diris al mi multfoje. Li diris: ‘Mi ĝuigas vin, kaj ankaŭ min, kaj per tio la homaro, kiel tuto, pli feliĉas. Ni devas batali, por ke la plej granda nombro da homoj spertu la plej grandan kvanton da plej altkvalita plezuro. Tial ni devas detrui tiun ĉi feliĉkondamnan socion.’ Ĉu tia homo mortigus sin? Ne. Neeble.”

“Tamen, li fojfoje estis deprimita, ĉu ne?”

“Deprimita? Ne. Laca, jes, ankaŭ momente senkuraĝigita. Sed li rapide reardiĝis. Li havis celon, ĉu vi komprenas? Kiu celon havas, ne falas en sinmurdon. Aŭ li mortigus sin en heroa ago, por atentigi la publikon pri iu maljusteco, aŭ realigante ion, kion sen sinmurdo ne eblus atingi.”

“Kion pri la sano? Ĉu la koro iris bone?”

“Ĝi lin zorgigis. Li konsultis kuraciston pri tio. Li regule glutis medikamenton, ĉar la koro ne estis tute bonorda.”

“Mi devos kontroli pri tiu kuracilo. Ĉu vi konas la doktoron, kiu zorgis pri lia koro?”

“Ne. Li havas sian konsultejon ĉe Muzea Placo, sed kie ekzakte, mi ne scias.”

“Ĉu vi povas diri al mi, kion Paŭlo faris ekde, mi diru, lasta lundo?”

“Tage li laboris, mi ne scias kie, kun Timoté Valdunja. Ĉi tiu diros al vi. Nun pri la vesperoj.

Merkredon mi ne vidis lin, li verŝajne iris al la kurso de ĉina kuirarto, kiel ĉiumerkrede.

Mardon ni havis kunvenon kun geamikoj, ni babilis, gitaris, kantis, diskutis. Lundon, ni kune iris al kinejo, post kio li venis al mia loĝejo. Mi havas ĉambron tute sendependan, subtegmente. Li kuŝis kun mi ...”

Abrupta plorsingulto ŝin interrompis, brue. Ŝi krietis: “Paŭlo!”, kvazaŭ por voki: “revenu!”, nekonscia pri la homoj, kiuj promenis preter la benko, kaj la paron scivole rigardis. Post minuto, la singultoj cedis lokon al pli regula, senbrua, amara plorado, fojfoje interrompata de milda nomvoko: “Paŭlo!, Paŭlo!”, kiun ŝi prononcis kun kapnea gesto, kvazaŭ ŝi volus nei lian forpason.

Jano Karal diskrete skribis la donitajn informojn sur notlibreto, dum ŝi poŝtukis al si la okulojn. Li ekdiris:

“Ni devas trovi, ĉu iu kulpas. Helpu min. Ĉu li havis malamikojn?”

“Paŭlo malamikojn? Ĉiaspecajn li havis! Sendube multaj burĝoj timis lian influon sur la junulojn. Kaj la faŝistoj de *Ordo kaj Disciplin'* lin malamegis, ĉar li perturbis iliajn kunvenojn por lanĉi al la hezitantoj nerefuteblajn verojn. Krome li estis tiel bela, virinoj volis lin allogi.

Kiam li diris ‘ne plu’ al tiu farmacia ulino, ŝi ne facile akceptis, ke li elektis min. Li foje diris al mi: ‘Ŝi aspektas fiŝe malvarma, sed ŝi interne estas infero de malamo’ … Estas ŝi. Estas ŝi!

Kiel stulta mi estis, tion ne vidi tuj! Ŝi furiozis, ke li forlasis ŝin. Ho jes! Diru, kiamaniere li mortis? Ĉar ŝi ne kuraĝus frapi front-al-fronte. Mi mense vidas ŝin miksi siajn venenajn fungojn aŭ mi-ne-scias-kiun mortigan likvaĵon. Ne kuraĝa bato, nur venĝo laboratoria …”

Rigardante la vizaĝon de Lejla, tordatan de malamo, Karal pensis: ‘Se mortigos *vi*, ne venenon vi prenos, vi komencos per parolo, poste uzos la ungojn, kaptos iun ajn taŭgan objekton kaj frapos ĝismorte.’

“Venu”, li diris. “Vi ankoraŭ ne tagmanĝis. Iru hejmen kaj ripozu.”

“Ripozi! Ĉu vi frenezas? Mi devis pasigi kun li la posttagmezon. Kion mi faru? Diru al mi!

Kion mi faru?”

Dum ŝi ree plorsingultis, li metis sian brakon en la ŝian, kaj ŝin facilmove starigis. Ŝi iris apud li, elgrincante neaŭdeblajn vortojn. Li akompanis ŝin hejmen, nur duonsukcesa en sia provo kvietigi ŝian agresemon, kiun li trovis eventuale danĝera.

6

Pluraj kuracistoj havas oficejon ĉe Muzea Placo, sed nur unu estas korfakulo. D-ro Lazár Gutmanis – grizharulo kun okulvitroj kaj fajnaj trajtoj de intelektulo – tuj rekonis la foton de Paŭlo Jorli, sed li komence rifuzis lin priparoli, citante la profesian sekreton. Nur kiam detektivo Karal klarigis, ke la junulo mortis sen komprenebla kaŭzo, la kuracisto konsentis diskuti lian kazon. Li traserĉis sliparon, kaj trovis la necesajn detalojn, inkluzive de elektrokardiogramo.

“Li ne mortis pro kormalsano, tion mi povas garantii”, li diris.

D-ro Gutmanis parolis kun kanta fraztono tiel tipe sanktavala, ke Jano tuj prepariĝis al kelkaj

“*o*”-mankoj.

En la sanktavalaj lernejoj, oni instruas al la infanoj de tempo al tempo forigi la finan “*-o*” de substantivo, por eviti monotonecon, aŭ kiam la ritmo de la frazo tion pravigas. Neniu

sanktavalano skribus leteron lasante ĉiujn *o*-finaĵojn. Sed anstataŭ uzi apostrofon, oni tie metas dekstrakornan supersignon sur la lastan vokalon de l' vorto, skribante, ekzemple,

‘sinjór direktoro’ aŭ ‘sinjoro direktór’. Ofte pri tio amike bataletas geedzoj Karal. Kiam ŝi diras: “Vi el la urbego snobe uzas neklarajn longajn vortojn por impresi fakule”, li rebatas:

“Kaj vi en Sanktavalo havas tiel delikatajn orelojn, ke diri simple, kiel ĉiu normalulo, ‘sinjoro doktoro’ al vi ŝiras la timpanon, vi devas prononci ‘sinjoro doktor', sinjor' doktoro’ kvazaŭ vi poemus tuttage, sed vi tiel hontas pri via vortofuŝo, ke vi eĉ ne kuraĝas meti apostrofon, kiu montrus al ĉiuj, ke vi ion forprenis. Ne. Vi metas supersignon, kun la naiva espero, ke la manko ne vidiĝos ...” Tiam ŝi indignas: “Vi verfalsanto! Ni kaŝas nenion. Simple, la akcento translokiĝas sur la lastan silabon, kaj ni tion montras supersigne, kiel en la hispana ...”

Jano prave divenis: jam ĉe la sekvanta frazo aperis eliziita vorto:

“Fakte lia kor' estis tute sana, kiel normale ĉe tiaaĝa homo. Li havis nur kromsistolojn, sed tiujn oni povas alskribi al la ekscese emocia teren'. Vi sciu, pli ol la ordinara kardiologo, mi profunde studis

apudfakojn – psikiatrion, endokrinologion ... – ĉar ... nu, mia profesio min interesegas, kaj la psikosomata unuo estas tia, ke ... Sed mi ne komencu rajdi sur mia ĉevaleto, tio vin tedos senprofite. Mi diru, ke mi paroligis tiun junulon, kvankam li nevolonte malfermis sian koron, nu ... mi ne eksciis multon ... tamen sufiĉe por preskribi al li novan medikamenton, kiu reguligas la korritmon ĉe tiaj kazoj, kaj efikas milde trankvilige al la menso. Kompreneble, mi ne scias, ĉu li glutadis ĝin. Sed mi emus pensi, ke jes. Lia kardia misritmo lin timigis multe pli ol objektive necesus. Li petis min farigi sanganalizojn, kiuj vere ne postuliĝis. Temas pri viro psike nestabila, kun impresiĝema karakter': minuskomplekso, duboj pri la propra vireco, sur fono hipokondria ... Tia homo senmanke glutas preskribitan kuracilon, jes, tion oni povas fidi."

Karal, zorge notinte la nomon de la kuraca kunmetaĵo, por ĝin komuniki al la polica medicinisto, demandis:

"Kiom ofte li devis gluti ĝin?"

"Prave, prave, jes. Dozologio ofte estas delikata, ĉu ne vere? Sed ne ĉifoje: unu norman ĉiuvespere mi preskribis, t.e. 100 mg, kaj unu pli, se la koro vere bategus maltrankvilige. Sed eĉ 300 mg ne havus danĝeran efikon, kaj eble mi diris al li: zorgu ne preni pli ol tri en unu tago."

"Ĉu li akcidente povus enŝovi en sin tro fortan dozon?"

"Ne. Tia tipo tre zorgas pri sia sano, kaj li ne impresis min, kiel mortodezira. Ŝajnus nekredebla, ke li uzis tro multe."

"Ĉu iu povus prepari la medikamenton por li kaj intence doni tro?"

"Ne. Temas pri longeta gelatena kapsulo, ne pri gutoj aŭ pulvor', kiun oni metus en trinkaĵon.

Se iu forprenus la pulvoron el la kapsul' por ĝin miksi kun manĝo, malplaĉa naŭza gusto tuj perceptiĝus, kaj li preskaŭ certe ĉesus manĝi. Ne, tiun medikamenton oni glutigas al si mem, neniu povas interveni. Kredu min, sinjor' detektivo, lia morto neniel rilatas kun iu kormalsan', nek kun mia preskribaĵo."

Dum la milda doktoro parolis, Jano sin demandis, de kiom da generacioj lia familio loĝas ĉi tie. Se laŭnome klare latva aŭ litova judo, d-ro Gutmanis ne malpli evidente edukiĝis en Sanktavalo: ĉio en lia maniero paroli tion atestis.

“Se vi trovos la kaŭzon de l' morto, sciigu min, tio min interesas”, la kardiologo diris adiaŭante.

Strange, al Jano tio impresis, kvazaŭ iom ironia. Sed tiajn pseŭdo-intuojn oni prefere ne tro fidu. Kiam enketo komenciĝis, ĉio ŝajnas suspekta. Sindemande, kion la toksologia raporto indikos, la policano repaŝis oficejen.

7

La koncerna raporto ankoraŭ mankis, sed la rezultoj de l' rutina serĉado estis ricevitaj, kio estis bona novaĵo.

Jano Karal tiel eksciis, ke Paŭlo Jorli naskiĝis en la industria regiono de Kvarlamen: li do ne estis sanktavalano. Laŭ enketo de la tiea polico, li estis la filo de paro laborista. Tragedio okazis, kiam li aĝis ses jarojn. La domo, kie li loĝis, komplete brulis, kaj inter la viktimoj troviĝis liaj gepatroj kaj fratino iom pli juna ol li. La knabo estis akceptita de senedza onklino, kiu edukis lin, ĝis ŝi mortis; li tiam estis dekokjara. En la lernejo li estis meze bona, ne sufiĉe sukcesa por ricevi stipendion cele al plua studado, kvankam kelkaj liaj instruistoj opiniis, ke li estas pli inteligenta ol unuavide montriĝas, kaj ke nur psika nestabileco malhelpas lin plene uzi siajn mensajn kapablojn. Li faris murŝmiristan-farbistan metilernon en Kvarlamen, post kio li forlasis la regionon, kaj tie oni sciis nenion pli pri li.

Oni retrovis lian spuron en diversaj urbetoj de Sanktavalo, en kiuj li ne restis longe. Fine li alvenis ĉi tien, al Valĉefa, kaj trovis laboron ĉe Timoteo Valdunja, kun kiu li restis ĝis la forpaso. Li luis ĉambron en diversaj lokoj, laste ĉe s-ino Satej. Nek en Kvarlamen nek en Sanktavalo la polico havis okazon interesiĝi pri li. Ke li kulpis pri sloganŝmiro, neniu oficialulo sciis, nek ke li estis la junulo, kiu krie interrompis aranĝon de *Ordo kaj Disciplín*.

La ĵurnalistoj, kiuj raportis la incidenton, ne sukcesis trovi la identecon de la skandalinto.

‘La bildo preciziĝas’, pensis Jano, kiu firme kredis je la principo ‘por trovi murdinton, murditon plej konu’. Li decidis kompletigi la sciaron per aliro al la kolego de Jorli, t.e. al la alia laboristo de mastro Valdunja. Tiun li facile trovis, sed la pridemandado restis senfrukta.

Montriĝis, ke tiu laboristo estas solec-ama, retiriĝema ulo, kiu petas la mastron lasi lin kiel eble plej multe labori sola, sen helpo. Ĉar li estas bonega metiisto, Timoteo Valdunja tion volonte akceptas.

La kolego ne ŝatis Paŭlon, kiun li rigardis ‘laboristo kun intelektulaj pretendoj’, kaj nerealisma anarkiisto. Lin naŭzis Paŭlo foje, kiam ili kune ŝmiris la murojn de vilao, kaj li diris: “Kiom mi ĝojus, se tiuj luksaj loĝejoj foje forbrulus!” Post tio, li trovis Paŭlon danĝera frenezulo, kiun li plej ofte evitis. Rezulte, li preskaŭ ne rilatis kun Jorli, kaj povis diri pri tiu nenion nekonatan.

*

Sabaton vespere ofte vizitis ges-rojn Karal la nevo de Ĝoja, Stefano. Ambaŭ geedzoj lin tre ŝatis, ĉar li estis verva spritulo, kies humurplena konversacio neniam riskis tedi. Li aĝis dudek tri aŭ dudek kvar jarojn. Jam plurfoje li helpis Janon en liaj enketoj, kun grandega plaĉo. Leŭtenanto Remon, laŭ tipe sanktavala konduto, kiu en la ĉefurbo ne imageblus, ĝis nun ĉiam akceptis tiun neoficialan kunlaboron. Jano pensis, ke plian fojon li petos la helpon de Stefano, ne dubante, ke familiariĝinte kun la faktoj, la leŭtenanto ankaŭ ĉifoje konsentos.

Revidinte la junulon, Jano konsciiĝis, ke precize tian tipon li atendis vidi, kiam li unuafoje penetris la ĉambron de Paŭlo Jorli: Stefano ja estas tute ordinara homo, nek granda, nek malgranda; nek forta, nek malforta; nek bela, nek malbela; kun harkoloro meza inter blonda kaj bruna, la okuloj tiel pale brunaj kun iom da verdo, ke ili sub ia lumo aspektas preskaŭ

grize. Se naturo foje volis krei specimenon de homo tute ne rimarkinda, ĝi sendube ĉi-kaze plej bone sukcesis. Tamen la vizaĝo estis plaĉa, la rigardo inteligenta kaj la buŝo ofte formata al gaja rideto.

Fizike do ŝajnis, kvazaŭ Stefano neniam sciis, kian tipon elekti. La samo validis profesie.

Inteligenta kaj sufiĉe kulturita, Stefano estus povinta studi en universitato; stipendion por tio li certe ricevus. Sed li decidis alie: li lernis la plumbistan metion. Li praktikis ĝin iomete, post kio li malkovris, ke li finfine estas intelektulo: li do enskribiĝis en universitato por studi biologion. Post unu jaro, li trovis tion teda, kaj decidis iĝi meĥanikisto. Li lernis la metion, sed ankaŭ tiu ne kontentigis lin. Fine li atingis solvon taŭgan por tiaj disaj tendencoj: li trovis garaĝon, en kiu oni akceptis lin kiel nur duontempan laboriston; la alian duonon de la tempo li studas universitate.

“Kaj kion vi studas nun?” demandis Jano, neniam kapabla memori, kie Stefano nun staras en sia zigzaga kariero.

“Lingvistikon”, li respondis.

“Ĉu tio utilas al io?”

“Estas laŭmode nun. Sed tio ankaŭ utilas, kvankam la publiko tion ne imagus. Ekzemple, ĉu vi scias, ke en nia grandioza ĉefurbo ekzistas

lingvistoj, kies tasko estas traduki oficiallingven la tekstojn de Sanktavalo?”

“Kion?”

“Vi bone aŭdis min. Kiam sanktavala parlamentano proponas leĝprojekton aŭ funkcias kiel komisiona raportanto, li kompreneble enmetas en sian redakton la tutan gamon de niaj karaj regionaĵoj. Tion por teksto valida tutlande oni ne povas allasi; estas do homoj, kiuj reverkas.

Mi informiĝis. Estas bone pagata laboro, kaj verŝajne ne tro malfacila por iu inklina cerbumi, kiel mi. Tiuj postenoj kreiĝis post la raporto de Fortamán.”

“Kio estas tio?”

“Ĉu vi neniam aŭdis pri ĝi? Foje, nia brava reprezentanto Fortamán tie prezidis enketan komisionon, kaj en lia projekto de raporto estis skribite: ‘ *Tial ke, ĉar N. estis eksigita pro transdoni parton de la partia mono al la konsúl, la komisiono devis …* ’ (mi ne memoras la finon). Nu, dum remeti ‘ *o*’-n al *konsúl* ne kostis grandan penon, ne estis same kun *pro*. En la komisiono ja troviĝis personoj, kiuj ne akceptis la esprimon ‘ *pro transdoni*’. Iu proponis

‘ *transdoninte*’, sed la juristoj diris: ‘Ne; estas grave indiki, ke tio estis la kaŭzo de la eksigo.

Alie, iu povus pensi, ke li leĝe transdonis la monon, kaj poste li estis eksigita pro alia kaŭzo.

Por esprimi la ideon klare, oni devus diri: *pro transdono de parto de la partia mono al la konsulo*.’ Sed tio protestigis aliajn, por kiuj belsoneco plej gravas. ‘Tiel ripeti la *o*-finaĵon impresas tre malbele’, ili diris. Kiam membro sugestis diri: ‘ *tial ke, ĉar N. estis eksigita pro tio, ke li transdonis parton …* ’, la aliaj riproĉis, ke tro multaj ‘ *ke*’ ne pli belas ol tro multaj ‘ *o*’.

Dum horoj kaj horoj ili diskutis. Se iu proponis: ‘ *tial ke, ĉar N. transdonis al la konsulo parton de la partia mono kaj sekve estis eksigita …* ’, kritikanto diris: ‘Vi ŝanĝis la emfazon.’

Se alia submetis: ‘ *ĉar, pro la eksigo de N., ŝuldata al la fakto, ke li transdonis parton de la partio mon…* ’, iu kriaĉis: ‘ *Tro peze! Ni ne povas akcepti …* ’”

“Kion ili faris finfine?”

“Ili kreis redaktan komitaton, komisiitan verki tekston, kiu estu samtempe klara, bela kaj jure neatakebla.”

“Kaj kiel la komitato solvis la problemon?”

“Ĝi decidis, ke, ĉion konsiderinte, ĝi trovis ne absolute necesa mencii la fakton, ke N.

transdonis la monon, ktp. Se mi ne eraras, la frazo fine iĝis ... ‘Tial ke, pro diversaj cirkonstancoj, la komisiono devis ...’.”

“Nekredeble!”

“Tamen vere. Tiam iu ĵurnalisto kalkulis, kiom tiu frazo kostis al la parlamento. Diskuto sorbas multe da mono, pro l' salajro de la deputitoj, protokolistoj, stenotajpistinoj, la presado de l' protokoloj, la relego de la provaĵoj, kaj multaj aliaj kostoj, pri kiuj la impostpaganto ne havas ideon. La fina sumo estis tiel harstariga, ke la parlamento decidis ion fari, por eviti, ke simila afero rekomenciĝu. Ĝi komencis pridiskuti tiun temon, sed iom honte, timante, ke iu denove sumigos la kostojn. Fine, ĝi aprobis kelkajn pliajn ŝtatfunkciulajn postenojn por lingvistoj-reviziistoj, kies tasko estas transskribi la parlamentan ĵargonon en bonan, klaran, belan kaj ĝustan lingvon. Jen kial, post duontago en garaĝo, mi studas lingvistikon, beletron kaj stilon.”

“Tre interese, knabo,” Jano komentis, “sed mi havas alispecajn priokupojn. Diru al mi: ĉu en la universitato vi havas kontakton kun revoluciemuloj?”

“Kompreneble, ĉiu estas pli malpli revoluciema en la universitato. Kial?”

“Se vi povus informiĝi pri kelkaj delikataj punktoj ...”

“He! Atentu! Mi ne estas perfidulo, nek polica informanto!” la junulo digne vortis.

“Ne temas pri perfido aŭ konstanta informado. Tamen junulo revoluciema mortis, verŝajne murdita. Ĉu vi trovus justa, ke la kulpulo promenu libere kaj eventuale rekomencu? Mi ne petas vin perfidi iun ajn, sed vi informiĝos multe pli facile ol mi. Ĉu vi hazarde konus iun el ĉi tiuj?” La detektivo enmanigis al li la liston ricevitan de Karina Frisk.

“Petro (blondulo), Georgo, Johana (kun tre longaj jupoj; gingivo tre videbla, kiam ŝi ridetas)

…”, Stefano moke laŭtlegis. “Kiajn petojn vi havas! Mi konas tro da ili: dek blondajn Petrojn,

kvin Georgojn kaj almenaŭ kvar gingivajn Johanajn. Ne, mi troigas. Ĉu la tuta listo estas simila? Ne strange, ke vi bezonas informantojn! Ha, jen unu pli interesa. Adalberto, nekutima nomo. Ĉu tio povus esti Adalberto Vojteĥ, kiu studis marksismon kun mi, kiam mi estis marksisto?”

“Ha, jes, vi estis marksisto siatempe. Kio vi estas nun?”

“Nun? Budhisto.”

Kiel profesie, tiel ideologie Stefano neniam sciis decidiĝi. Tamen, kontraŭe al multaj junuloj, kiuj supraĵe papilias de unu al alia viv-aŭ idekampo, li plurfoje ŝanĝis sian direkton, sed ĉiam aliris kun efektiva seriozo tion, kion li entreprenis. La plumbistan metion li lernis diligente, kaj ankaŭ la marksan ideologion. Se li nun diris, ke li estas budhisto, oni povis fidi, ke li sincere provos fariĝi bona budhisto. Liaj sinsekvaj turniĝoj ja ŝuldiĝis ne al supraĵeco, kiel ofte okazas, sed al speciale intensa entuziasmo por la bona flanko de tiu aŭ alia doktrino, de tiu aŭ alia okupo. ‘Iun tagon li stabiliĝos,’ Ĝoja emis diri al sia edzo, ‘kaj tiam li estos travivinta dekoble pli riĉan kaj spertodonan junecon ol vi kaj mi.’

La junulo plu legis: “Ha! Irena Delafónt! La nomo sonas familiare, sed mi ne memoras la vizaĝon. Almenaŭ ĉi tie estas familia nomo, kiu helpos retrovi ŝin …”

Kion Jano proponis, tio estis, ke Stefano provu ekscii ĉe la membroj de tiu grupo, kion ili opinias pri la morto de Jorli, ĉu ili suspektas iun, ĉu ekzistas ĵaluzo al Paŭlo aŭ kialo lin transsendi mortlanden, ktp.

Stefano unue ŝajnigis sin ne tre inklina akcepti, sed la detektivo facile komprenis, ke la komisio lin tentas, fakte. Efektive, la junulo fine konsentis, konfesante, ke al li plaĉas enketi.

“Ĉu vi scias, kian karieron mi atingos post dek kvin jaroj, kiam mi estos praktikinta dek manajn profesiojn kaj dek cerbajn? Mi fariĝos polica detektivo. Mi tion abomenas nun, sed mi antaŭsentas …” li diris ironie.

Kaj post paŭzeto:

“Tio donas al mi ideon: unue mi lernu la seruristan metion, kaj due mi faru iom da profesia ŝtelo.”

“Hehe!” Karal diris, amuzite, “vi povos utili al la polico. Tamen ... Nun mi havas alian demandon, pri fizika ekzerco. Ĉu vi regule ŝanĝas vian direkton ankaŭ sur tiu kampo?”

“Neregule, eĉ ne tre ofte”, la junulo respondis. “Sed mi tamen apartenis sinsekve al kelkaj sportaj kluboj: futbalo, naĝado, kurado ...”

“Bonege: ankaŭ tie vi povas helpi.” Kaj Jano petis Stefanon viziti atletan klubon, en kiu Paŭlo Jorli ekzercis sin al kurado, por ankaŭ tie kolekti informojn. La junulo promesis fari, kion li povos.

8

Alian personon, kies nomon liveris la paŭla adreslibro, Karal nun decidis vidi. Temis pri iu Georgo Landarte, kiu, laŭ la telefonlibro, estis profesie etnografo. La nomo estis konata de la detektivo, kaj li petis Izabelan, la sekretariinon, serĉi en la polica arkivejo la koncernan dosieron. La raporto, kiun ŝi trovis, montriĝis tre interesa.

Ĝi rilatis al afero okazinta antaŭ kvin jaroj. Knabino mortis renversite de aŭtomobilo, kiu rapide forveturis. Kelkaj personoj priskribis la veturilon per detaloj, kiuj, kunigitaj, kondukis la enketistojn al Landarte. Tiu eskapis el la akuzfakta reto pruvante, ke li tiudate troviĝis en Afriko. Atestantoj asertis, ke ili vidis viron tute similan al li en la urbo, tiel ke la afrika alibio malfermiĝis al dubo, sed ĉar neniam io certa pruviĝis, la afero restis senrezulta. Kelkaj sugestis, ke la konfirmiĝintaj atestoj devenis de mensogkampanjo intence organizita por kompromiti la etnografon, kies maldekstraj opinioj ne plaĉis al ĉiu. Inter la du tezoj – tiu pri nepruvita kulpo, tiu pri nepruvebla kalumni-aranĝo – nek la polico, nek la tribunalo sukcesis elekti: ambaŭ ja formis logikan klarigon de la faktoj.

Legante la dosieron, Jano bone rememoris la pasiajn diskutojn, kiujn vekis tiu kazo. Kelkaj gazetoj tiutempe rigardis la policon nekapabla, ĉar ĝi ne trovis *la* fakton, kiu ĉion solvus.

Kvazaŭ ĉiam ekzistus pruva spuro, oportune metita de la sorto por senvualigi misterojn!

Interesa forgesita detalo retroviĝis en la raportoj: la mortinta knabino havis ensake paperojn de iu politika grupeto, kaj iuj ĵurnalistoj hipotezis, ke temas ne pri akcidento, sed pri maniero forigi rivalon. Al tiuj, kiuj trovis absurda tian konjektadon, ili respondis dirante, ke la anoj de tiuj politikaj rondoj mense malsanas, kaj ke ilia psika misstato kaj konstanta sintoksado per ideoj revolucieskaj povus konduki krimen. Kio eklanĉis furiozan rebaton de aliaj gazetoj, kun la argumento, ke per tiaj akuzoj oni volas kaŝi la amplekson de l' socia maljusto kaj misfamigi tiujn, kiuj batalas kontraŭ ĝi.

Plursemajne daŭris la gazeta milito kaj la varma diskutado ĉe tabloj kafejaj, ĝis alvenis la someraj ferioj kaj la tuta ekscitiĝo ĉesis same subite, kiel ĝi antaŭe naskiĝis. Al la homo, ĉirkaŭ kiu tiu gazeta polemiko turniĝis, Jano Karal nun volis direkti sian atenton.

Li vizitis Landarten en la universitato, kie tiu donis instruon pri la

kulturoj aziaj kaj afrikaj.

Estis altkreska viro, eble 35-jara, longakrura, kun mallarĝaj ŝultroj, senorda nigra hararo montranta jen kaj jen grizan fadenon, kaj pinta barbo, kiu metis sur lin ian mefistofelan sigelon. Io en la malsimetriaj trajtoj akcentis lian egan malbelecon. Sur unu muro, en lia oficejo, du sovaĝulaj lancoj estis fiksitaj; sur alia troviĝis bretaro plena je libroj kaj dokumentoj, kaj sur la tria, speco de primitiva pentraĵo. La tablon kaj apudan mebleton kovris libroj, stenciloj, paperoj, malpuraj tasoj kaj cindrujo, en nekredebla ĥaoso.

Jano komencis demandante pri Jorli, sen mencii la morton, sed la alia tuj interrompis:

“Ha jes! Vi enketas pri la mistera morto.”

“Kiel vi scias? Pro specialaj cirkonstancoj (krom la fakto, ke l' forpasinto ne havas parencojn), ĝi ankoraŭ ne estis publike anoncita.”

“Plej simple. Iu policano anoncis ĝin al Lejla Gorazdo, kiu kun koro ŝirita sciigis al kelkaj geamikoj. Mi renkontis unu, kiu min informis.”

“Kiaj estis viaj rilatoj kun Paŭlo Jorli?”

“Amikaj. Li ĉeestis prelegon, kiun mi prezentis pri ekstremorienta kulturo. Tuj poste, li venis al mi por peti precizigojn. Mi trovis lin simpatia, invitis lin al kafo, kaj de tiam ni renkontiĝis de tempo al tempo.”

“Kia homo li estis?”

“Mi trovis en li reagojn, kiujn mi mem spertis kiel juna viro. Impreson, ke nia industria civilizo nin sufokas, deziron fuĝi el ĝi al pli libera tereno ...”

“Tial vi fariĝis etnografo?”

“Certe. Mi havis la feliĉon povi studi. Al li tio ne estis donita, kvankam li estas pli inteligenta ol multaj.”

“Li est *is*.”

“Pardonu, jes, li estis pli inteligenta. Estas strange paroli is-tempe pri tiu juna viglulo.”

“Li do impresis vin kiel vigla?”

“Fluktuis. Ekscitiĝo kun ega vigleco, kaj poste senkuraĝiĝo, angoro.”

“Ĉu vi opinias, ke li povis mortigi sin?”

“Jes. Mi konstatis, ke vino aŭ brando igis lin fali en abismojn de malĝojo. Lia fundo estis senespera, tute certe. Dum ekscitiĝa periodo, li ne metus finon al sia vivo, li farus ion heroan, gloran, li organizus, riskus, batalus; tia li montris sin al la plej multaj. Sed kun mi li foje esprimis sian fundan deprimiĝon, kaj tiam ... ekskludi sindetruon ne estus prave.”

“Ĉu li havis malamikojn?”

“Verŝajne, sed ne de mi konatajn. Ni estu logikaj. Jen knabo pli bela, korpe kaj vizaĝe, ol la meza kinaktoro, en la aĝo plej alloga. Ĉu tio jam per si mem ne kaŭzos amajn rivalecojn?

Aldonu al tio liajn kuraĝajn politikajn poziciojn. Malamikaro necese rezultos.”

“Tamen, ke li estis kuraĝa politike ne sufiĉas por instigi al murdo.”

“Tion diras vi, sinjoro policano, sed se vi estus travivinta, kion mi spertis, vi scius alion. Oni provis elimini min per sistema kalumniado, kaj kvankam mi estas ŝafide senkulpa, oni parte sukcesis. Multaj ne plu havas kun mi la sennuban rilaton, kiu antaŭe ekzistis. Ombro intermetiĝis: dubo, sinjoro ... Dubigu homojn, kaj la amikoj disiĝas.”

“Ĝuste! Oni povus kalumnii aŭ uzi alian forigan rimedon. Murdo estas malsama afero.”

“Paŭlo eble sciis ion, kio ĝenis. Li scipovis informiĝi. Tiu knabo estis pli ruza ol multaj suspektis.”

“Kiam vi vidis lin lastafoje?”

“Antaŭ pli ol monato, se mi ne eraras. Mi ne memoras ekzakte. Ĉu mi devas retrovi?”

“Ne, tio ne necesos. Ĉu vi scias ion pri lia vivo en la lastaj semajnoj?”

“Nenion. Mi estis for dum kelke da tempo.”

“Bone, mi dankas. Mi nun foriros. Se vi pensos pri io utila, kion vi preterlasis hodiaŭ, rilatu kun mi: Jano Karal, ĉe polica ĉefoficejo.”

9

Ĝoja refermis la bakujon.

“Post kvin minutoj ĝi estos preta”, ŝi diris, kaj tuj levis la kapon.

Ŝia edzo staris en la kuirejo kun plena glaso enmane, kaj rigardis ŝin ridetante.

“Vere vi min mirigas”, ŝi diris. “Mi kredus, ke la manko de tiu toksologia raporto vin ĉagrenus aŭ igus nervoza. Sed jen vi staras tute kvieta, kvazaŭ vi ĝuus la situacion.”

“Ĝi estas ĝuebla precize tial, ke la raporto ankoraŭ ne alvenis. Kiam mi scios, mia horizonto estos limigita. Sed nun mi povas fantazii ion ajn. Tio donas al mi senton de libero, kiun mi vere ŝatas.”

“Sed vi ne povas rezoni serioze, dum vi ne scias pri l' veneno.”

“Mi do rezonas neserioze, kaj vi ne imagus, kiom tio helpas. Estas aperitivo, antaŭfrando.

Kiam mi scios pri la veneno – se entute temas pri veneno – la ĉefmanĝaĵo komenciĝos. Ĉi tiu antaŭludo min ravas.”

“Ĉu vi jam suspektas iun?”

“Ĉiujn, escepte de la amatino. Ŝi aŭtente priploris lin, mi pri tio ĵurus. Sed mi suspektas mian emon ne suspekti ŝin. Finfine, ŝi havas teatran temperamenton. Eble ŝi nur rolis plorantinon.”

“Sed kial ŝi mortigus lin?”

“Mi ne scias. Povus esti, ke li intencis ŝin forlasi. Li jam faris tion antaŭe. Ŝi preferis perdi lin propramane ol senti sin pasive forĵetita.”

“Kaj kion pri la ceteraj?”

“La apotekistino povas pagigi al li la fakton, ke li metis ŝin flanken. Ŝi okupas strategian lokon por veneni, ĉu ne?, kun tia profesio.”

“Kaj la kuracisto?”

“Ankaŭ al li estus oportune. Ĉi-kaze mi ne vidas motivon, sed estas facile imagi. Eble lia edzino fojfoje samlitis kun la bela kliento ...”

“Ankaŭ la etnografon vi suspektas?”

“Jes ja, devige. Li jam estis implikita en stranga afero kun knabino revoluciema. Povus kuŝi politika motivo ĉi tie. Sed se tio ne sufiĉas, mi trovos alian por vi: envion. Li estas terure malbela, kun nigraj kaj flavaj dentoj, sulkoj neplaĉe lokitaj, misforma nazo. Li ŝajnas ankaŭ

ne tre sana mense, laŭ la maniero sin teni. Li estas fraŭlo. Eble lia neplaĉa vizaĝo faris, ke li neniam sukcesis allogi virinon. Ĉu tio ne vekus murdan malamon kontraŭ belulo kiel Paŭlo?”

“Valdunjan almenaŭ vi metas eksterlisten?”

“Tute ne! La edzino sekrete nutris amflamon al Paŭlo. Li vidis lin ĉiutage. Ili kune tagmanĝis laborloke. Plie, li ne simpatiis kun la politikaj ideoj de l' belulo ...”

“Via talento suspekti ĉiun min timigas. Espereble vi ne suspektas min.”

“Vin? Donu al mi unu minuton, kaj mi trovos. Ĝenas la fakto, ke vi ne konis lin. Sed eble vi lin konis ...”

“Tamen, sen motivo ...”

“Vi, sen motivo? Vi estas psikologino, ĉu ne? Eble vi dezirus science analizi tion, kion travivas murdanto. Kaj mi ne estas apolone bela. Eble vi renkontis Paŭlon, kaj lia beleco naskis en vi sentojn, kiuj vin timigas, ĉar vi deziras resti fidela. Por forigi la tenton, oni forigas la tentanton ...”

“Jano! Kia sadisma imago! Kiel vi povas ...?” Ŝi sciis, ke estas nur ludo, kaj tamen io preskaŭ

timis en ŝi. Li tion sentis kaj tuj agis kurace: pasie li ŝin kisis.

“Mi vin amas. Pardonu min! Kian ideon vi havis, edziniĝi al aĉa policano!”

La rimedo estis ĝusta. Tian kison neniu suspektanto povus doni. Ŝi nun sciis, ke estis nur ŝerco. Ŝia koro malpeziĝis. ‘Kia infana reago!’, ŝi pensis. ‘Ĉu mi ne fidus mian Janon?’ Sed estus tiel abomene, se li suspektus ŝin ...

10

“Saluton, Izabela”, Jano Karal ridetante diris al la polica sekretariino. “Ankoraŭ nenio de la toksologaj moŝtoj?”

“Nenio. La trovita substanco estas afero tute nekonata ĉi tie. Neniu povis ĝin firme identigi nialande. Ili do sendis la specimenon al la Internacia Referenca Centro pri Vegetalaj Venenoj.

Sed tiuj aranĝoj ne funkcias kun ega rapideco.”

“Bone.”

Tiu vorto ne estis pura aŭtomata eldiro: ĝi esprimis la animstaton de l' detektivo, kiu ne malŝatis la pluan prokraston.

“Kaj ĉu vi trovis pri la ĉinkuira kurso?”

Ŝi donis al li folion.

“Jen mi tajpis ĉion: organizantojn, lokon, datojn, kursgvidanton, liston de gelernantoj kun koncizaj faktoj pri ĉiu.”

“Dankon, Izabela. Mi min demandas, kiel la polico povis funkcii, antaŭ ol dungi virinojn. Vi estas nemalhavebla.”

Li iris al sia oficejo kaj atente konsideris la tajpaĵon. La fakton, ke la (eble) mortiga substanco estis tiel stranga, povus klarigi importado el Ekstremoriento, kio instigis scii pli pri la koncerna kurso, des pli notinda, ke verŝajne la junulo mortis nelonge post partopreno en ĝi.

Gvidis la kurson iu s-ro Ljaŭ Fengguo, singapura ĉino alveninta kiel infaneto en Sanktavalon, kie lia patro malfermis la unuan ĉinan restoracion de la regiono. La listo enhavis du virojn (inkluzive de Jorli) kaj kvar virinojn; inter ĉi-lastaj Jano mire rimarkis la mencion: Elsa Gutmanis, 43-jara, edzino de korkuracisto, 3 Muzea Placo.

Li decidis komenci de la komenco, kaj provis renkonti la kursgvidanton. Bedaŭrinde, tiu estis nek hejme, nek en sia restoracio. Jano do transiris al la sekvanta nomo.

Estis la alia viro: Sergjo Agister, 41-jara, gimnastika instruisto, respondeculo pri korpa edukado en Belfonta Mezlernejo.

Surprizite, ke gimnastika instruisto sekvas kurson pri kuirarto, Jano

direktis sin al la donita adreso. Li tintigis la pordan sonorileton.

Malfermis la pordon atlete kunmetita viro, kiu, strange, donis al Jano impreson de jam-konato, kvankam la detektivo ne dubis, ke li neniam renkontis lin antaŭe. Sergjo Agister havis kvadratan kapon kun forta makzelo kaj vizaĝo regultrajta, kies sunbruna haŭto impresis scivolige, kvazaŭ iel la koloro ne estus tute natura. Li surhavis baletan pantalonon kaj blankan torsoveston, kiuj tiel strikte gluiĝis al la korpo, ke ĉiuj detaloj de ties reliefo tute klare videblis.

La detektivo klarigis, ke li anas al la polico, kaj kadre de enketo ŝatus informojn pri la kurso de ĉina kuirarto.

La viro afable respondis, per iom naza voĉo, kaj la veninton gvidis salonen.

Enirante, Karal preskaŭ ekkredis, ke li sonĝas, tiel malmulte li atendis la nun vidatan spektaĵon. La salono estis meblita kun delikata gusto per moderna meblaro sendube multekosta. Verdaj plantoj ĝin ornamis laŭ estetike tre plaĉa aranĝo. Inter ili japana eta pino, kun branĉoj admirige torditaj al belega konturo, tuj kaptis la okulon. Sed ne tio mirigis la detektivon, kiom la muroj. Sur unu, apudfenestra, li vidis longan-altan afiŝon: grandigitan foton de l' Davido mikelanĝela; sur la dua vastegan spegulon; kaj sur la tria grandan foton de lia nuna gastiganto, 20 jarojn pli juna, vestita, se escepti etan kalsoneton, nur de impresa muskolaro.

Tio per si mem ne estis ordinara. Tamen la granda surprizo troviĝis sur la kvara muro. Ĝi igis klara la kialon de l' jamkona impreso, kiu tiklis Janon tuj ĉesojle. Estis denove grandskala afiŝo, sed ĉifoje komerca: reklamo por konata bankalsono, ĝi konsistis el kolorfoto de atleta juna viro, sunbrunigita, ridete montranta vicon da belegaj dentoj, sur fono de blua ĉielo, blua blankŝaŭma onda maro, kaj kelkaj palmoj. Ĉielangule belliteris la nomo “Palmarea”, marko

de l' bankalsono. Tiun afiŝon siatempe oni vidis en la tuta mondo, kiam la fama firmao lanĉis la modon de tiuformaj kalsonoj. La juna fotito evidente estis Sergjo Agister.

“Bela, ĉu ne?” La naza voĉo efikis rekonsciige al Jano, kiu kvazaŭ perdiĝis en kontemplado dum kelkaj sekundoj. “Tiu afiŝo valoras oron. Ĝi signis la komencon de mondona kariero.

Sidiĝu, mi petas.”

Karal eksidis, sin demandante, kian efikon povas havi sur homon la

fakto vivi inter granda spegulo kaj du grandaj fotoj de sia korpo. Li devos peti la fakan opinion de Ĝoja.

“Vi do vizitadas kurson pri ĉina kuirarto?” li demandis.

“Jes. Kion ekzakte vi volas scii pri ĝi?”

“Mi klarigos pli poste; verŝajne plej helpos min unue, ke ni simple babilu pri ĝi.”

“Je via dispono.”

“Ĉu de longe vi tien iradas?”

“Ekde la komenco, en oktobro pasintjara.”

“Kial vi aliĝis?”

“Nu, mi ŝatas bone manĝi, sed miaaĝe necesas tre atenti, kion oni enbuŝigas, se oni volas ne tro dikiĝi. Por mi tre gravas resti en bona fizika formo, konservi belan figuron. Mi aŭdis, ke la ĉina maniero kuiri tre taŭgas por mi. Mi volis provi mem.”

“Ĉu vi kontentas pri la kurso?”

“Tute, la kursgvidanto vere estas bona pedagogo, kaj li perfekte konas sian fakon.”

“Ĉino?”

“Laŭdevene, sed li parolas kiel vi kaj mi. Mi pensas, ke li naskiĝis ĉi tie.”

“Ĉu vi manĝas, kion vi preparas dumkurse?”

“Jes, sed ne ĉiuj ĉiufoje restas por la manĝo.”

“Ĉu ĉiuj ĉeestas regule?”

“Neregule, sed preskaŭ. Ne estas vere laŭgrada kurso. Ne gravas, se oni unu fojon forestis.”

“Kiuj estas viaj kunlernantoj?”

“Estas iu junulo, tre simpatia, iom pli ol dudekjara, kaj kelkaj virinoj, mi ne scias kiom, eble kvar aŭ kvin.”

“Kiaj ili estas?”

“Pri la virinoj mi ne povas diri multe. Malprecizan bildon mi havas. Inoj seninteresaj. Sed la knabo estas vere alloga: juna, bela, inteligenta.”

“Ĉu vi konas lin bone?”

“Ne malbone. Ni amikiĝis. Mi invitis lin plurfoje. Mi eĉ pagis al li ferian restadon en Kastelomara.”

“Kastelomara? Tio estas tre luksa, multekosta restadejo.”

“Efektive, sed mi perlaboras multe da mono, kaj ...”

“Kiel korpa edukisto?”

“Ne, kiel moda modelo. Mi pozas por modaj katalogoj. Tio estas tre bone pagata. Kaj mi faris fruktodonajn investojn, per la sumego, kiun mi tiris de Palmarea.”

“Vi estas ege donema: pagi restadon ĉe-maran por junulo, kiun vi ne konis antaŭ kelkaj monatoj.”

“Ĉu mi estas donema? Eble jes. Mi sentis, kiel diri?, intereson por tiu junulo. Kompatinda knabo! Ĉiam havis malvastan horizonton, reduktitan vivon. Eĉ liaj ideoj estas mizeraj. Li estas kontraŭburĝa. Mi diris al li: ‘Vi kritikas la burĝojn, sed ĉu vi konas ilin? Venu kun mi, vidu, kiel ili fakte vivas. Vi lernos multegon, kaj samtempe vi ripozos en plaĉa kadro.’ Li ŝajnis tre feliĉa, ke mi sugestis tiun ideon.”

Agister okulumis signife.

“Ĉu komence li ne konsentis?”

“Mi tuj sentis, ke mia propono plaĉas al li, sed li ne povis ne rifuzi, pro siaj ideoj. Mi reproponis plurfoje. Finfine, kiam mi prezentis tiun argumenton, li sentis sin kvazaŭ morale rajtigita.”

“Li do estas maldekstrema?”

“Ho jes! Porrevolucia, vi scias. Sed kiam mi sentis la deziron fari el li mian ... mian protektaton, mi decidis, ke mi helpos lin savi sin el tiu idearo, en kiu li estas kaptita, fakte. Mi ne atakas fronte. Nur iom post iom, jen unu frazo, jen alia ... Mi sukcesos finfine, ĉar liaj konvinkoj ne havas veran profundon, kaj li neniam havis okazon diskuti kun tia persono, kia mi. Mian influon oni ne repuŝas tiel facile, kiel la

argumentojn de la ekstrema dekstro, kies nivelo estas plorinde malalta. Lasu al mi sufiĉe da tempo, kaj mi tiros tiun junulon el lia medio kaj detruaj ideoj. Li havas estetikulan perceptivon, li estas inteligenta, interesiĝas pri multo. Lia konversacio min ege stimulas. Estus domaĝe, se li restus kaptita de tiuj pseŭdo-justuloj."

"Kiam vi vidis lin lastfoje?"

Sergjo Agister kuntiris la brovojn.

"Pro kio la demando? Ĉu pri li aŭ pri la kurso vi volis informiĝi?"

"Pri la kurso, certe, sed ankaŭ – ĉefe – pri li."

"Ĉu li malaperis? Faris ion fuŝan?"

Oni sentis, ke li parolas pli singarde. Li aldonis, malrapide, kvazaŭ li bezonus tempon por samtempe pripensi kaj paroli:

"Se li bezonus advokaton, mi pretus pagi por li, ke li havu la plej bonan."

"Vi vere emas elspezi multe por li."

La atleto reagis kun neatendite kompleta sincereco. Jano sentis, ke post mallonga interna konsiliĝo, Agister decidis rezigni je mensogo, kiel tro komplika, senefika solvo.

"Mi amas lin", li diris simple.

Pasis momento da silento, post kiu li demandis:

"Ĉu vi kompleze klarigos, kial vi interesiĝas pri Paŭlo? Mi komprenas, ke polico devas observi diskretecon enketante, sed scivolemo tiel arde min tenas ... Sendube, mi rajtas ricevi klarigon."

"Estas malfacile diri", Jano komencis serioztone.

La alia du-, trifoje kunstreĉis la makzelojn. Lia teniĝo ŝanĝiĝis: impresis, kvazaŭ lia korpo fariĝus pli densa, prepare al bato aŭ lukto. Verŝajne li jam intuis la veron. Li diris nur:

"Jes?"

"Paŭlo Jorli mortis", respondis la detektivo.

Esprimo de intensa sufero pasis tra la vizaĝo de l' gimnasto. Lia spiro

haltis momenton, post kiu lia tuta korpo subite malstreĉiĝis. Li mallevis la kapon.

“Paŭlo!” li voĉis obtuze.

Li rigardis Janon kun ombro da hezito, kaj poste ekstaris kun mieno decidoplena. Videble, tiu mistera io, en la personeco de Karal, kiu faciligis konfidencojn, refoje ĵus agis. Sergjo Agister iris al apuda meblo, prenis el tirkesto foton, kaj ĝin pasigis al la policano dirante:

“Ĉu tian belon vi iam vidis?”

La detektivo jam havis kelkajn surprizojn en tiu ĉi apartamento: la murajn afiŝojn, la rivelon pri Kastelomara, la strangan personecon de Agister. Sed plia surprizo lin atendis: sur ĉi tiu foto, Paŭlo Jorli estis tute nuda!

La foto estis rimarkinde bona. La knabo staris kun la piedoj en la maro, kun rava rideto, ne malsimila al tiu de la reklama afiŝo. La angulo, laŭ kiu lin trafis la suna lumo, estis perfekte

kalkulita por akcenti lian korpan belecon kaj emfazi la ĝojradiadon de l' vizaĝo, dum vento flirtigis liajn harojn kun efekto plej arta.

“Mi estas bela vire,” senpudore diris la atleto, “sed li belis anĝele. Ĉu vi komprenas?”

Jano bone komprenis. Eĉ dudekjara – se juĝi laŭ la surmura foto – Sergjo Agister havis ion pezan, eble tro da muskoloj, aŭ tro harde ĉizitan vizaĝon, dum en la regulaj trajtoj de Paŭlo troviĝis io infane pura, kio povus vibrigi kordon eĉ en normala viro, kiel bela ĉevalido povas veki tenerecon tute sendepende de sento aŭ sekso.

Fakte la detektivo ne havis tempon halti ĉe tiaj estetikaj konsideroj. Lin ja trafulmadis deko da demandoj. Ke Agister estas samseksema, tion li ne dubis de la unua vido. Sed kion ĉi tiu foto signifas koncerne Paŭlon? Ĝi ne povus ekzisti sen ties konsento, tute certe. Kiel do koherigi tiun ĉi sintenon kun ĉio alia sciata pri li? Ĉu tiu korpeduka riĉulo “konvertis” lin al samseksemula praktiko? Se jes, kiel Paŭlo repacigis tion kun sia ligiteco al Lejla? Ĉu la disŝiro inter du eblaj vivoj – lukso, rafinita konversacio kaj samseksema plezuro unuflanke; politika lukto, virino ne tre klera, laborista vivo aliflanke – lin turmentis tiagrade, ke li ne sciis, kiel elturni sin, krom sinmurde? Aŭ ĉu Lejla malkovris lian ŝanĝiĝon kaj mortigis lin pro perfido?

Li demandis:

“Ĉu li volonte lasis sin foti nuda?”

“Fakte, jes. Mi povas esti tre konvinka, sed ŝajnas al mi, ke li facile akceptis eĉ sen mia konvinkopovo. Mi sugestis al li, ke vestoj simbolas la premon de la socia vivo, kiu sufokas, ke nudeco esprimas liberecon, kaj tio tuj trafis lin. Li ja sciis, kiom li belas.”

“Ĉu vi kuŝis kun li?” Janon surprizis la propra voĉo. Li ne tute konscie intencis tion demandi, almenaŭ tiel rekte, sed multo dependis de tiu punkto, kaj, ial, li fidis la sinceron de l'

kunparolanto.

“Ne”, respondis ĉi-lasta. “Estis tro frue. Mi esperis, ke iom post iom ...”

Karal ne dubis, ke li respondis la veron. Li demandis, montrante la foton:

“Estis en Kastelomara, ĉu ne?”

“Estis tie, jes. Vi ne imagus la ĝojon de tiu junulo. Nova mondo malfermiĝis al li, kies ekziston li eĉ ne suspektis. Li iĝis pri tio kvazaŭ ebria. Mi ĝojis pro lia ĝojo. Via sciigo estis terura bato por mi, sinjoro. Ĉu mi rajtas demandi, kia morto lin trafis?”

“Ni ankoraŭ ne scias ekzakte. Eble akcidento, eble sinmortigo, eble murdo. Vi, kiu lin konis, elektus kion?”

“Mi unue pensis: nur akcidento eblas, sed evidente tio esprimas mian deziron, ne la veron faktan. Sinmortigo? Li amegis la vivon, sed kiu scias ... tia delikata animo ... Kaj ekskludi murdon mi ankaŭ ne povus. Ĉu vi ne kolektis faktojn determinajn?”

Jano kapneis, kaj revenis al nerespondita demando:

“Kiam vi vidis lin lastfoje?”

“Merkredon, ĉe la kuirarta kurso.”

“Je kioma horo vi disiĝis?”

“Je la oka kaj duono proksimume. La kurso daŭras de la sepa ĝis la oka, sed oni neniam respektas la horojn. Ĝi komenciĝis iom malfrue lastan fojon, kaj poste mi babilis kelktempe kun Paŭlo.”

“Kia li estis tiam?”

“Tute normala. Ne deprimita, se vi tion celas. Ne, li estis gaja, iom ekscitita. Mi invitis lin al glaseto, sed li volis tuj reiri hejmen, ĉar li sentis sin laca, ne sufiĉe dormis la antaŭan nokton.

Tiuvespere li ne aspektis kiel memmortigonto.”

“Kion vi kurse lernis fari?”

“Ni preparis supon el kokida buljono kun spinacoj kaj ŝinko, buloj el salikokoj kaj porkaĵo kun askalono, kaj frititan rizon kun malforta paprikofrukto, vi scias, ne la eta pimenta, sed la verda sonorilforma.”

“Ĉu vi tion manĝis?”

“Jes, kiel kutime.”

“Ĉu vi scias, kial Paŭlo Jorli aliĝis al tiu kurso?”

“Jes, li diris al mi. Li adoris ĉion ĉinan: la pensojn de Prezidento Maŭ, la neekziston de riĉuloj en Ĉinio, la Grandan Proletaran Revolucion, ktp, kaj de tie lia intereso vastiĝis al kulturo kaj manĝo. Kiam li mortis, se mi rajtas demandi?”

“Mi preferas ne diri, dum la enketo daŭras.”

“Jes, mi komprenas. Alibioj, kaj tiel plu ... Nu, mi estas je via dispono.”

11

La pordo, sur kiu malnova flaviĝinta karto anoncis: “Marta Bolomaj, kudristino” malfermiĝis ne pli ol dek centimetrojn: ĉeneto malhelpis pluan movon. Longa nazo, surrajdata de okulvitroj, sub disa tufaro da grizblankaj haroj, aperis en la interspaco, dum la malfermantino staris en tia klina pozicio, ke ŝajnis, kvazaŭ ŝi ne havus korpon: nur la kapo vidiĝis.

“Kion vi volas? Kiu vi estas?” diris akuta voĉo, malfide.

“Polico”, respondis detektivo Karal.

“Vian pruvilon, mi petas”, estis la reago.

Jano ĝin montris. Nur post longa suspektokula rigardado, ŝi malfiksis la ĉeneton kaj lasis lin eniri. La malriĉa loĝejo plenis je aĵetoj – ornamaj, memorigaj – kaj malnovaj familiaj fotoj.

Ŝi indikis al li seĝon apud la kuireja tablo, kaj proponis:

“Ĉu tason da kafo?”

“Volonte”, diris Jano, surprizita, ke ŝia suspektemo ŝanĝiĝis al sinteno gastama.

La maljunulino surhavis ne tre puran antaŭtukon, sur malnovmoda nigra robo. Iel, ŝia sulkoplena vizaĝo impresis komike, eble pro ŝia maniero rigardi super la okulvitroj, lokitaj malalte sur la nazo. Ŝi verŝis al Jano tason da kafo, kaj same al si, post kio ŝi rigardis lin fikse, senvorte, kun atenda mieno.

“Kadre de enketo, mi bezonas informojn pri kurso de ĉina kuirarto. Mi pensis, ke neniu ilin pli ĝuste donos ol persono viaaĝa, kiu bone konas la vivon kaj scias observi ...”

“Flanklasu la flaton, amiketo, kaj la tutan ĉirkaŭan sukeraĵon”, ŝi interrompis. “Mi ĝojas, ke la polico fine okupiĝos pri seriozaj aferoj.”

“Kiuj seriozaj aferoj?”

Ŝi alprenis mallaŭtan voĉon, kvazaŭ iu riskus ilin aŭdi:

“La komploto, ĉu ne? Vi fine akceptis mian konkludon: komploto.”

“Kiu komploto?”

“Vi scias, ĉu ne? Mi jam sufiĉe rakontis al viaj kolegoj. Mi nun havas certecon: ili komplotas.”

“Kiuj?”

“*Ili*, kompreneble. Ĉiuj kune. Ĉinoj, marksistoj, jezuitoj, framasonoj … Tial mi iras al la kurso. Krom pro la fakto, ke mi tre ŝatas bonmanĝi.”

Jano Karal komencis amuziĝi. Laŭ la donitaĵoj de Izabela, f-ino Bolomaj aĝis 79 jarojn. La simpla fakto, ke tiaaĝulino sekvas kurson de kuirarto jam estis neordinara. Nun montriĝis, ke ŝi suferas de persekutiĝa manio aŭ io simila. Tio per si mem ne estas speciale ĝojiga, sed ŝiaj vizaĝesprimoj kaj ŝanĝoj de voĉo vere komikis, tiagrade, ke kelkmomente Karal sin demandis, ĉu ĉio ĉi ne estas humura moko al li.

“Kaj kiucele ili komplotas?” li demandis.

“Por renversi la socion, kapti la povon, ekspluati la simplulojn … kiel mi scius? Sed mi aŭdas ilin.”

“Kiujn precize?”

“La du virojn, ekzemple. Ili oftege parolas pri revoluci'. Unu stas malpli singarda ol la alia, kaj li tro laŭtas pro ekscitiĝo. La juna kun bela vizaĝo. Mi aŭdis lin plurfoje: ‘Ni devas fajrigi tiun putrintan socion,’ li diras, ‘bruligi ĝin ĝisfunde, kaj rekomenci de nulo.’ La alia – tiu granda fortika specimeno – videble konsentas kun li, sed li ĉiam parolas flustre, kaj mi neniam sukcesis lin aŭdi. Li ĉiam troviĝas ĉeflanke de l' junulo, kaj ĵetas ĉirkaŭ si singardajn okulojn, pro timi, ke oni kaptos lin ĉe l' freŝa far' …”

‘Pure sanktavala,’ pensis Karal, kiu ĉiam konsideris, ke la parolmaniero rivelas pri persono multon utilan. Ĉi-kaze, li pretus ĵuri, ke Marta Bolomaj pasigis sian tutan vivon en Valĉefa, almenaŭ sian infanecon: la vorto *sti* anstataŭ *esti*, la frazmelodio, la neakademia uzo de prepozicia infinitivo, kaj la eliziado, laŭ la fama regulo de l' sanktavalaj lernejoj: “nek tro, nek maltro: por kleri kaj klari, ĝin uzi kaj ŝpari” ,* ĉio ĉi signis apartenon al la valĉefa popolo.

Krome, la fakto, ke ŝi tipe mallongigis la tabelvortojn (ŝi diris preskaŭ *kju*, *kjo*, *ĉjam*, *tje*) kaj prononcis trene kelkajn vokalojn, perfidis vivon en Transtjaza kvartalo.

Post paŭzeto, ŝi daŭrigis:

“Kaj ne forgesu, ke la kurson gvidas ĉino, aŭtenta ĉino,” ŝi okulumis signife, “kiun mi ankaŭ

vidis murmuradi kun ili, ĵetante al mi avertajn rigardojn, kvazaŭ ili dirus: ‘atentu la antikvulinon, ŝi suspektas nin, aŭ ŝi jam malkovris’.”

“Ĉu vi efektive malkovris ion?”

“Ili provis min veneni.”

“Kion?”

“Jes. Ni lernis prepari saŭcon per sojolikvaĵo, vino, fekulo ktp. Vi scias, oni pecetigas viandon kaj ĝin lasas en tiu kelkhore, se eblas. Nu, dum momento, kiam mi rigardis al la ĉin', mi vidis tiun junulon ŝuti kuleron da mi-ne-scias-kia pulvoro en mian saŭcon, samtempe okulumante al la kamarado kaj direktante al li sian humuran rideton! Humuro! Nigra humuro de detruemul' mi tion nomas. Ili mokas min, ĉar mi ne manĝas la komunan manĝon, nur tion, kion preparis mi mem. Ke mi vidas lin, li ne konsciis, pro miaj okulvitroj. La okulisto ĉiam diradas, ke mi havas nenormale larĝan vidkampon. ‘Utile, utile’, mi diras al li; utile, kiam fuŝuloj volas vin atenci. Nebezone diri, ke serĉe al pruvo, mi ... hehe ... mi ... hehehe ... mi

‘mallerte’ renversis la saŭcon, samtempe rigardante tre atente la anĝelvizaĝon. Nu, ne povas esti dubo, ties mieno montris, ke diskrevis lia esper'. Mi eĉ pensas, kvankam mi ne estas tute certa, ke li kubutis al la kunulo, dum li kape montretis al mi.”

“Sed kial ili malbonvolus al vi?”

“Kial? Ne naivu, frateto. Ĉar mi scias. Ĉar mi suspektas. Kaj nun mi eĉ pli timos, tial ke eble ili kontrolas miajn vizitojn, kaj scios, ke policano ĉi tien venis. Ili pensos, ke mi rakontis, kaj mi fariĝos por ili danĝer'. Dio! Vi devos organizi gardadon por mi ...”

“Kaj kion pri la aliaj lernantoj? Kiuj ili estas?”

“La aliaj? Unu eble 40-jara virino, kaj du pli junaj, kiuj venas kaj sidas ĉiam kune. Estus malfacile scii, ĉu ili partoprenas la komploton. La 40-printempa – edzin' de kuracisto, mi aŭdis – neniam manĝas, kion ni preparis. Ŝi eĉ ne lekas al si la fingrojn. Strange, ĉu ne? Por

kio do ŝi venas, se la bongustaĵoj ne interesas ŝin? Stas vere, ke la bela

anĝel' ŝin allogas.

Kiam li alparolas ŝin, ŝiaj okuloj alprenas esprimon kiel ... kiel cervin' ĉe akvo freŝa.”

“Ĉu vi iris al la kurso pasintan merkredon?”

“Tute certe. Mi neniam forrestis.”

“Ĉu ĉiuj ĉeestis?”

“La du viroj, sen ia dubo. Ankaŭ la kuracistedzino. Nun pri la du amikinoj? Ne. Se unu stus sen la alia, mi tion rimarkus, kaj ankaŭ se ambaŭ ĉeestus. Do, tiuj du ne venis.”

“Ĉu vere neniam okazis, ke vi ne iris al la kurso? Je via aĝo, tamen devas esti problemo kelkfoje.”

“Kia stranga policano vi estas! Ĉu vi ne scias, ke la kurso okazas en la apuda dom'? Tiel ke mi nur devas desupri, kaj fari ne pli ol du paŝojn trotuare, puŝi pordon, kaj jen mi estas. Tre oportune por mi. Ĉiaokaze, mi ĝuas bonegan sanon.”

“Kaj la aliaj? Ĉu ankaŭ ili estas sanaj?”

“Fizike ili stas tute normalaj, kiom mi povas juĝi. Sed la knabo ofte ekscitiĝas. Ĉu tio stas saneco, vi decidu mem.”

“Tiuj du, ĉu ili aspektis malĝoje aŭ deprimite pasintan merkredon?”

“Absolute ne. Ili ridis kaj gajis kune, kvankam kiel ilia konscienco tion ebligas, mi diri ne povas, se konsideri iliajn fiajn intencojn rilate al mi ...”

“Ĉu tiu afero pri la pulvoro en saŭcon okazis pasintfoje?”

“Jes, sinjor' policano, ne pli frue ol merkredon. Ĉu vi imagas mian angoron?”

“Kial vi ne denuncis ilin al la polico?”

Ŝi rigardis lin nekomprene.

“Sed mi tion faris! Kial do vi estus tie ĉi, se ne pro tio? Mi tuj iris en la kvartalan policejon al serĝento Delaĉár.”

Jano ridetis embarase, serĉante, kion diri. Antaŭ ol li trovis

respondon, ŝi jam reparolis:

“Ŝajnas al mi, bubeto, ke vi stas stranga policano. Montru al mi refoje vian pruvilon, aŭ mi tuj telefonos al la policejo.”

La detektivo montris ĝin, sed ŝia komika vizaĝo fermiĝis: evidente, ŝi suspektis plu. Ŝi zorge notis lian nomon sur papero kaj diris, ke ŝi nun havas laboron por fari. Se la sinjor' policano bonvolos eliri ...

Ŝin forlasinte, li rapidis al la najbara policejo, kiu troviĝis tute proksime. Kiam li eniris, li vidis, ke la serĝento telefonas. Ĉi-lasta bone konis la detektivon. Vidante Janon eniri, li tuj mangestis, ke tiu proksimiĝu. Aŭdiĝis la voĉo de l' serĝento:

“Jano Karal? Jes, mi certigas al vi, ke li estas ano de la polico. Detektivo ĉe la Centra Oficejo.

Kion? Momenton, mi petas, mi devas respondi je la alia telefono. Restu ĉee, mi tuj reparolos.”

Li metis la manon sur la mikrofonan parton de la aparato, kaj mallaŭte diris al Jano:

“Estas tiu maljuna frenezulino Marta Bolomaj. Mi komprenas nenion el ŝia diro. Ĉu vi estis ĉe ŝi?”

Karal kapjesis.

“Bone, kion mi devas diri al ŝi? Ke ni komunikis ŝian plendon al la Centra kaj ili vin sendis por enketi?”

Ĉe kapjeso de Karal, la serĝento reparolis en la telefonon:

“Mi konfirmas, kara fraŭlino, detektivo Jano Karal estis oficiale sendita al vi kadre de enketo, kiu rilatas al via plendo ... Mi petas pardonon? ... Ne! ... Moŝta fraŭlino, bonvolu ... La polico devas sekvi regulojn ... Estas tuta organizo por ... Ĝis alia fojo, fraŭlino!”

Li levis la kapon al Jano.

“Kia fenomeno!” li diris. “Ĉiun duan aŭ trian semajnon ŝi venas plendi, ke tiu aŭ alia ulo ŝin persekutas kaj volis ŝin mortigi. Aŭ estas plendo kontraŭ la junuloj, la politikaj partioj, kion ajn vi volas.”

“Mensmalsana?”

“Kiel multaj je ŝia aĝo. Krom tiuj ideoj de persekutiĝo, ŝi estas sana kaj

normala. Tial ni jesas al ŝi kaj lasas ŝin trankvile vivi. Se vi volas mian opinion: ĉar ŝia vivo fakte estas tute malplena, zorgi pri fantaziaj komplotoj okupas ŝiajn tagojn, jen ŝia problemo. Kvankam verdire ...”

Li subite haltis.

“Kion vi volis diri?” scivolis Jano.

“Ho, mi ĵus pensis, ke mia teorio ne taŭgas. Ŝi ja havas ion alian por okupi sian tempon: ŝi kartodivenas.”

“Ĉu vere?”

“Jes. Kaj vi ne imagus, kiom da personoj iras ŝin konsulti! Eĉ tute inteligentaj civitanoj, bone konataj en la urbo. Vere, oni sin demandas, kien evoluas la mondo. Ekzemple Oljo, la aktoro, ŝin konsultas. Ankaŭ Ervin, vi scias, la riĉulo, kiu posedas la Gigant-magazenon! Prezentu

tion al vi! Homo, kiu studis en universitato. Kaj oni eĉ diris al mi, ke ŝin vizitas ankaŭ

profesoro Birnbaŭm, kvankam tion mi ne scias proprascie, kaj konfirmi ne povus.”

“Kiel la klientoj ekkonas ŝin?”

“Multo diriĝas de unu al alia, supozeble. Sed ŝi ankaŭ metis anoncojn en la gazetojn. Kiam ŝi ne plu vidis sufiĉe bone por kudri, ŝi lanĉis sin en tiun kartoaferon, kaj ŝi bone sukcesis, kun sia komika vizaĝo. De tempo al tempo, se ŝi bezonas monon, ŝi presigas anoncojn por multigi la konsultantojn. Unu tia aperis antaŭ kelkaj tagoj en *Tribún*. Mi vidis ĝin.”

‘Nekohera personeco’, diris al si Jano, kiam, dankinte la serĝenton, li retroviĝis surstrate. ‘Ŝi suspektas la plej oficialan policanon, vidas komplotojn ĉie, sed akceptas klientojn, kiuj venas al ŝi tute nekonataj, nur post gazeta anonco.’

12

‘Kiom malsame homoj aranĝas sian hejman etoson!’ diris al si la detektivo, sekvante s-inon Gutmanis en ties salonon, kaj ĝin mense komparante kun la serio da lokoj, kien la enketo lin kondukis: ĉe la ge-Valdunjaj, simpla malnova malkara meblaro; ĉe s-ro Landarte, ĥaoso da paperoj; ĉe s-ro Agister, rafinita, iom japaneska moderna aranĝo kun gigantaj virfotoj; ĉe fino Bolomaj, eta-eta loĝejo plenŝtopita per senkarakteraj mebloj, ornamaj objektaĉoj kaj familiaj fotoj senorde flaviĝintaj; ĉi tie, belguste aranĝita salono, tre vasta, kun grandiozaj kurtenoj, du-tri valoraj pentraĵoj kaj videble multekosta aŭtente malnova meblaro.

“Mi atendis vian viziton”, ŝi diris, kiam ambaŭ sidis sur apogseĝoj pli belaj ol komfortaj. Tiu altkreska virino, kun flaveca haŭto kaj nigraj haroj kombitaj hartubere, sin tenis embarase, kvazaŭ ŝi neniam plene adaptiĝis al sia alta figuro kaj dezirus sin kaŝi sub pli diskreta formo.

Ŝi kunigis la manojn sur la krucitaj genuoj, kaj ŝia pozo, kiu rivelis bele formitajn nilonŝtrumpajn krurojn, malhavis naturecon. Jano pensis: ‘Ŝi sentas sin rigardata, kaj tion deziras kaj malŝatas samtempe.’

“Ĉu vere?” li diris.

“Jes. Mia edzo rakontis al mi. Mi hazarde eksciis, ke mia kunlernanto fojfoje lin konsultas, kaj post vidi vin, li min informis pri la forpas' de s-ro Jorli.”

Ŝia voĉo kantis laŭ la konata melodio de la Tjaza valo. Jano, kiu havis neordinaran kapablon mensregistri ĉiujn detalojn, kaj konsideri tri aŭ kvar aferojn samtempe, cerbe listigis la demanditojn sub tri titoloj laŭ la maniero prononci: kulturite sanktavala, senkulture sanktavala, ekstervala; dume lin trafis la penso, ke la voĉoj aŭ parolformoj tiom diferencas kiom la loĝejoj, kaj ankaŭ ili liveras pri iu individuo multe pli da informoj ol tiu mem konscias.

“Kion vi pensis pri ĝi?”

“Mi apenaŭ kapablas ĝin kredi. Li estis stranga viro, certe, sed pensi, ke li mortis ...”

“Per kio li estis stranga?”

“Per sia ekscitiĝo, sia infaneca revoluciemo, sia obsedo ‘forbruligi la kapitalistan socion’. Mi sentis ion detruan, sadisman en li. Ne gravis por li la konstruo de nova socio, sed li antaŭĝuis la plezuron vidi, ke l' malnova mortas en sufero. Mi scias, ke multaj junuloj simile sentas (kvankam eble malpli ĉe ni, en Sanktavalo, ol aliloke) sed en li tiuj rimarkoj impresis min kiel pli seriozaj, kredataj pli sincere.”

“Kiel li rilatis kun vi?”

Ŝi ruĝiĝis.

“Moke, komence”, ŝi fine diris. “Ekzemple, li foje diris: ‘Jen fiaskis la granda burĝino’, kiam mi tro atendis por miksi la ovojn kun la fritiĝanta riz'. Poste, kiam li eksciis, ke mi estas la edzino de la koristo, li iĝis pli afabla, kvankam li ne kapablis subpremi komentojn pri tio, ke

‘kuracisto perlaboras nedece multe da mono’ aŭ similaĵoj.”

Ŝi hezitis, alprenis hontan esprimon dumsekunde. Jano konstatis, ke ŝi malfacile regas siajn emociojn: kion ajn ŝi sentas, tio tuj esprimiĝas vizaĝe.

“Se paroli honeste, sinjoro polican', mi dirus, ke li agis sadisme al mi per tio, ke li jen kaj jen uzis vundajn dirojn, dum li certe rimarkis, ke lia ĉarmo ne lasas min indiferenta. Mi tro prudentas por ligiĝi al tia viro. Sed mastri sian animon ne ĉiam facilas, kaj ĉiufoje, kiam li lanĉis al mi unu el siaj anĝelaj ridetoj, io fandiĝis al mi en la kor'. Tio evidentis al li sen ia dubo, kaj mi fojfoje sentis, ke liaj esprimoj estas ĝuste kalkulataj por veki en mi perturbon.

Mi opinias, ke mi estis por li ludilo, kiun li uzis por venĝa plezuro turmenti, kvankam mi neniam faris al li ion malbonan, neniam alparolis lin malestime, aŭ io simila.”

Ŝi haltis, sinĝene, kaj post ĝemspiro daŭrigis:

“Eble mi devus ne paroli tiel pri mortinto. Eble ĉio ĉi estas pura imago de virino, kiu ...”

Malofte Jano renkontis personon tiel facile embarasatan. Aŭ ĉu la cirkonstancoj igis ŝin tute alia, ol ŝi kutime estas? Denove ŝi elvokis bildon de dronanto, kiu sensukcese serĉas tabulon por kroĉi sin. La silento estis ĝena. Jano alprenis sian plej amikan, kompreneman mienon, kaj diris kvietige:

“Jes, jes, mi komprenas.” Post paŭzo li aldonis:

“Vi pensas, ke vi eble imagas la sadismon de Jorli. Kio sugestas al vi tiun penson?”

“Mi ne havas infanon, sinjoro, neniam povos naski, kaj s-ro Jorli nekredeble similis la filon, kiun mi fantaziis, kiam mi estis juna. Eble tio ne estas tute vera. Mi diru: kiam mi ekvidis lin la unuan fojon, mi estis skuata de profunda vibro, kvazaŭ fulmo min trafintus, pro tiu ... kiel diri ... tiu ekstertere bela vizaĝo. Li havis seriozan mienon. Post momento, li rigardis min kaj ridetis. Tio estis dua fulmobato. Lia vizaĝo estis lumigita ... tiel ... sorĉe aminda, tiel ĉarme amiga ... Mi neniam resaniĝis el tiu unua trafiĝo. Mi provis kompreni, kio okazas al mi. Tiam mi pensis: ‘se mi havus filon, li povus esti tia’.”

“Pardonu, se mi maldiskretas,” murmuris Karal, “sed policano devas fari tiajn demandojn iufoje: ĉu vi parolis pri tiu impreso al via edzo?”

Pli ol iam ajn antaŭe, ŝi ŝajnis droni nesaveble. Ŝi paliĝis, dum la okuloj aspektis kiel vokantaj al kompata helpo, kaj la lipoj tremetis. Nekapabla paroli, ŝi simple kapneis. Finfine ŝi sukcesis retrovi sinregon:

“Mi neniam kuraĝis. Mi timis miskomprenon. Se Lazár pensus, ke mi enamiĝis al alia viro, li povus ...”

Ŝi haltis, terurita de la propraj vortoj, kun rigardo hororplena.

La detektivo opiniis saĝa forlasi la kampon de l' sentoj por aliri faktojn konkretajn:

“Ni revenu al pasinta merkredo. Vi ĉeestis la kurson de ĉinaĵo, ĉu ne?”

“Jes.”

“Ĉu ankaŭ Paŭlo Jorli?”

“Jes, s-ro Jorli estis tie.”

“Kia li estis?”

“Ekscitita, gaja, sprita. Eble pli bonhumora ol ĝenerale. Sed li rapide pasadis de ekzaltiĝa stato al deprimiĝa. Do tio nenion signifas. Ŝajnas al mi, ke li multe ŝanĝiĝadis laŭ la ĉeestantaj personoj.”

“Je kioma horo la kurso finiĝis?”

“Mi ne scias ekzakte. Eble je kvarono post la oka?”

“Ĉu vi babilis kun li aŭ akompanis lin parton de la vojo?”

“Tute ne, mi iris al alia direkto. Tuj kiam la kurso finiĝis, mi ĝisrevidis, kaj for, hejmen.”

“Diru do, mi petas, sinjorino: kial vi partoprenas tiun kurson?”

Ŝi refoje hezitis antaŭ ol respondi.

“Mi tre ŝatas la ĉinajn manĝaĵojn. Mi volis scii, kiel prepari ilin.”

“Ĉu en la kursejo la lernantoj manĝas, kion ili preparas?”

Denove ŝi aperis kaptita kaj senhelpa. Ŝi glutis salivon antaŭ ol respondi:

“Jes, kutime.”

“Ĉu ankaŭ vi?”

Malĝojmiene ŝi respondis, per laca voĉo:

“Ne. Mi estas judino. Mi ne estas vere religia, sed tamen malplaĉas al mi manĝi porkaĵon aŭ

aliajn aferojn, pri kies koŝereco mi ne estas certa. Fakte, tio estas mia kialo por sekvi tiun kurson: adapti la ĉinan kuirarton al la judaj manĝprincipoj. Mi volas povi inviti miajn gepatrojn, tiujn de mia edzo, geamikojn, kiuj estas strikte religiaj judoj, kaj regali ilin per ĉina manĝo, kiu neniel kontraŭus al la leĝo mosea.”

“Kial vi ne diris tuj?”

“Mi supozas, ke iel mi hontas pri mia judeco. Kvankam en Sanktavalo ni neniam spertas rasismon ... Kiel diri? Neeviteble oni sentas sin malsama, kaj ĉiam klarigadi tedas.”

Ŝia laceco estis tre perceptebla. Jano pensis, ke tiu konversacio prezentas por ŝi doloran psikan torturon. Li sekve adiaŭis kaj revenis siadomen. Estis tempo por tagmanĝi.

13

Posttagmanĝe, en la oficejo, pluraj interesaj dokumentoj lin atendis. Unu estis la fine alveninta raporto de la Internacia Referenca Centro pri Vegetalaj Venenoj, alia estis fasko da paperoj trovitaj ĉe Jorli de policanoj, kiuj ree traserĉis lian ĉambron, kaj la tria estis skatolo kun farmacia specialaĵo: la medikamento, kiun d-ro Gutmanis preskribis al la junulo.

Jano komence pritraktis la trian, zorgante ĝin kiel eble malplej tuŝi, por ne difekti eventualajn fingrospurojn. Estis kartona skatolo, kun verŝajne io plasta aŭ vitra interne, sed li ne volis malfermi ĝin. Ekstere, ĝi prezentis nenion specialan krom unu interesa punkto: etiketo de la apoteko, kie ĝi estis aĉetita: Popola Apoteko, 2 Konservatoristrato. Tio estis la adreso, kie Jano Karal vizitis Karinan Frisk. Li tuj sendis la skatolon al la polica laboratorio por kompleta esploro.

La paperoj konsistis el malnetoj de leteroj, cirkuleroj, artikoloj kaj paroladoj redaktitaj de Paŭlo Jorli koncerne, plejparte, politikajn problemojn. Ilia nematura romantika maldekstrismo okulfrapis ĉe la unuaj frazoj. Jano decidis legi ilin hejme, en pli trankvila atmosfero.

Fine li turnis sin, kun neracia, ne tre komprenebla mallogo, al la toksologia raporto de la Centro internacia. Li rapide tralegis la kemian parton: la formulo kaj teknikaj specifaĵoj havis por li, pro manko de faka trejniĝo, minimuman signifon. Sed lian atenton la cetero tuj kaptis.

Resume, ĝi indikis, ke la trovita substanco – Ĥalkomfalino – efektive estas veneno, kiu agas en la daŭro de tri, kvar horoj per malfortigo kaj fina paralizo de la kardia muskolo, kun grada endormigo. Tre malgranda dozo sufiĉas por ĉesigi vivon, se la ag-elemento estas sufiĉe koncentrita. Dum unu aŭ du tagoj karakteriza odoro eliĝas el kadavro de persono ĝin glutinta.

La manieron ricevi puran, mortige koncentritan Ĥalkomfalinon konas ekskluzive la Bamaganjongŭe, malgranda afrika popolo. La venenon oni tiras el arbeto – *Chalcomphalia maculipennis* – kiu kreskas nur en kelkaj regionoj de Afriko, en Birmo, en Junnan-provinco de Ĉinio, en Indonezio, en deko da filipinaj insuloj kaj en Nov-Gvineo. Estas dube, ke la loĝantoj de tiuj regionoj iam ajn malkovris en tiu vegetala substanco la mortigan ag-elementon, kiu riceviĝas nur post relative kompleksa preparado. Laŭ la dokumentaro de la Internacia Referenca

Centro, la menciitaj afrikanoj estas ĝiaj solaj uzantoj. Kvankam Smarteaj Laboratorioj siatempe interesiĝis pri la eventualaj medicinaj aplikoj de

Ĥalkomfalino, ili rezignis je tia esplorado pro la malfacileco kulturi la kreskaĵon, kiu igis ĝin ekonomie netaŭga.

La raporto fine citis bibliografiajn referencojn: artikolojn aperintajn en fakaj revuoj.

“Jen kial mi deziris plej malfrue ricevi ĉi tiun raporton!” diris al si Jano. “Mi nekonscie intuis, ke ĝi alportos nur komplikon.”

Tio estis lia unua reago, ŝuldita al la nekonateco de produkto tiel stranga. Sed duareage li pensis, ke eble la malofteco de l' mortigilo reduktos la suspektokampon. Ju pli li pripensis, des pli tio ŝajnis prava. Li prenis paperon kaj listigis la personojn koncernatajn, jene: *Jam viditaj*

Aliaj

s-ro Valdunja

kunloĝanto 1 (afrikano!)

s-ino Valdunja

kunloĝanto 2

Karina Frisk

Liaŭ Fengguo

Lejla Gorazdo

ĉinkuira kursanino 1

d-ro Gutmanis

ĉinkuira kursanino 2

s-ino Gutmanis

membroj de politika grupo de Jorli

Georgo Landarte

membroj de ekstremdekstra grupo

Sergjo Agister

membroj de atletisma grupo

Marta Bolomaj

geamikoj ĉeestintaj la mardan vesperon

Kolego-farbisto

La afrika deveno de l' mortigilo tuj direktis la suspekton al Landarte, kiu pasigis grandan parton de sia vivo meze de primitivaj triboj, kaj al la afrika studento. Jes, tuj oni pensas tion.

Sed maltuj?

Ĉu eblas plene fidi la aserton de la Internacia Centro, ke la veneno ne estis malkovrita aliloke? Kion afrikanoj trovis, tion povus trovi ĉinoj aŭ birmanoj same bone. Tiaokaze, Liaŭ

Fengguo povus scii pri ĝi, kaj eble aliuloj: membroj de la maldekstra grupo, kiu tiom admiras Ĉinion kaj eble havas rilatojn kun tiu lando pere de la ambasadorejo aŭ alimaniere.

Krome, almenaŭ unu farmacia laboratorio interesiĝis pri la koncerna substanco. Tio signifas, ke personoj ekster Afriko kaj Azio pristudis ĝin, havis specimenojn, konas ĝian efikon. Ĉu Gutmanis, kiel korfakulo, ne partoprenis tiun esploradon? Aŭ Karina Frisk, kiel farmaciistino?

Pozitivan aspekton la raporto havis en tio, ke ĝi mallarĝigis la tempospacon, dum kiu Paŭlo Jorli povis enkorpigi la venenon. Jano decidis serĉi pri tio konfirmon. Li telefonis al la ĉefurba toksologo, polica faka kunlaboranto, al kiu la valĉefa nekropsiinto antaŭe sendis la venenan restaĵon. La fakulo indikis, ke efektive, kunleginte la diversajn raportojn (li kompreneble ricevis kopion de ĉiu), li povas fiksi la gluton de l' veneno je momento inter la tria kaj la oka posttagmeze, se paroli nur fizio-kaj toksologie. Se oni almetas aliajn konatajn faktojn, la tempo-eblecoj malgrandiĝas.

La konversacio de Karal kun la fakulo atingis jenajn konkludojn: Se Jorli estus glutinta la venenon je la tria, li ne estus povinta ĉeesti la komencon de la kurso.

Aliflanke, la stomakenhavo respondas je la manĝo preparita dumkurse, kaj estis parte

digestita. Se li enprenis la venenon je la sesa, malpli de la manĝaĵoj estus digestita, kaj li estus manifestinta fine de la kurso simptomojn, kiujn la aliaj ne estus pretervidintaj. Se je la naŭa, verŝajne multe pli, aŭ ĉio – ĉe tia juna homo sen stomakaj problemoj – estus digestita.

Kvankam ne eblas vera precizeco, ĉar mankas multaj detaloj – individua digestrapideco, ritmo laŭ kiu la veneno eniĝis en la sangocirkulon, kvanto da enprenita ĥalkomfalino, ktp –

tamen oni povas konjekti kun negranda erarmarĝeno, ke la veneno atingis la stomakon inter la sepa kaj la oka kaj duono. Praktike, tio signifas: aŭ tuj antaŭ la kurso, aŭ dum ĝi.

Karal demandis, ĉu la fakaj donitaĵoj de l' raporto ebligas scii, kian guston havas la mortiga substanco. La toksologo respondis, ke ne, sed ke la menciitaj artikoloj eble informas pri tio.

Li tuj serĉos en la biblioteko kaj sciigos la detektivon.

Jano decidis reiri al la apartamento de s-ino Satej por paroli kun la du ankoraŭ neviditaj loĝantoj.

*

La fizikstudento forestis, sed ne la afrikano. Ĉi-lasta estis eleganta viro, iom pli aĝa, laŭvizaĝe, ol la policano atendis. La unuaj impresoj de Jano resumiĝis en la vorto “longa”, ĉar la afrikano havis longajn krurojn, longajn brakojn kaj la kombino de tre maldika talio kun relative mallarĝaj ŝultroj emfazis la impreson de longeco. Jano amuziĝe pensis, ke “Lalonga”

estus bona afriksona nomo por tiu, sed la vera nomo estis Mulangonjumba. La vizaĝo impresis, se ne bele, almenaŭ plaĉe, sed kio imponis, tio estis la profunda basvoĉo.

Ve! La demandado dispremis plata la esperan atendon de Karal. La studento apenaŭ konis Paŭlon. Ili vivis en unu apartamento, sed en du apartaj mondoj. Paŭlo unufoje aliris la nigrulon por babili pri politiko, sed la alia nete rifuzis. Laŭ tiu, la interparolo okazis proksimume jene:

Mulangonjumba: Mi ne miksiĝas al politikaj aferoj.

Jorli: Sed via popolo estas maljuste traktata.

M.: Mi ricevas stipendion de via registaro. Kion ajn mi pensu, mi volas ĝin ricevi plu. Por mi, mia unua devo al mia lando estas fariĝi kuracisto kiel eble plej kompetenta.

J.: Nia lando estas demokrata. Ili ne rifuzos stipendion, se vi partoprenos en politika agado, des malpli en simpla diskuto.

M.: Mi multon ne scias pri via lando, kaj vi multon ne scias pri mia. Mi observadas; poste mi juĝos. Nun min interesas nur studi kaj plu ricevi stipendion.

J.: Multaj afrikanoj ne reagas kiel vi al invito politike pripensi.

M.: Ili estas ili, mi estas mi. Lasu min, mi petas ...

De tiam, Paŭlo sisteme rifuzis eĉ pro nura etiketa ĝentileco saluti la afrikanon.

*

Dum Jano kaj Mulangonjumba parolis, alvenis la fiziko-studento Ivo Pares. Dankinte la alian, la detektivo iris al ĉi-lasta. Denove, la interparolo fruktis ne multe. Male al la afrikano, Pares ne rifuzis la diskuton kun Jorli, sed li rigardis ĝin teda bonkoreca devo.

“Tiu junulo bezonas ... bezonis paroli. Kial ne aŭskulti lin?”

“Sed ĉu vi konsentis pri liaj ideoj?”

“Ne. Aŭ nur parte.”

“Ĉu vi tion diris al li?”

“Ne. Min ĝenis, ke Mumu” – li mangestis al la nigrula ĉambro – “rigardas lin kun alta nazo.

Tiu knabo malfeliĉis. Li bezonis amikecon, trovis ĝin – espereble – ĉe siaj amikoj-ruĝuloj. Se ĉi tie ni ambaŭ lin forĵetus, tio ne estus agrabla, ĉu?”

“Ĉu li ne provis logi vin al sia grupo?”

“Iomete, sed li tuj vidis, ke li ne sukcesos. Mi diris, ke mi estas malsanema, kio estas relative vera, cetere, kaj tro absorbita en mia studado. Tion li volonte kredis.”

Tuj vidiĝis, ke Pares ne tre sanas. Li estis maldika palulo kun

maldensa blonda hararo, okulvitroj, kaj ĝenerala mira esprimo, kvazaŭ al li ne klarus, kie ĝuste la reala mondo troviĝas.

“Ĉu vi vidis lin multe?”

“Multe, nemulte, kion tio signifas? Laŭ la hazardoj de la tago, kiam ni renkontiĝis en la kuirejo ekzemple. Ni ne ofte matenmanĝis kune, ĉar li komencis labori multe pli frue ol mi, sed almenaŭ unu fojon semajne ni kune vespermanĝis. ‘Vi estas kompatinda malriĉa studento’, li diradis iom ironie, ‘permesu, ke mi regalu vin’. Li preparis ne malbonajn manĝojn, kelkfoje ĉinajn, ĉiam rifuzante, ke mi pagu la elspezojn. ‘Ĉine manĝi kostas nemulte, ĉar oni tiras la maksimumon el ĉio’, li klarigadis. Ŝajne, li fieris, ke lia murŝmira salajro lin ebligas grandsinjori al mi. Kaj mi efektive estas tre malriĉa.”

“Ĉu vi trovis lin moka, supereca?”

“Ne. Lia sinteno estis amika. Iom supereca, jes, kiel granda frato al malgranda. Li diris: ‘Vi estas poeto de teorio, mi konas la vivon pro ĝin sperti.’ Li amis pri mi la fakton, ke mi donis al li la okazon sin senti supera, mone, energie, politike, al intelektulo. Li amis min ankaŭ pro tio, ke mia familio estas laborista.”

“Ĉu vi konis liajn amikojn, amikinojn?”

“Tute ne. Li kelkfoje menciis ilin, parolis pri seksaj atingoj, ktp, sed neniam tre serioze. Pri politiko li parolis nur teorie, subdirante, ke lia agado estas sekreta. Mi neniam lasis lin vidi, ke tiun agadon mi rigardas ludo.”

“Kion vi scias pri via alia kunloĝanto?”

“Mumu? Nenion. Eĉ ne lian tutan nomon. Li estas bona knabo, sed ne deziras amikiĝi kun mi. Mi respektas lian deziron. Vi scias, medicinaj studoj postulas egan memorlaboron. Mi scias dank' al amiko, kiu studas kun li, ke li kondutas same en la univ' ... diskreta, laborema, afabla, sed ema resti sola en sia anguleto. Li havas amatinon, kun kiu li pasigas preskaŭ la tuton de siaj liberaj horoj. Li ne okupiĝas pri politiko, rifuzas meti sian nomon sub studentaj petskriboj, sed oni ĝenerale komprenas lian sintenon kaj lin ŝatas. Li ankaŭ ne okupiĝas pri aliaj knabinoj ol la amatino. Al mi ne plaĉas konfliktoj, kaj pro tio mi ĉiam diras ‘jes’; al li ne plaĉas konfliktoj kaj pro tio li ĉiam diras ‘ne’. ‘Samen celas, dise velas’, oni diras ĉe ni, en Tjazo-Alta. Sed ĉar li tion faras kun granda afabla rideto kaj rigardo signifoplena, neniu riproĉas lin. Se li ne sukcesis kun Paŭlo, estas pro la speciala fakto, ke tiu nenion pli deziris ol bonan nigran proleton, kiu konfirmus ĉiujn

liajn ideojn. Kiam Mumu alvenis, li ĝojsaltis plafonen, sed baldaŭ la revo platiĝis.”

Koncerne praktikajn detalojn, utilajn por la enketo, Jano ne sukcesis ricevi multon, krom unu fakto, sed tiu gravegis: Paŭlo kutimis gluti sian kuracilon ĉiuvespere meze de la manĝo ‘por ke ĝi bone miksiĝu’, aŭ tuj poste, se li hazarde forgesis.

*

Reveninte oficejen, Jano Karal komisiis la polican sekretariinon, helpserĉistinon, referencistinon – unuvorte Izabelan – kontakti la Smarteajn Laboratoriojn por ricevi la liston de ĉiuj personoj, kiuj laboris super Ĥalkomfalino, kaj por ekscii, ĉu d-ro Gutmanis aŭ f-ino Frisk iam ajn tie dungiĝis.

Notinte liajn dezirojn, Izabela anoncis, ke prof. Ŝoleman, la toksologo, telefonis kaj petis lin revoki.

La forta voĉo de l' ĉefurba fakulo vibrigis la telefonon:

“Mi havas vian informon. Tre amara, malagrabla gusto. Tial la indiĝenoj havas problemon por mortigi iun per tiu veneno. Oni uzas ĝin en tiuloka preparaĵo, kiu estas samtempe sukerita kaj tre spica, ‘pilipili’eca, se vi konas. Se estas nur la dolĉaĵo aŭ nur la pilipilio, oni tuj sentas repuŝan guston. Ambaŭ necesas kune.”

“Sed en nia moderna socio, ekzistas manieroj neperceptebleble glutigi fortagustajn aĵojn, ĉu ne?”

“Ho jes, ekzemple la oblatajn aŭ gelatenajn kapsulojn la farmaciistoj uzas precize tiucele. Oni sensas nur (kaj apenaŭ) la eksteran entenilon. La substanco mem troviĝas ene sen kontakto kun la gustumaj sensiloj.”

Ju pli Karal pripensis la problemon, des pli li emis konkludi, ke Paŭlo glutis la venenon en medikamenta gelatena kapsulo. Li do feliĉis aŭdi, ke prof. Ŝoleman atingis la saman ideon.

14

Jano Karal listigis demandojn, kiujn respondi necesos:

— ĉu la merkreda ĉinaĵo enhavis kombinon de forte spica kaj sukerita kunmanĝaĵo? (se jes, ĉu eblis al f-ino Bolomaj interŝanĝi sian manĝaĵon kun tiu de P.J.?)

— ĉu iu vidis P.J. gluti sian medikamenton merkredon vespere? aliajn merkredojn?

— ĉu li havis simptomojn de kora malfacileco fine de la kurso?

— ĉu vere la du amikinoj-kursaninoj forestis merkrede?

— kie troviĝis la kuracilskatolo ĉiufoje, kiam P. eliris kaj vespermanĝis ekstere?

— ĉu Lejla Gorazdo scias pri la samseksema amiko?

— kiuj, krom Lejla, partoprenis la mardan gitar-kaj babilvesperon?

— kial Karina Frisk ne diris, ke P. aĉetas la kuracilon en ŝia apoteko?

— kiu profitas per la morto de P.?

*

Pri la unua punkto plej bone estis informiĝi tuj ĉe la supro, t.e. ĉe s-ro Ljaŭ Fengguo.

La ĉino, iom dika kvardekjarulo, kun tre afabla vizaĝo, troviĝis hejme.

“Vi gvidas kurson pri la ĉina kuirarto, ĉu ne?”

“Arto estas la ĝusta vorto, sinjoro polican', jes efektive”, li respondis laŭ perfekte sanktavala prononco.

“Ĉu bone iras?”

“Jes, mi estas kontenta.”

“Kion vi instruis pasintan fojon?”

“Ni refaris jam-faritaĵojn, tiel ke mi metis tri: spinacoŝinkan supon, salikokajn bulojn kaj rizon frititan.”

“Ĉu tiuj estas tre forte spicitaj?”

“Ne, tute ne; multaj personoj imagas, ke ĉina manĝo flamas enbuŝe, kiel hinda aŭ afrika, sed tio ne estas vera. Kompreneble, laŭ la maniero de Sichuan aŭ de ...”

Karal interrompis:

“Ĉu la manĝaĵoj de pasinta merkredo estas sukeritaj?”

“Ne, ili tute ne dolĉas. Oni metas iomete da sukero en la saŭcon, kompreneble, sed malmulte, kaj la manĝanto ĝin ne sentas. ‘Sukerita’ estus netaŭga vorto.”

“Sekve ne estis kombino de forta spicaĵo kun sukerita afero?”

“Tute ne. Ĉu vi eble aludas la dolĉacidan spicon? Mi ankoraŭ ne elmontris tiujn, sed eĉ tie la miksaĵo estas el sukerita kaj acida gustoj, ne el dolĉa kaj spica.”

“Dankon. Tio estis grava afero. Nun alian. Via grupo enhavas junan viron eble dudektrijaran.

Ĉu al vi estas klare, kiun mi celas?”

“La knabo kun tre bela vizaĝo. Jes, sinjoro.”

“Ĉu vi iufoje vidis lin gluti kuracilon dum la manĝo?”

“Mi ne atentis.”

“Kion vi trinkas dummanĝe?”

“Teon, ofte jasmenan. Sed ... atendu, mi koncentru mian penson ... Jes, kompreneble mi vidis lin. Li ĉiam verŝas al si glason da akvo, kiun li metas apud la bovlon. Estas por gluti kuracilon. Vidu, se vi ne demandus pri la trinko, mi forgesus pri tiu detal'.”

“Ĉu li faris ĝin lastfoje?” Jano demandis, streĉite.

“Mi ne ĵurus. Mi vidis, ne tiom la kuracilon, kiom la glason kun akvo. Ĉu mi eĉ vere vidis lin gluti? Nun mi memoras, ke foje mi aŭdis lin diri al la kunulo: ‘Mi prenos akvon, ĉar kun tiu varmega teo, mi ne sukcesas gluti mian medikamenton.’”

Jano tiris el sia teko kvin farmaciaĵojn, inter kiuj troviĝis unu skatolo identa kun tiu trovita en la ĉambro de Paŭlo, kaj unu relative simila.

“Ĉu vi rekonas ion?”

“Ho jes! Nun kiam mi vidas ... Ĉi tiun. La juna sinjoro metis ĝin kelkfoje apud la bovlon.”

La ĉino senhezite montris la ĝustan. Ne restis dubo, ke Paŭlo enbuŝigis la kuracilon dum la kurso.

“Ĉu vi parolis kun li pri aliaj aferoj ol kuirado?”

“Ne. Mi aŭdis lin paroli entuziasme pri Ĉina Popola Respubliko. Mi estas el Singapur'.

Neniam iris en la ĉinan praavan landon. Mi ne ŝatas politikajn diskutojn. Mi do ĉiam evitis paroli pri io alia ol ĉina kuiro aŭ ĉina kultur' ĝenerale.”

“Ĉu li aspektis normale lastfoje?”

“Jes. Li ofte ekscitiĝas. Tia li estis.”

“Ankaŭ fine de la kurso?”

“Jes. Mi rimarkis nenion specialan.”

“Ĉu ĉiuj ĉeestis pasintan merkredon?”

“Ne. La du junaj fraŭlinoj ne venis.”

“Ĉu okazis io, kion vi rimarkis – ia incidento – inter s-ro Jorli kaj la maljunulino?”

“Li ofte mokas ŝin. Li konsideras ŝin freneza, kio ŝokas min, ĉar al personoj maljunaj oni ŝuldas respekton, ĉu ne? Ni ĉiuj ja maljuniĝas. Estas stulte ne lernigi al junuloj honori geavojn, ĉar kiam venos ilia vico maljuni ... Ŝi rezonas neĝuste, kiel ni faros ŝiaaĝe. Mi rimarkis lastfoje, ke ŝi ne manĝas, kvankam ĝenerale ŝi estas frandema. Kaj ŝi rigardadis lin ofendiĝe. Li eble mishumure verŝis tro da ostra saŭco, da aromaĵo, aŭ ion similan en ŝian manĝaĵon. Li havas tian karakteron.”

Nenion pli Jano eksciis el tiu simpatia ĉino, kies sanktavalaj manieraĵoj impresis tiel strange.

Sed el la malmulto dirita, li ricevis konfirmon de antaŭa supozo: ke Jorli enkorpigis al si la venenon per la kuracila kapsulo. Neniu alia hipotezo taŭgus kun la nun certaj faktoj.

15

Pensante, ke la laboratoria raporto koncerne la skatolon verŝajne ne estos jam preta, Jano decidis revidi Lejlan Gorazdon.

Li piediris tra la parko, direkte al ŝia laborejo, kiam ĝoja voĉo lin surprizsaltigis:

“Ej! Kara-Karal!”

Nur unu persono uzis tiun amikan vokmanieron. Jano turnis sin. Efektive, la multfaceta junulo alrapidis de flanka vojo kun larĝa rideto.

“Saluton, Stefano. Vidi vin min plezurigas, eĉ pli: ravas.”

“Tian efikon mi havas sur multajn personojn, kvankam mi ne komprenas ĝin. Ĉu vi pensas, ke mi devus iĝi klaŭno?”

“Hehe! Vi ne maltaŭgus. Sed ne pro tio mi ĝojas vin renkonti. Nur profesie.”

“Oj ve! Vi korkrevigulo! Tion mi devus atendi. Korpo de porko! Ne mi kiel persono metas sur vian detektive grizan mienon iom da suna gajo, nur mi kiel maŝino-por-informi-mallaboreman-policon.”

Li komike eligis afektitan ĝemspiron.

“Nu, nu, nu, ve kaj ve!” li ree ĝemspiris, “mia nuna filozofio devigas min respekti eĉ la plej malplaĉajn insektojn. Sendube policanoj estas tie inkluzivitaj. Plej respekte mi do nun demandas, kion mi povas fari serve al la detektiva moŝto.”

“Vi povas sidi surbenke kun mia moŝto, se tio ne estas postul' tro ofenda por vigla junul' kiel vi”, Karal respondis, moke imitante la sanktavalan manieron paroli.

“Vi ŝatas benkojn ĉi-parke. Mi tion rimarkis”, ridvoĉe diris Stefano, kiu aldonis per tre mallaŭta konfidenca tono:

“Ne timu, mi ne diros al onklino Ĝoja, ke ĉiufoje, kiam mi trairis la parkon, ekde pasinta vendredo, mi vidis vin amindumi kun malgranda bulo da graso, cetere iom tro nerva por mia gusto ... mi lasas ŝin al vi. Fidu la lojalan nevon: mi ne perfidos vin.”

“Kial vi diras: ‘ĉiufoje’. Nur unu fojon mi parolis kun ŝi.”

“Efektive, nur unu fojon mi trairis la parkon ekde pasinta vendredo. Haha!”

“Ne tre sprite! Sed jen, eksidu kun mi, ĉi tiu benko perfekte taŭgas. Kaj lasu viajn klaŭnaĵojn dum momento por raporti pri via misio. Ĉu vi trovis ion?”

“Iun, vi volas diri, ĉu ne? Iujn mi trovis. Preskaŭ ĉiujn, fakte. Unu konigis al mi alian, kiu rilatigis min kun alia, ktp ktp. Kaj jen mia fidela raporto: nenia ĵaluzo al Jorli inter tiuj geknaboj; ili ĝenerale ŝatis lin kaj ne trovis lin sufiĉe forta personeco por lin envii. Li havis unu amatinon post la alia. Antaŭ kelkaj semajnoj, estis apotekistin', laste laboristino el viandopakejo. Mi sukcesis paroligi kelkajn el tiuj knabinoj. Ilia vidpunkto tre similas: ‘bona knabo, iom tro ekscitita, tre bela por rigardi, sed ne vere alloga al normala ino’.”

“Kaj la viroj en la grupo?”

“Simile reagis, kun simila juĝo. Tio plej frapis min pri tiuj uloj. Ili ĉiuj reagas same, kion ajn vi diras. Verŝajne pro vivi tiom kune, sen eliri el sia sfero. Kredu min: por esti kompleta personeco, necesas havi multajn diversajn okupojn ...”

“Ne faru la paroladon pri via vivkoncepto. Mi konas ĝin parkere”, rompis Jano. “Kion ili diras pri la morto?”

“La samon. Ili ĉiuj diras la samon ankaŭ prie”, Stefano dialektis. “Kaj ne stultan hipotezon.

Por ili estas neniu dubo: la krimon kulpas la polico.”

“Kion?” Karal eksaltis.

“Vi aŭdis ĝuste: ili estas tute certaj, ke la polico mortigis Paŭlon por seniĝi je hom', kiu kuraĝis serioze endanĝerigi la burĝan socion.”

“Ili kredis tion pri Jorli, ĉu vere?”

“Tute firme. Ili trovis Paŭlon ekscitita, tro nerva kelkfoje, ne sufiĉe stabila por vere forti, sed ili admiris lian kuraĝon kaj lian manieron organizi. Ili pensis, ke lia bela vizaĝo utilas, ĉar oni ne facile suspektas iun, kiu aspektas anĝele. Sed ili konvinkiĝis, ke la polico eksciis pri liaj planoj, kaj decidis lin likvidi.

“Ĉiuj senescepte?”

“Ĉiuj, kun kiuj mi parolis aŭ pri kiuj mi sciis, pensas same. Kaj mi ne dubas pri la sincereco.

Kelkaj memoras min de la tempo, kiam mi aliĝis al la rondo de marksismaj studoj. La

plimulto en tiu grupo estas studentoj, kaj la fakto, ke mi estas parta laboristo multe kontribuis al mia prestiĝ'. Ili ne scias, ke mi estas via nevo, kaj mi pretus veti, ke ili diris la veron.”

“Kaj en la atleta klubo, ĉu vi eksciis ion?”

“Ili ne sciis pri la morto de Jorli. Ili konas lin ne tre bone, ĉar li ne estis vere regula partoprenanto. La ĉefa komento pri li estis: ‘li ne ŝatas perdi’. Li volonte sekvas la trejnon, kaj li montriĝas infane-naive memkontenta, kiam li en kuro alvenas unua. Pluraj diris al mi:

‘ne vera sportul'; tiu knabo bezonas sti admirata’.”

“Ĉu ion alian vi eksciis, kio helpus en mia enketo?”

“Ne. Ŝajnas al mi, ke jam estas multego. Ĉu vi ne samopinias?”

“Ho jes, Stefano, vi helpis min grandioze. Estu dankata. Permesu nun, ke mi rapidu ... al mia amatino.”

“Ĉu vere?”

“Jes. Post duonhor' (kiel diras vi el Sanktavalo) vi trovos min ĉi tie sidantan kun fajrosanga bruna vulkanino.”

“Kapro de parko! Vi scipovas virvivi!” Li okulumis. “Ne timu, mi ne diros al onklin'.”

Kaj li malaperis for.

*

En la superbazaro, kie Lejla deĵoris, estis plene aktiva tempo. La policano do iris peti de ŝia estro, ke ŝi kelkan tempon interrompu la laboron.

Alvenante, ŝi impresis lin kiel laca, pli aĝa, pli maldika. Li kondukis ŝin al la apuda parko, kaj elektis benkon diskrete lokitan. Ŝia voĉo perdis multe el sia antaŭa firmeco, kiam ŝi respondis al li:

“Jes, mi sciis, ke Paŭlo iris Kastelomaran. Al mi tio ne plaĉis. Aliflanke mi pensis, ke tiu ulo povus esti fonto de mono por niaj agadoj, kio plej utilus. Sed mi opinias, ke mi diris tion al mi, por min trankviligi, ĉar mi vidis, ke la invito tro tentas Paŭlon, kaj li ne havas la forton rifuzi. Kontraŭ dusemajno da pagata nenifar', apud blua maro, kun bonaj manĝoj kaj mola lito, kiu rezistus, vivinte tutan vivon da proleta penado?”

“Ĉu vi ne trovis tiun inviton ekstreme stranga?”

“Ho jes! Mi unue pensis: estas la politikaj kontraŭuloj de Paŭlo, kiuj volas lin logi malproksimen, eble por lin murdi, aŭ por lin kompromiti. Sed li iom pli rakontis pri la ulo, tiel intense, ke ... Mi ne rezistis. Mi foje atendis kaŝite la finon de l' kurso ĉinkuira, tiom mi scivolis. Feliĉa hazardo faris, ke ĝuste tiuvespere ili longe babilis sur la trotuaro antaŭ ol disiĝi. Ili ne vidis min. Mi ne aŭdis ĉion, sed tamen sufiĉe. Precipe mi lin observis. Mi komprenis, finfine.”

“Kion ĝuste vi komprenis?”

“Ke tiu ulo estas virama, ke li enamiĝis al Paŭlo. Estis videble, aŭdeble. Li ĉiumomente provis lin tuŝi. Kaj Paŭlo ...”

Ŝi ekploris, kaj ŝia plua rakonto estis hakata de singultoj kaj snufoj.

“Paŭlo ne rezistis, ne alprenis firman rifuzan sintenon. Li rigardis tiun fiulon, kvazaŭ sorĉata, direktis al li sian ... sian ... (la plorsingultado intensiĝis) ... sian mirindan rideton. Mi pensis: li estas kvazaŭ senhelpa birdo fascinata de serpento. Tio min naŭzis, ŝiris mian animon. Mi volis fari ion, riveli min, krii skandale, sed mi estis tro malfeliĉa. Ŝajnis al mi, ke tro malfruas, ke Paŭlo jam amas lin.”

“Tamen vi vidis Paŭlon plu, ĉu ne?”

“Jes. Poste, mia kuraĝo revenis. Tiuvespere miaj revoj diskrevis, mi tion ne atendis, estis nur scivola. Sed poste mi decidis lukti, tamen neniam kuraĝante paroligi Paŭlon pri tiu afero. Mi ĉefe emfazis la neceson politike agi, pensante, ke nur tio lin deturnos de tiu dekadenca burĝo.

Ve!”

Rea plortorento. Tiu sperto sendube estis superhome suferiga al la eta ‘karnobulo’. Jano komprenis, kaj sentis kompaton.

“Paŭlo!” ŝi ekkriis, tenere, kaj daŭrigis: “Li ne plu estis la sama. Mi ne

mensogis la alian fojon, kiam mi diris, ke lundon antaŭ lia morto ni kune kuŝis. Kuŝis ni kune, estas vero, sed nur kuŝis. Ĉu vi komprenas? Ekde la tago, kiam tiu sukcesis lin trafi, mi ne scias kiel, Paŭlo lite kun mi malpli kaj malpli viris. Tiun lundon estis kompleta fiasko. Imagu. Viro dudektrijara! Tiu perversulo lin fuŝis komplete."

'Oni ne sukcesas tiel facile ŝanĝi iun, se ne ekzistas en ĉi-lasta profundaj tendencoj samdirektaj', pensis Karal, samtempe memorante, ke homo, kia Timoteo Valdunja, ekzemple, ĉiam taksis Paŭlon ne aŭtente vira. Li demandis:

"Mardon pasintsemajne, vi pasigis la vesperon kun amikoj. Mi bezonas scii, kiuj ili estas. Ĉu vi bonvolos?"

Ŝi hezitis, momenton alprenis sian defian mienon, kaj fine levis ŝultrojn, kvazaŭ por signifi

"nenio plu gravas nun". Ŝi donis iliajn nomojn, plus kelkajn personajn detalojn, kiujn li notis.

La detektivo konstatis, ke ĉiuj jam troviĝis sur la listo, kiun li donis al Stefano: estis ĉiam la sama rondo. Fine li demandis:

"Koncerne la kuracilon, kiun Paŭlo glutis ĉiuvespere. Kie li konservis ĝin?"

"Estis du lokoj: en tirkesto liaĉambra, kaj en la maldekstra poŝ' de la pluvjako, kiun li ĉiam surhavis ekstere."

"Ĉu li kutimis konservi tiun jakon sur si, kiam li restis ie interne, ekzemple en restoracio, ĉe la laboro, ĉe amikoj?"

"Ne. Estas palto-jako, kiun li surmetas ĉi-sezone por eliri, kiam estas ne tre varme; sed kie oni ankoraŭ hejtas, li forprenas ĝin kaj ĝenerale pendigas ĝin sur hoko. Li ne ŝatas lasi ĝin ie ajn sur seĝo, pli malpli fuŝe faldita, kiel multaj faras."

'La aferoj preciziĝas', pensis Jano, forlasinte la dikulineton kaj, paŝante oficejen, li mense ordigis la nun farotajn taskojn.

16

La reston de la mateno la detektivo pasigis serĉante konfirmon de faktoj jam konataj. Ĉu telefone, ĉu vizite, li tiel eksciis, ke jenaj faktoj troviĝas ekster ĉia dubo: la ĉina manĝaĵo de l'

fatala merkredo ne enhavis kombinon de dolĉa kaj spicforta aĵoj; Paŭlo ĝenerale glutis la kuracilon meze de vespermanĝo, helpante sin per malvarma akvo; oni vidis lin tion fari ankaŭ

la koncernan merkredon; la du junaj amikinoj ne ĉeestis la kurson tiutage; kiam li vizitis la kurson, Paŭlo ĉiufoje pendigis sian jakon sur hoko enireja, apud la necesejo, ĉar en la kurskuirejo estis varme. Koncerne eventualan malfacilecon spiri fine de la kurso, simptoman pri serioza kormalfortiĝo, la opinioj diferencis: la ĉino nenion rimarkis; laŭ f-ino Bolomaj, li parolis rapide, ekscitiĝe, tute kiel kutime; laŭ s-ino Gutmanis kaj s-ro Agister, li efektive spiris iom kiel persono, kiu suprenkuris ŝtupare.

Nun, kiam ne restis dubo pri la tempo kaj maniero de l' forpaso, oni povis ekskludi la sinmortigan hipotezon: estus psikologie neimageble, ke homo, kiu volas ĉesigi sian vivon, iras ekscitita al regula kunveno, kaj meze de ĉiuj, sen videbla emocio, englutas mortigan substancon, kiun li antaŭe enigis en gelatenan kapsulon.

La sola allasebla klarigo pri la morto de Jorli do estis, ke iu metis en la poŝon de l' jako (eventuale en la tirkeston hejme) mortiga(j)n kapsulo(j)n, aŭ en la skatolon de Paŭlo, aŭ en similan, antaŭe preparitan skatolon. Tiumerkrede, laŭ du atestantoj – Sergjo Agister kaj Elsa Gutmanis – Paŭlo eliris el la kursejo ĝuste antaŭ la manĝo por iri preni la medikamentan skatolon el sia jako, enireje.

Senkuraĝige por enketisto estis, ke, tiumetode, la momento, kiam la viktimo enbuŝigis sian mortigilon iĝis komplete hazarda. La tuta kutima rezonado per alibioj do fariĝis neaplikebla ĉi-kaze.

La raporto de l' polica laboratorio alvenis tuj antaŭ tagmezo. Ĝi estis miriga.

La kartona skatolo, por produkto tiuspeca, estas la eksteraĵo. En ĝi troviĝas papero kun fakaj indikoj kaj plata ujo el vitreca plasta materialo, plena je gelatenaj kapsuloj enhavantaj la pulvoran medikamenton. Malmola plasta ŝtopilo fermas la ujon.

Kaj sur la ŝtopilo kaj diversloke sur la ujo la laboratorio trovis klarajn fingrospurojn lasitajn de du personoj: Jorli, kaj iu nekonata. Ĉi-ties estis pli multaj ol tiuj de l' viktimo, kiuj estis kelkloke stampitaj super tiuj de la nekonato. Pligrandigitaj fotoj de l' fingropremaĵoj estis aldonitaj al la raporto.

Ĉiuj kapsuloj restintaj en la ujo enhavis nur la normalan medikamenton, sed mikroskopa studo de la etaj polveroj troviĝantaj en la kartono rivelis kristalon de Ĥalkomfalino.

La lasta detalo nur konfirmis pliafakte punkton jam certan, nome, ke iu uzis la medikamenton kiel rimedon por murdi Paŭlon. Janon ĝi do ne surprizis. Sed alia fakto mirigis lin, nome, ke tiom da fingropremoj stampiĝis sur la ujo.

‘Nekredeble’, li pensis. ‘La krimo ĉiurilate signas ruzon kaj inteligenton. Kiel la krimulo, niaepoke, povis kulpi tiel stultan eraron, kiel manipuli nudamane plastan ujon, sur kiu la fingroj nepre lasas spurojn identigajn?’

Li decidis havigi al si fingrostampojn de ĉiu koncernato, komencante per Karina Frisk kaj ges-roj Gutmanis, pro la kuracila metodo murdi, kaj transironte poste al Landarte, ĉar la mortigilo devenis de Afriko.

*

Li malfruis por la hejma tagmanĝo. Post kiam la infanoj foriris, dum li retroviĝis sola kun la edzino por trinki la tradician kafon, ŝi alparolis lin kun brilaj okuloj:

“Mi legis la paperojn de Jorli, kiujn vi alportis hejmen hieraŭ.”

“Ĉu interese?”

“Jes kaj ne. Teda makaroniaĵo de iu obsedata per infana deziro ĉion revolucii. Sed io frapis min, kio vin interesos.”

Ŝi haltis. Li rigardis ŝin, scivola. Tuj enirinte, li jam divenis, ke ŝin jukas la senpacienca deziro ion komuniki, sed la ĉeesto de infanoj ŝin malhelpis.

“Eble mia psikologia trejniĝo misgvidas min,” ŝi reparolis, “kaj ĉi tio estas nur hipoteza.

Tamen mi min demandas ...”

Ŝi ree eksilentis; ĉu intence, por tikli lian scivolemon?

“Vi vin demandas ...”

“Mi min demandas, ĉu povus esti nur ŝanca afero. La ekzemploj, kiujn li uzas, la simboloj, per kiuj li esprimas bilde sian penson, la metaforoj, ĉio ĉi turniĝas ĉirkaŭ unu temo obsede: fajro.”

“Nu, tio estas normala. La koloro simbola pri revolucio estas ruĝa, kiel fajro, kaj tiuj junuloj volonte parolas pri fajrigo de la malnova socio, ktp.”

“Jes. Tamen gravas la ofteco: ĉe la aliaj, tio okazas normalkvante; ĉe Paŭlo estas kvazaŭ

konstantaĵo.”

“Kaj kion vi konkludas?”

“Mi meditis pri tiu fakto. Mi pensis pri ĉio, kion vi diris pri Jorli. Ĝi formas koheran psikan bildon: nestabila junulo, kiu deziras venĝon, sopiras al heroa ago, kapablas sadisme ĝui detruon, dubas pri sia valoro kaj vireco, kaj provas korekti tiujn dubojn pruvante al si, ke li estas grandulo. Jen lia karakter', ĉu ne? Krome, lia familio mortis dombrule, se mi ne eraras,

kio povis profunde impresi la psikon de tia sentema infano, kaj veki en li nekonsciajn fantaziaĵojn donantajn al fajro valoron de sorĉa mistero, kiun solvi nur konkreta ago povus.”

“Efektive.”

“Nu, memoru, kion li ŝmiris sur la Granda Ponto: ‘ *BOJKOTU Ĉ-T*’. Kaj memoru, ke kelkajn tagojn poste, la aludita ĉiovendejo – Alta Turo – komplete brulis, ke la polico konvinkiĝis, ke estas krima far', kvankam ĝi neniam sukcesis trovi la junulon, kiu suspektinde eliris kaŝe el la magazeno, kaj kiun, malgraŭ lia singardo, pluraj atestantoj vidis ...”

Dum momento, Jano ŝin rigardis kun buŝo malfermita.

“Diable!” li diris, kaj plu silentis, kvazaŭ trafita de fulmo.

“Via elpensaĵo min stimulas”, li fine voĉis. “Ĉu Paŭlo estus la kulpinto de tiu fajrego? Estos facile kontroli.”

“Tion mi pensis. Kvankam mi ne imagas, kiamaniere tio povas rilati al lia morto ...”

“Mi kuras oficejen. Vi havis genian ideon.”

Ŝi penis lin haltigi:

“Ej! Ne flugu tiel, vi povus tamen minuton ripozi ...”

Tion ŝi diris kvazaŭ laŭrite. Ŝi ja sciis, ke kiam lin tenas simila ideo, nenio allasus prokraston.

Videble lia menso jam fulmis al nova direkto.

*

“Izabela!” li kriis enirante. Feliĉe, ŝi jam alvenis.

“Je via dispono!” ŝi respondis, mokfarante soldatan saluton.

“La dosieron pri la brulego de Alta Turo, tuj! Kaj poste, traserĉu nian kolekton por trovi kvar aŭ kvin fotojn de viroj kiel eble plej similaj al Paŭlo Jorli.”

Post kelkaj minutoj ŝi alportis la dosieron. Ĝi enhavis la atestojn de tri personoj vidintaj la junulon, kiun fasko da faktoj aperigis kiel tute probablan respondeculon de l' krima bruligo.

Polica desegnisto estis farinta krajonan portreton de la knabo laŭ tio, kion la tri vidintoj indikis kaj sugestis korekti. La rezulto relative bone similis Paŭlon, kvankam ĝi tute ne reproduktis ties belecon.

Tuj post kiam Izabela alvenis kun kvino da fotoj, Jano ilin prenis kaj reiris for. La ŝanco lin favoris: ĉiuj tri atestintoj troviĝis en la urbo. Kiam li montris la fotojn de kvin malsamaj viroj, petante indiki la fuĝinton el Alta Turo, ĉiuj tri, post atenta rigardo, elektis tiun de Jorli. Per stranga zigzagado, la enketo pri juna venenito jen solvis problemon, ĉe kiu jam plurajn semajnojn la polico stumblis sen espero progresi.

17

Aĉetantoj ĉifoje svarmis en “Popola Apoteko”. Jano do decidis iom promeni antaŭ ol komenci sian demandadon. Blovis vento, kaj nuboj rapide sekvis unuj la aliajn, tiel ke, laŭ la orientiĝo rilate al la ventodirekto kaj laŭ tio, ĉu la suno nun brilis aŭ estis kaŝita, al promenanto ŝajnis, ke li pasas de vintro al somero aŭ inverse en nur kelkaj sekundoj.

La detektivo paŝis surkaje laŭ Tjazo, fakte ĝuante tiujn

temperaturŝanĝojn, kiuj kolerigus iun ne naskitan kiel li kun plusoj da bonhumoro. Li ne pensis pri sia enketo. Du knaboj, dekunu-dekdujaraj, ludis sur la kajo. Aŭdiĝis plaŭd-bruo.

“Korpo de porko!” sakris unu, “mi faligis ĝin.”

“Bufido!” koleris la alia. “Ĉiam same kun vi! Hejme nin trafos bela ben', vi vidos!”

Janon amuzis la muziko de l' voĉoj, tipe sanktavala. Malvarma ekblovo lin tremigis, kio pensigis lin pri la varma apoteko. Li iris returne.

Kvankam pluraj personoj ankoraŭ staris interne, li decidis eniri. Li gestis al Karina Frisk:

“Ĉu vi povus liberiĝi minuteton?”

“Momenton! Mi petos permeson.”

Ŝi tuj revenis jesante. Manke de diskreta loko en la apoteko, li proponis al ŝi apudan kafejon.

“Mi min demandas, ĉu vi mensogis al mi”, li diris incite, kiam ambaŭ sidis sur la komfortaj seĝoj.

“Ne mi”, ŝi simple respondis, atendante klarigon.

“Ŝajnas, ke Paŭlo Jorli aĉetadis ĉe vi medikamentojn, eĉ freŝdate”, li diris, elpoŝigante la kartonan skatolon kun la marko “Popola Apoteko”. “Tion oni trovis ĉe li.”

“Mi de antaŭ tre longe ne vidis lin en nia butiko”, ŝi diris same trankvile. “Sed tion ni facile kontrolos. Vian medikamenton oni ricevas nur kontraŭ kuracista preskribo, kaj ĉiujn preskribaĵojn ni registras.”

“Kio garantias, ke vi ne havigis tion al li, sen ĝin registri?”

“Mi ne estas freneza. La stoko devas egali la aĉetojn minus la vendoj. Nia librotenado estas strikta por produktoj postulantaj preskribon. Vi povos demandi la mastron.”

Post nelonge, Karal reestis en la apoteko, foliumante dikan libron. La kontrolo montris, ke efektive Paŭlo Jorli ne aĉetis tie kuracilojn submetitajn al la leĝo pri preskribo. Sed la koncerna libro entenis surprizon: du semajnojn antaŭ ol Paŭlo mortis, aĉetis la menciitan

kuracilon f-ino Marta Bolomaj, laŭ preskribo de d-ro Gutmanis!

Detektivo Karal petis f-inon Frisk inki al si la fingrojn kaj ilin premi sur paperon. Ŝi akceptis senkomente, kvazaŭ la fakto stari inter la suspektatoj ŝin tute ne koncernus.

Ree en sia oficejo, li komparis la fingrostampojn kun tiuj en la raporto. Ne povis esti dubo: Karina Frisk ne estis la persono, kiu manipulis la ujon. Pri tio Jano ne miris. Li sciis, ke ŝi estas inteligenta. Se ŝi farus krimon, ŝi tian eraron ne kulpus.

*

‘Ĉiam malfidu la propran inklinon’, konsilis al si polica detektivo Karal respondante la saluton de d-ro Gutmanis. Li sentis fortan simpation al la milda korfakulo, kies vizaĝo esprimis tiel bele miksaĵon el bonkoreco, anima simpleco kaj rafinita kulturo maloftan eĉ en la Sankta Valo de Tjazo, tamen neordinare riĉa je simpatiaj homtipoj.

“Sinjor' doktoro,” Karal komencis, nekonscie uzante la lokan elizion, “unu el viaj freŝdataj klientinoj estis iu maljuna fraŭlino, laŭnome Marta Bolomaj.”

“Preskaŭ okdekjara, ĉu ne vere?” respondis la kuracisto, samtempe traserĉante sian sliparon.

“Jes, mi memoras ŝin. Fenomeno, mi taksas ŝin. Kion vi deziras pri ŝi, se la devo respekti profesian konfidencon ...”

“Mi pensas, ke vi ne bezonas perfidi sekreton. Ŝi prezentis preskribon de vi por la sama medikamento, kiel Paŭlo Jorli, kaj mi volus scii, ĉu tiu preskribo estas aŭtenta.”

“Ĉu vi suspektas ŝin? Jes, tion mi povas konfirmi. Preskribis mi la kuracilon.”

“Se mi demandos kial, vi respondos, ke vi juĝis tion plej bona ŝiakaze, aŭ ke precizigi viajn motivojn kontraŭus la regulon pri medicina sekreto. Mi do ne demandos.”

La kuracisto ridetis.

“Kaj tamen vi demandas, ĉu ne vere? Fakte, tiu persono fartas rimarkinde bone, se oni konsideras la aĝon. La koro tute sanas. Krom iom da reŭmatismo, peza digesto, malfacileco endormiĝi, ŝi suferas nenion. Almenaŭ fizike. Psike, kompreneble, estas alia afero.”

Li eksilentis, pripensante.

“Jes?” kuraĝige diris Jano.

“Ideoj de persekutiĝo. Vi tion certe rimarkis, ĉu ne vere? Tial mi ne komprenis, ke ŝi venas al mi, nekonata kuracisto, dum ŝi certe havas sian, kiun ŝi fidas. Tiaj personoj emas malfidi iun ajn krom kelkaj elektitoj.”

“Ĉu ŝi *bezonis* la medikamenton?”

“Bezonis? Hm. Korpe, certe ne. Psike, mi dirus jes. Ŝi bezonis, ke iu okupiĝu pri ŝi, patru al ŝi, kaj donu al ŝi ian ‘magian nutraĵon’.”

“Kiel ŝi klarigis, ke ŝi unuafoje venas al vi?”

“Tre rekte. Ŝi diris: ‘Mi aŭdis junulon rakonti, ke li ricevis de vi medikamenton por tiuj kaj tiuj simptomoj. Mi havas ekzakte la samajn. Bonvolu doni ĝin ankaŭ al mi.’ Ŝi parolis, kiel eta infano, kiu dirus: ‘Joĉjo ricevis karamelbombonon, ankaŭ mi rajtas ricevi unu.’ Tial ŝajnis al mi saĝa preskribi al ŝi la samon. Kiel mi jam diris al vi, tio estas sendanĝera …”

Ili ankoraŭ babilis kelkan tempon pri diversaj aferoj sen rilato kun la enketo, sed finfine Jano atingis la malagrablan parton de sia vizito: peti de la kuracisto fingrostampojn. D-ro Gutmanis montris kompatigan malĝojon:

“Do ankaŭ min vi suspektas?”

“Ne kaj jes. Mi suspektas neniun. Mia tasko estas, ne suspekti, sed kolekti kiel eble plej multe da informoj, faktoj kaj donitaĵoj pri ĉiuj. Pro cirkonstancoj, kiujn mi ne rajtas eldiri, fingropremaĵoj fariĝis grava elemento en la faktaro. Senkulpigu min.”

*

Ricevinte la fingrostampojn de la kuracisto, kiu post tio tre rapide remontris gajan mienon, la detektivo turnis sin al la apartamento, por renkonti s-inon Gutmanis. Ŝi aperis malpli timema ol la antaŭan fojon, kvazaŭ ŝi iel retrovis sian emocian ekvilibron. Sed pli ol ia ajn ŝi montriĝis laca, kaj kun terure laceca esprimo, miksita kun malgajo, ŝi submetis sin al la fingrostampa tasko. Ankaŭ ŝi komentis pri sia suspekteco, kaj al ŝi Jano respondis preskaŭ

samvorte, kiel al la edzo.

Reveninte oficejen, li komparis la fingropremojn kun tiuj trovitaj sur la plasta botelo.

Evidentiĝis, ke nek Karina Frisk, nek Lazár Gutmanis, nek ties edzino manipulis la kuracilujon. Nun necesis viziti maljunan f-inon Bolomaj.

18

La dekcentimetra malfermo, la ĉeneto, la longa nazo sur la kapo senkorpa: ĉio laŭis tradicion.

“F-ino Bolomaj, kiel do vi fartas?” Jano diris kun plej amika mieno.

“Eniru”, ŝi flustris, ne respondante la demandon.

Ŝi zorge fermis la pordon kaj lin kondukis kuirejen.

“Tason da kafo?” ŝi proponis.

“Kun ega plezur'”, li sanktavalis, sciante per longa sperto, ke kun tia persono uzi la lokan manieron paroli faciligas konfidemon. Li tuj aldonis:

“Ĉu vi ne trinkas tro multe da ĝi? Kun via kor' ...”

“Kion pri mia koro?”

“Nu, ĝi ne plu estas dudekjara. Aŭ eble tio ne estas ĝusta. Utilas distingi la ‘kardion’ disde la

‘koro’. Ĉar dudekjara kor' povas bati en okdekjara misfunkcia kardi'.”

“Kial vi snobas fakvorte? Ĉu vi venis raporti pri la polica sukces' kontraŭ la komploto, aŭ nur primoki mian sanon, kiu – Dio benatu! –” (ŝi kunigis la manojn preĝogeste) “stas perfekte perfekta sen via priokupo.”

“Tamen mi devas peti vian pardonon kaj demandi pri via sano. Kiel okazis, ke vi vizitis d-ron Gutmanis?”

Ŝi rigardis suspekte, hezitis, fine decidiĝis respondi.

“Foje mi pasigis teruran nokton. Mia koro kapriolis fuŝe-mise, jen haltis, jen galopis, kaj min trafis profunda maltrankvil', kvazaŭ nun estus la fino. Tio okazis iun mardon. Nu, merkredon mi laŭkutime alkursas, kaj jen mi aŭdas Belkapulon paroli al s-ino Mi-ne-manĝas. Jene: ‘Mi ne scias, ĉu mi restis eĉ dudek minutojn ĉe via doktora edzo,’ diris la knabo, ‘kaj jen li postulas de mi tiom, kiom mi ricevas por ok horoj da laboro. Vi burĝoj facile plenigas vian poŝon.’ Ŝi respondis: ‘Estas laŭtarife, kaj la asekur' pagas.’ ‘Jes,’ li diris, ‘sed kiu financas asekuron? La popolo, tute simple, ĉiam pagas la popolo.’ Kaj

li aldiris: ‘Pro eta kora misritmo, por paperaĉo, kiun li makulas per kuracilnomo, agnosku, ke tio ne stas donaco.’

Ktp ktp. Nu, sume kaj resume, mi eksciis, ke li havas ĝuste la saman kormalĝuston kiel mi, kaj ke tiu kuracilo efikas tute bone al li. Mi demandis de la ĉina kursestro: ‘Kiu stas tiu sinjorino?’ Kaj li diris: ‘Stas sinjorin' Gutmanis, la edzino de l' fama kordoktoro.’ Mi do decidis viziti la specialiston, kaj mi rakontis, kion mi aŭdis, esperante, ke li ne pagigos al mi la saman sumon.”

“Kaj kion li faris?” Jano demandis amuziĝe.

“Li aŭskultumis atente, min paroligis, kaj petis de mi la samon.”

“Ĉu vi akceptis?”

“Mi diris: ‘Tamen, sinjoro doktor', estas multekoste.’ Li ĝemspiris kaj diris: ‘Estas laŭtarife, kaj la asekuro pagos.’ Kion fari? Mi iris al la Popola Apoteko por la kuracil', kaj jen la tuta afero.”

“Kaj ĉu la kuracilo bone efikis?”

“Efikis? Verdire, nek bone nek malbone. Mi ne uzis ĝin.”

“Kial do?”

“Mi timis. Finfine la edzino eble stas unu el la komplotantoj. Kaj tiu junulo ... ĉu estis vera konversacio, aŭ koda transdon' de informo ... Ne, ne. Mi ne sentis min sufiĉe sekura. Tamen refoje mi havis malbonan nokton kun kapriola koro, kaj mi forte hezitis. Dumnokte, se la koro angorigas, oni pretas gluti ion ajn por sin savi ... Mi multe hezitis, sed fine decidis ne.”

“Vi do ankoraŭ havas la medikamenton. Ĉu vi bonvolus ĝin montri?”

Ŝi restis silenta kelkmomente, kun koncentriĝa esprimo. Finfine ŝi stariĝis, iris al meblo, kaj prenis el tirkesto skatolon similan al tiu trovita ĉe Jorli.

“Vi estas bonŝanca, ke mi ankoraŭ ĝin havas”, ŝi diris. “Mi intencis seniĝi je ĝi.”

“Ĉu vere? Pro kio do?”

“Komprenu min. Kiam mi eksciis, ke tiu junul' mortis venenita, mi pensis: ‘jen tro riska afero’ kaj decidis ĝin forĵeti. Sed mi estis interrompita, kaj nur nun, kiam vi parolis prie, mi ekmemoris ...”

Nur pene Karal tenis la vizaĝon senmova. Kun malrapido ŝuldata al la fortostreĉo, kiun li devis fari por regi sin, li diris:

“Mi devas peti, ke vi min akompanu al la policejo.”

“Kial?” ŝi demandis sen eĉ eta emocio.

“Rutinaĵoj”, li mensogis. “Vi baldaŭ vidos.”

“Ĉu la polico partoprenus en la komploto kontraŭ mi?” ŝi grumblavoĉe diris, tamen neniel rezistante lian peton. Ŝi surmetis mantelon. “Piedire?”

“Mia veturilo nin atendas ĉe la trotuaro”, li diris, surprizita ke ŝi ne kontraŭstaras.

Nur en la aŭto li demandis, milde:

“Kiel vi eksciis, ke Paŭlo Jorli mortis venenita?”

“Nu, ĉiuj scias, ĉu ne ... la gazetoj ... aŭ la sinjor' en la kurso ...”

Sed neniu gazeto menciis la aferon, kaj neniu kursano, eĉ neniu eksterpolica (krom Ĝoja kaj Stefano), fakte, sciis ion ajn pri la maniero, laŭ kiu Jorli mortis. Tio ĉiam restis severe observata polica sekreto.

Dum momento, kiam la veturado ne postulis grandan koncentriĝon, Karal rigardis sian apudulinon. Mire li rimarkis, ke ŝia vizaĝo sin formas al triumfa esprimo.

“Mi nun memoras”, ŝi bonhumore voĉis. “Mi ĝin vidis el la kartoj.” Ŝi tiel aludis sian ludkartan divenadon.

“Mankis nur tio”, Jano diris al si ĉagrene.

*

La fingrospura fakulo tuj konfirmis, kio al Karal ŝajnis jam preskaŭ certa: la fingrostampoj sur la medikamentujo estas tiuj de Marta Bolomaj.

Montriĝis, ke la medikamenton, kiun la maljuna virino donis al la polica detektivo, aĉetis Paŭlo Jorli en apoteko sur Fontabelstrato, laŭ preskribo de d-ro Gutmanis. Sur la ena plasta ujo troviĝis fingropremaĵoj nur de la junulo. Sur la ekstera kartona skatolo, la spuroj, pro la naturo de la materialo, ne estis sufiĉe klaraj por ebligi

identigon.

19

“Mi ne kontentas, mi ne kontentas”, grumblis la prokuroreja altoficisto. En lia oficejo kunvenis Karal kaj leŭtenanto Remon. “Jes ja, vi havas motivon: ŝi malamis la knabon, kiun ŝi persekutiĝe rigardis preta ŝin mortigi; vi havas manieron: interŝanĝi la du kuracilskatolojn; vi havas oportunan eblecon: dum la jako pendis enireje, ŝi facile povis interŝanĝi la skatolojn kaj lasi en lia jako la venenitan; vi havas pruvon pri ŝia manipulado: la fingrospurojn sur la ujo de l' mortigaj kapsuloj.”

“Unue min surprizis trovi tiom da precizaj fingrospuroj”, komentis Jano Karal. “Sed kiam montriĝis, ke estas la ŝiaj, ĉio iĝis klara. Ŝi estas ruza, sed ŝia menso funkcias kiel en la antaŭa jarcento. Ŝi nenion scias pri polica tekniko. Ankaŭ samkaŭze ŝi lasis tiel facile troveblan spuron en la apoteko. Pli moderna menso tiujn erarojn ne kulpus.”

“Jes. Vi pentras koheran bildon. Alia pruvelemento estas neatakebla: ŝi sciis pri l' veneno, dum por la ĝenerala publiko, eĉ la proksimaj amikoj, Jorli same verŝajne povis trafi morton akcidentan, aŭ ponardan, aŭ alian. Ĉu estas ia ŝanco, ke ŝi sciis el aliulo pri la venena teori'?”

“Ne,” respondis Jano, “krom se la ĉino raportis miajn demandojn, aŭ la apotekistino. Sed eĉ

tio estas vere neprobabla. Ne forgesu, ke ŝi malfidis ĉiun, eĉ la ĉinan kuiriston, pro lia nura ĉineco. Kaj la apotekistinon laŭnome ŝi ne konis. Mi eĉ dubas, ĉu tio sufiĉus por konkludi pri venenado.”

“Mi samopinias”, la altoficisto respondis. “Ŝi ne sciis tion el ekstere. Aŭ ŝi estus dirinta ĝin por sin defendi kontraŭ aresto. Do la kazo preskaŭ ĉiurilate estas kompleta. Kaj tamen io ĉagrenas min, kaj sendube ankaŭ vin, sinjoroj.”

“La elektitan venenon, ĉu ne?” diris la basa voĉo de leŭtenanto Remon.

“Jes. De kie do ŝi prenis ĝin? Kiel simpla kudristino povus havigi al si venenon tiel etkvante produktatan, tiel malfacile akireblan? Tio estas la mankanta er' en la akuza ĉeno. Sen ĝi ni povas nenion fari. Estas via tasko respondi ĉi tiun demandon, sinjoroj.”

20

Vespere venis Stefano.

“Mi vere estas mirinda detektivo”, li diris.

“Kial?” Ĝoja demandis, nekapabla subpremi ridon fronte al la komika vizaĝo de la nevo.

Ĉi-lasta okulumis:

“Kio signas bonan detektivon? Ĉu io alia ol nazo? Bona nazo, kapabla sekvi spure la krimulojn, kiel hundo la mastron? Nu, mi pasis sur la Granda Ponto, kaj jen odor' de cepoj, fungoj, fritiĝanta kokido, saŭco ruĝavina tiklis mian flarilon. Mi sekvis ĝin, salivanta kiel pavlova hundo, kaj jen mi estas, preta palati mian plej ŝatatan frandon ĉe mia kara onklino.”

Jano intervenis:

“Ĉiam ĝuema, ĉu ne? Nu, nu! Estas malbona preparo al la vivo havigi al junulo senpagan festenon. Mi onkle eduku vin. Vi pagos vian manĝon per informoj.”

Stefano sin turnis al Ĝoja:

“Ne estas viro, tiu ulo, nur informo-spongo. Dilema estas mia situaci'. Miaj vivprincipoj devigas min respekti spongojn, sed miaj edukprincipoj ne allasas kuraĝigon de perversa obsedo. Diru, Ĝoĝoj', kiel min elturni?”

“Ŝajnas al mi,” ŝi ridetis, “ke al junulo pli konvenas sekvi viv-ol edukprincipojn, kaj ĉiaokaze, je sia aĝo, via onklo staras ekster edukeblo.”

“La spongo do sorbu ĉiun mian informon. Pri kio, Kara-Karal?”

“Pri Landarte. Li instruas en via universitato. Ĉu vi konas lin?”

“Ho jes! Dadar' ni lin nomas. Mi sekvas lian kurson pri ‘Enkonduko en la strukturon de la bantuaj lingvoj’.”

“Kion vi pensas pri li?”

“Strangulo. Kontraŭ nia civilizo, kvankam li neniam vojaĝas al Afriko

sen magnetofon', fotoaparato, amaso da skribiloj kaj paperfolioj, plus kredito de la Scienca Esplora Fonduso.

Li ŝajnas al mi kompetenta, sed kiu povus lin kontroli?"

"Ĉu ne la afrikaj studentoj?"

"Kiam afrikano fariĝas studento ĉi tie, li scias malpli pri la primitivaj triboj ol eŭropa etnografo. Sed efektive, lingve, Landarte estas neatakebla. Afrikanoj diris al mi, ke li tre bone parolas almenaŭ la ĉefajn bantuajn lingvojn. Pri la cetero, ili diras, ke li komprenas ĉion fuŝe, kiel ĉiuj blankuloj pri Afriko. Kiel povus esti alie? Ĉu vi imagus iun el Farobel prelegi korekte pri la sanktavala menso?"

"Ĉu vi opinias lin kapabla murdi iun?"

"Dadar', murdi iun? Ne. Por murdi oni devas esti ĉu sangobola kaj mortigi la alian dum nesuperebla koler', ĉu organizita, kaj malvarme plani sian krimon paŝon post paŝo. Dadar' ne estas sufiĉe varmsanga por iam ajn koleri, kaj li estas tiel ĥaosa en siaj aranĝoj, ke li trafus sin antaŭ ol la viktimon."

"Tamen, por instrui en la universitato, oni devas kapabli ordigi sian penson!"

"Abstraktaĵojn, ideojn, jes, pli malpli. Kvankam videble vi miskonas la univon; alie, vi scius, ke multaj tie havas tre konfuzajn ideojn eĉ pri la propra fako. Dadar', siaflanke, kapablas bone verki artikolon pri la amaj metaforoj de zairiaj pigmeoj aŭ simila temo, sed naturo ne dotis lin riĉe sur la praktika tereno."

"Sed ĉu li povus kunplani la murdon kun iu alia?"

"Sincere, mi ne kapablas vidi en li krimulon. Des pli se temas pri murdi junan laboriston kun kuraĝaj politikaj pozicioj. Riĉulon, eble, aŭ sklav-ekspluatanton, aŭ industriiston, kies operacioj malbeligus afrikan pejzaĝon, aŭ afrikan ŝtatestron, kiu favorus iun afrikan lingvon super malgrandaj dialektoj, minacante tiujn perdigi ... jes, murdanta tiajn ulojn mi povas lin fantazii – kvankam nur kun granda imagostreĉo – sed ne kunlaboranta en krimo kontraŭ

Paŭlo Jorli. Ne. Se mia flar' ion valoras, mi konsilas sekvi alian spuraron ..."

21

La poŝto alportis du interesajn leterojn. La unua estis la respondo de Smarteaj Laboratorioj.

Neniu el la koncernatoj en la enketo iam ajn deĵoris en la esploro super Ĥalkomfalino. Tamen, necesas ĉion kontroli, kaj detektivo Karal, traleginte la liston, diris al la polica sekretariino:

“Izabela, vidu, estas iu Elza Jakubo sur ĉi tiu listo. Ĉu vi scias la fraŭlinan nomon de s-ino Gutmanis? Ŝi ja nomiĝas Elza, ĉu ne?”

Sed la edzinon de l' kardiologo oni nomis, en ŝia fraŭlina tempo, Elsa Ŝlojme. Tiu vojo do nenien kondukis.

La dua letero ...

*

“Oj! La dua letero”, Jano diris al sia edzino tiun vesperon, “... mi ne povas kvalifiki ĝin. Mi rompas al mi la kapon super ĝi ekde ĝia ricevo. Nun provu vi. Jen, legu!”

Ĝoja ĝin prenis kun intensigita sciemo. Ĝi tekstis jene: *Koncernas:* morton de Paŭlo Jorli

Sinjór Policano,

D-ro Lazár Gutmanis ne fanfaronas pri la vojaĝo, kiun li faris antaŭ nelonge en Afrík. Eble interesos la polico scii, ke li tiuokaze vizitis tre primitivajn regionojn en Angolo, Centrafrika Respubliko, Kongo, Tanzanio kaj Zairí. Kaj se ĝi farus taŭge sian taskon, ĝi esplorus, kion d-ro Gutmanis faris en la zairia konsulato ĉefurba pasintan merkredon.

Saluton ricevu de

Zorga Civitán.

“Efektive”, solvorte komentis la edzino.

“Estas pura frenezaĵo”, Jano plende diris. “Krom la krimulo, neniu eksterpolica scias, ke Paŭlo mortis pro afrika veneno. Sendi tian leteron signifas riveli, ke iu krom Marta Bolomaj scias, ke okazis murdo, kaj kiamaniere. Plie la letero, kvankam strangaspekta, videble estis skribita mane. La policaj skribspecialistoj tiel havos indikaĵon por

trovi la sendinton.”

“Kiam ĝi estis poŝtita?”

“Hieraŭ vespere, kio montras, ke ne povus esti sindefenda taktiko de f-ino Bolomaj. Ŝi estis enŝlosita en la polica flegejo tiutempe! Kvankam tia stultaĵo povus esti frukto de ŝia malsana cerbo. Diru, Ĝoja, kio estas via ĝenerala impreso pri la tuto?”

“Ĉio impresas mise. Ne estas facile diri kial. Multaj detaletoj kune, verŝajne.”

Iu sonorigis ĉe l' pordo. Ĝoja iris malfermi. Ĉe la unuaj elparolataj silaboj, Jano jam sciis, kiu venas.

“Estis nemanĝeble en la studenta restoraci',” sonis la voĉo stefana, “mi do pensis: miaj karaj geonkloj, kiujn la ŝtato salajras malavare, kompatos malsatan studenton kaj lin regalos per eta sandviĉo.”

“Kial vi iras al la studenta restoracio? Ĉu juna garaĝisto ne povas vivteni sin?”

“Mi estas nur duona meĥanikisto. Ĉi-vespere estis la vico de la duona studento.”

“Bone, bone, ni manĝigos vin”, diris la detektivo. “Eble eĉ vi povas nin helpi. Kion vi opinias pri ĉi tiu skribaĵo?”

“Ho! Kia eksterordinara skribo! Mi opiniis, ke la sendantoj de sensubskriba leter' niaepoke uzas vortojn kaj literojn eltonditajn el gazeto, sed ĉi tiu havas alian teknikon. Ĉu li estas paralizita?”

La letero estis skribita inke, kaj la maniero, laŭ kiu la literoj kaj vortoj estis formitaj, efektis tre strange, kvazaŭ la aŭtoro estus maljunulo, primitivulo aŭ infaneto apenaŭ scipovanta skribi.

“Treege interesa por lingvisto-studento, treege interesa!” Stefano daŭrigis streĉatone.

“Jes, ankaŭ la lingvaĵo min tiklis. Kion vi opinias?” Jano demandis.

Pensigas pri parlamenta teksto antaŭ paso tra la lingva sekci'. Rigardu: la uzo de *Sinjór* kaj *Zairí* kun supersigno estas pure sanktavala. Tamen neniu en la Valo uzus elizion en *Afrîk* ...”

“Ĉu vere?” demandis la onklo.

“Vi tion scias, oĉjo. Vi jam delonge loĝas ĉe ni. En Sanktavalo, la arto uzi elizion estas tre flegata, eĉ en la plej malaltaj tavoloj de la socio. Ĉe ‘eksplodaj’ konsonantoj – kiujn vi en la ĉefurbo nomas ‘plozivaj’, t.e. *p, t, k, b, d, g* – ni neniam uzas ĝin; nur post fluantaj sonoj aŭ

vokaloj ni forigas *o*-finaĵon. La vorto *Afrīk* kun supersigno estas neeblaĵo. Ĝi signas iun, kiu, ne konanta nin bone, volis imiti nian lingvokutimon.”

“Kial vi parolis pri ‘parlamenta teksto’?”

“Ĉar estas karakterizoj de malsamaj lokoj. La elizio montras al Sanktavalo, sed la forlaso de akuzativo en ‘interesos la polico’ estas tipa pri Farobel. Sanktavalanoj estas tre bone trejnitaj pri akuzativo, male al tiuj sovaĝuloj de Fa...”

“Kiujn vi nomas *no-misuloj*, ĉar ili misuzas la finan *n*”, interrompis Jano.

“Aliflanke, la vorto *konsulato* indikas al la ĉefurbo aŭ al ie norde. Kiel en Farobel, tiel ankaŭ

en Sanktavalo kaj en la aliaj regionoj, escepte de kelkaj norde, oni dirus *konsulejo*.”

“Ĉu vi estas tute certa?”

“Onklo! Ankaŭ vi estas certa. Ĉi-parte, ni ne estas snoboj, kaj sekve ŝatas simplajn vortojn.

Krome, ni estas inteligentaj, tiel ke kiam iu diras: ‘ *La Sekretariejo anoncis*’ aŭ ‘ *La Oficejo decidis*’, ni scias, ke agis ne la brikoj, ŝtonoj aŭ betono, sed la koncerna instituci'. Dum vi en la nordo devas diri *Sekretariato* aŭ *Buroo*, time ke via popolo komprenos, ke jen konstruaĵoj ekkapablis paroli aŭ decidi. Ne, ne. Eĉ farobela snobo neniam dirus *konsulato*.”

“Vi pravas. Tiujn tri punktojn ankaŭ mi rimarkis.”

“Ili frapis ankaŭ min”, intervenis Ĝoja, kiu aldonis: “Sed kiel ilin interpreti?”

“Masko”, Stefano respondis. “La intenco estas maski la devenon de la skribinto. Li timis, ke, sen tiu ruzo, lia stilo lin perfidos.”

“Sed tamen, ĝi liveras informojn pri la verkinto,” Jano diris, “ĉar ni

scias, ke ne povas esti persono el malalta socia tavolo.”

“Konsentite”, aprobis Stefano. “Simpla metiisto aŭ kamparan' el Farobel, Kiŝota aŭ ĉi tie uzus la propran dialekton senkonscie. La uzo de *konsulato* signas iun el la nordo, kiu provas imiti nin, aŭ iun el ĉi tie, kiu havas sufiĉe vastajn kontaktojn aŭ vojaĝajn spertojn por koni la diversajn kutimojn.”

“Tiu letero rompis al mi la cerbon”, plendis la detektivo. “Se ni ne ricevus ĝin, la dosiero forfermiĝus por ĉiam post kelka tempo. Ni pensis, ke Marta Bolomaj havis, eble antaŭ tre longe, konaton, kiu vivis en Afriko: misiiston, geologon, agronomon, iun ajn aventurulon, kiaj ekzistas en ĉiu familio. La venenon ŝi estus ricevinta de li kaj konservinta longatempe, dum la persekutiĝa strukturo enmense progresis, ĝis ŝi emis mortigi la junulon, kiu simbolis mondon timatan. Kompreneble ni estus serĉintaj, de kie la veneno venis, sed sen granda espero. Nun la kulpo de iu alia evidentiĝas.”

“La sola klarigo estas, ke sendis la leteron d-ro Gutmanis, pensante, ke li tiel fakte forturnos la suspekton”, opiniis Stefano.

“Sed tio estus ege riska!” Ĝoja rebatis.

“Kaj senutila, ĉar kun aŭ sen ĉi tiu letero, ni intencis funde kontroli la agojn de d-ro Gutmanis

…”

22

La polico efektive kontrolis, esploris, profundiĝis en detalojn, sed por akuzi d-ron Gutmanis ne troviĝis sufiĉa bazo.

“Psikologie ne eblas”, Karal diris al leŭtenanto Remon, resumante la lastajn esplorojn. “Ĉiuj konfirmas, ke d-ro Gutmanis estas samtempe tre inteligenta kaj tre praktika homo. Li ne enmiksus sin en tian komplikan planon, se li volus murdi propran klienton. *Sufiĉus ja, ke li donu al tiu venenan ‘kuracilon’ kaj mem subskribu la permeson entombigi.* Neniu suspektus ion ajn. Eĉ rapida enketo ĉe la konatoj de l' viktimo pruvus, ke Jorli fojfoje plendis pro momenteta korohalto kaj kora misritmo. Kaj Gutmanis estas tro inteligenta por bazi sian planon sur tiel nefidinda persono kiel Marta Bolomaj. Ke li vojaĝis tra Afriko, estas fakto, kaj ankaŭ, ke li vizitis la zairian konsulejon. Sed li havas tre kompreneblan motivon por ambaŭ

aferoj. La vojaĝon li faris kun grupo da kuracistoj, kiuj interesiĝas pri etno-tradiciaj manieroj kuraci, kaj li iris al la konsulejo por informiĝi pri bofrato lia, kiu praktikas medicinon en izola loko zairia, kaj pri kiu li ne havis novaĵojn jam longe. La konsulejo konfirmis la aferon sen ia problemo.”

“Ĉu povus esti lia edzino?”

“Kion ŝi profitus el tia akuzo? La edzo estas ŝia monprovizanto, kaj ili relative bone akordas.

Krome, la letero atentigas pri li, do ankaŭ pri ŝi. Motivon nek la edzo, nek la edzino havas.

Ke Paŭlo ŝin incitis kaj allogis samtempe tamen ne sufiĉus. Ŝi vidis lin nur unu fojon semajne apenaŭ kelkajn monatojn. Li ne estis ŝia amanto, kaj ŝi ne deziris intiman rilaton kun li, eĉ se ŝia tro sentema koro kelkfoje bategis pro lia beleco. Ne pro tio oni murdas.”

“La letero estis manskribita, sed kio pri la koverto?” demandis la leŭtenanto.

“Tajpita. Sur skribmaŝino de la Gigant-magazeno. Ili havas kelkajn elmontratajn skribmaŝinojn. Iu ajn iras tien kaj tajpas. Ni pridemandis la vendistinojn, sed ili diris, ke estus neeble rekoni iun. Estas tro da personoj, kiuj venas, pasas, provtajpas kaj foriras sen ia demando.”

“Kion konkludas la fakuloj pri la skribmaniero?”

“La leteron la verkinto skribis anserplume, kiel en la malnova tempo. Ili pensas, ke li tenis la plumon per la dekstra mano, sed ĉi-lasta ne moviĝis mem, ĝin gvidis la maldekstra, tenante ĉu la dekstran manon, ĉu la dekstran brakon. Ĉar la dekstra mano ne premis la paperon, ĉiuj kutimaj personaj detaloj, kiujn vidigus mikroskopa studo, ĉi-kaze ne aperis.”

“Kion diras la maljunulino. Ĉu ŝi neas plu?”

“Jes. Kaj kun granda konvinko ŝi asertas, ke ŝi eksciis kartodivene pri la venenado de Jorli.

Pri la fingrospuroj ŝi havas neniun klarigon, kvazaŭ tio ne povus esti serioza afero. Ŝia menso ne konformas al la ideoj de nia scienca jarcento.”

“Kion pri rilato kun Afriko?”

“Nenion, neniu parenco aŭ amiko iam ajn iris tien. Ŝi ne konis afrikajn studentojn, aŭ

etnografojn, aŭ misiistojn. Se konsideri ŝian socian devenon, tio ne mirigas. Ni estas certaj.

Ni ĉion kontrolis.”

“Kion do vi faras por solvi la enigmon, kiamaniere ŝi akiris la venenon?”

“Rutinon. Ni serĉis ĉe la parencoj, najbaroj, amikoj, k.s., kaj eliminis ĉiujn. Krom tio estas du eblecoj: la kurso de ĉina kuirado, kaj la kartodiveno. Ŝi havas rendevulibron por la kartodivenaj klientoj. Bedaŭrinde multajn nomojn ŝi skribis ne tute, ĝenerale estas nur la komencliteroj. Pri tio iom nin helpas la kvartalaj policistoj: ili bone konis ŝin, kaj havas kelkan scion pri la klientaro, ĉar la policejo troviĝas tre proksime. Tamen, estus interese havi kompletan liston.”

“Jes, eble vi havos ŝancon, se vi sukcesos koni ĉiujn konsultantojn.”

“Ni ne havas alian eblecon, krom, eble ...” Jano abrupte interrompiĝis.

“Krom eble?” ripetis Remon.

“Ĉu vi permesus, ke mia edzino vizitu ŝin? Ŝi estas psikologino, eble sukcesos paroligi ŝin pli bone ol ni. Ŝi povus diri, ke ŝi venas por

kartodivenado.”

“La maljunulino suspektos.”

“Vi ne konas Ĝojan!”

“Ho jes, mi konas ŝin. Se iu povas paroligi f-inon Bolomaj, tiu estas via sinjorino. Konsentite.

Ĉiaokaze – li okulumis amike – mi supozas, ke Ĝoja scias ĉion pri la kazo.”

“Ŝŝ!”

“Se ŝi aŭ ŝia nevo diris ion al iu, kaj tiel disvastiĝis la informo, ke Paŭlo estis venenita, nia kariero suferus teruran baton.”

“Mi tion perfekte konscias, sed ne havas eĉ timeton.”

“Bone! Ŝin gvidu fortuno!”

23

Laŭ decido juĝista, Marta Bolomaj estis translokita al psikiatria hospitalo. Tie ŝin vizitis la edzino de Karal.

“Mi vidis vian anoncon en *Tribún*”, ŝi komencis, “kaj provis vin renkonti, sed ... Dank' al via pordistino mi fine vin trovis en ĉi tiu hospitalo.”

La loko belegis. Ili troviĝis en ĝardeno plena je ĉiuj printempaj parfumoj. Antaŭ ili etendiĝis herbejo kovrita de lekantetoj. La benko, sur kiu ili sidis, staris kaŝite de tre maljuna kverko, tra kies branĉoforko videblis, iom malproksime, sed tamen spirhaltige bela, la Blureva lago.

En tia dibenata tago, ĉi-lasta pli ol iam pravigis sian nomon: revige blua ĝi estis senkonteste.

“Kiel vi nomiĝas?” demandis la maljuna virino.

“Ĝoja Farnadzo”, respondis la alia, uzante la fraŭlinan nomon.

“Farnadzo? Ĉu hazarde vi ne devenus de Altafago?”

“Efektive, tie profundas miaj familiaj radikoj.”

“En Altafago mi havis gekuzojn. Jes. Pluraj Farnadzoj vivis tiuregione. Unu estis forĝisto.

Kia fortikulo! Li svenigus ĉevalon per bato de l' nuda man'. Mi bone memoras lin. Sed vi estas tro juna por lin koni. Bela vilaĝo, Altafago. Mi ŝatus tien reiri foje.”

Dum silenta minuto, ŝiaj okuloj perdiĝis en memorojn.

“Ĉu vi povus kartodiveni por mi?” iom timeme demandis Ĝoja.

“Kartodiveni? Nu, nu, vi venis por tio, ĉu ne? Aŭskultu, kara, mi ne povas. Ial nuntempe mi ne povas. Oni bezonas specialan staton, vi sciu. Kaj ĉi tie, ĉio estas tro malsama ... Mi sentas min laca, ege laca. Ili metis min en hospitalon! Kvazaŭ mi estus malsana. Pli sana kaj prudenta ol multaj mi tamen estas.”

“Vi aspektas bonfarte, tio estas vera”, komentis Ĝoja.

“Bonfarta, kaj bonkapa! Sed estas komploto. Eĉ la polico kunkomplotis por min tiri el hejme.

Mi ne plendas. Ĉi tie estas bonaj manĝoj, bela parko (ĉu vi vidis la lagon trae?). Tamen mi emas esti sendependa. Aliflanke, sola kontraŭ komplotantoj, kion mi povus fari?”

Ŝia rigardo pasis super la okulvitroj, metitaj malalte sur la nazo. La vizaĝo tiel ricevis komikan aspekton, kiu tute ne kongruis kun komplota atmosfero. La okuloj, nun fiksitaj al Ĝoja, plenis je inteligento.

“Strange,” ŝi diris, “vi iom similas al Hektór Farnadzo. Tamen Farnadzo stas la nom' de via edzo.”

Dum sekundo, Ĝoja kulpmiene rigardis sian edzoringon, sed ŝi tuj sin regis kaj elturnis:

“Mi edziniĝis al iu samnoma, verŝajne tre malproksima kuzo. Sopire pri la hejma vilaĝo, sendube.”

“Ankaŭ Hektór Farnadzo stis bela. Li ...”

“Estis mia avo”, Ĝoja mallaŭte diris. “Vi do trovis lin bela, ĉu?”

“Jes, bela. Sed vire bela, ne kiel tiu alia ...”

“Kiu?”

“Beluleto, pro kiu mi stas ĉi tie. Mi ne klarigos al vi. Stus tro komplike.”

“Li estis vere bela, ĉu?”

La maljunulino rigardis antaŭ sin. Laŭŝajne, ŝi duonforgesis la ĉeeston de Ĝoja. Trankvile ŝi daŭrigis:

“Li havis la belecon de l' diablo, kiel diradis mia kliento. Tio stis tute ĝusta. Diabla beleco.

Mi kvazaŭamis lin, ĉar li stis bela, gaja, sprita, kaj alifoje malfeliĉa, senkuraĝigita, tiel laca, ke tio vekis kompaton. Patrinan kompaton. Mi kvazaŭamis lin. Sed mi lin malamis, ĉar li volis ĉion detrui, bruligi la domojn, la magazenojn, mortpafi la Di-kredantojn. Li komplotis kun tiu alia pseŭdo-fortulo. Ne kiel via praonklo André Farnadzo, kiu fortis virbove. Ne. La alia stas teatra fortulo. Ĉio ŝajna. Sen vera energi'.”

Aŭskultante kun streĉita atento, Ĝoja mense notis, ke iu kliento de Marta Bolomaj konis Paŭlon Jorlin. Por la enketo gravus scii, kiu. Sed rekte demandi verŝajne vekus suspektojn, kiuj povus instigi al falsa diro aŭ eĉ al rifuzo paroli plu. Ŝi do decidis fari poste diskretan demandon.

La maljunulino eligis profundan ĝemspiron kaj daŭrigis:

“La beleco de l' diablo. Estis tute prave. Li logis min per io anĝela survizaĝe. Ho, kiom li logis min! Sed lia parolo stis infera. Detrui, detrui, detrui. Fajro, fajro, fajro. Kaj malamo.

Nur tiavorte li parolis. Kaj mi sentis, ke mia koro tremas, ke mi ... ke mi volus protekti lin, kiel ŝafidon oni emas defendi. Jes, mia koro tremis. Mi sciis, ke li komplotas. Mi aŭdis, ke li planas revolucion. Mi aŭdis per propra orelo. Kaj li igis min senti amon, teneron, kompaton al li. Diabla beleco. La diablo stis anĝelo, ĉu vi scias? Anĝelo, kiu rifuzis Dion. Tiu knabo stis nehoma. Anĝelo, kiu kraĉis al Di'. Ĉu tion vi elportus? Kiu sankora tion elportus? Tial mi likvidis lin. Laŭ lia principo: likvidi la aliulon, antaŭ ol tro malfruas. Stis facile interŝanĝi la skatolojn ...”

Ŝi haltis, ĉiam plu reve rigardante la pejzaĝon. Kaj subite ŝia esprimo ŝanĝiĝis kaj ŝi turnis al Ĝoja samtempe serenan kaj humuran vizaĝon.

“La polico ĉion scias. Sed kiam ili demandas min, mi neas”, ŝi eligis etan ridon, kvazaŭ la ideo ŝin amuzus. “Mi neas, estas ludo. Mi scias, ke ili scias. Sed ili ne scias, ke mi scias, ke ili scias prave. Ili dubas. Tio stas mia forto, mia supereco: ili dubas, kaj mi havas certecon. Sed sufiĉe pri tio. Mi konfidis al vi, ĉar vi memorigas min pri Hektór Farnadzo. Farnadzo el Altafago ne povus sti komplotanto, ĉu?”

“Kiel oni povus deziri al vi malbonon?” Ĝoja diris kun aŭdebla sincereco.

“Tion vi ne povas imagi, ĉar via koro estas pura. Sed ve! Se vi nur scius ...”

Ŝvebis momento dense silenta.

“Ĉu multaj personoj vin konsultas?” Ĝoja demandis, taksante favora la momenton.

“Ho jes”, Marta respondis, kun videbla fiero. “Ili ĉiam miras pri mia kapablo tiom scii el la kartoj.”

“Kiaspecaj homoj?” diris Ĝoja, esperante, ke per tiuj du vortoj ŝi sukcesos ricevi kelkajn utilajn informojn.

“Ĉiaspecaj”, klarigis la alia. “Riĉaj kaj malriĉaj, inteligentaj kaj stultaj, multaj, pri kiuj vi neniam aŭdos, kaj kelkaj bone konataj en la urbo. Ĉu vi aŭdis pri prof. Birnbaŭm? Li min regule konsultas. Amuze, alia ulo, kiu min ankaŭ konsultadis, kvankam tute ne parenca al li,

havas vere similan aspekton. Sen miaj okulvitroj mi ilin konfuzus! Fervojisto li estas, laŭnome Kiŝ. Li venigis al mi multajn klientojn: vitriston Rubor, butikistinon Petretan, kaj bravan dikan Karmonen, ankaŭ fervojiston. Iu f-ino Hari, sekretariino, parolis pri mi al sia mastro, riĉulo Agarjan, kaj ankaŭ tiu nun min vizitas regule. Vi konas la nomon, ĉu ne? Li estas bone konata, kiel aliaj el miaj konsultantoj: firmaestro Ervin, eksdeputito Durivér, aktoro O-...”

Dum Marta Bolomaj, kun la videbla ĝuo de iu sin gratulanta pri la propra sukceso, elbobenis liston ŝajne kompletan (eble eĉ pli riĉan, ol vero postulus!), okazis al Ĝoja unu el tiuj travivaĵoj, kiujn teoriaj mensoj povus trovi eviteblaj, sed je kiuj fakte abundas la vivo reala: dum momento ŝia animo estis skuata de sovaĝa ŝtormo, en kiu fiero, memoroj, ĝojo, timo, pensoj, deziro kaj panika sento interkoliziis en vasta karambolado. Ĉio ĉi komenciĝis per la plaĉa konscio, ke la maljunulino efektive citis nomojn. Sed baldaŭ enŝteliĝis pensoj fiera:

‘estas grave por la enketo’ kaj bedaŭra: ‘domaĝe, ke mi ne povas noti’. Ĉi-lasta naskis timon:

‘se mi ne sukcesos ĉion memori, kion diros Jano?’, sekvatan de pli kaj pli streĉa traserĉo de la iamaj psikologiaj studoj: ‘Kiam mi studis memoron, ni faris eksperimentojn pri la mensa konservo de listoj de sensencaj silaboj. Konkludo estis, ke el tia listo oni memoras plej bone la unuajn kaj la lastajn erojn. Mi do koncentru mian atenton sur la mezajn ...’. Tiam venis paniko: ‘Ej! Anstataŭ aŭskulti ŝin, mi pensas pri teoriaĵoj! Kion ŝi estis diranta?’

Efektive, dum la ĉi-supraj sentoj kaj pensoj ŝtormis perturbe, la ekskudristino disvolvis plu la nomaron, kiun Ĝoja perceptis kvazaŭ malproksiman, periferian zumadon, el kiu reeĥis malesperige en la menso nur areto da sensencaj silaboj.

‘Stulta mi estas,’ Ĝoja koleris kontraŭ si, ‘mi perdis unikan okazon.’ Sed, kun la filozofeco de homo, kiu konas la propran malforton, kaj el ĝi dramon ne faras, ŝi tuj retrovis sian ekvilibron. ‘Ba! Pli poste venos alia okazo ...’ ŝi pensis trankviliĝe.

Marta Bolomaj dume parolis plu:

“Mi trovas vin plej aminda, mia kara,” ŝi diris, “sed tamen al mi estus neeble. Mi sentas, ke mi ne povas nun kartodiveni. Tro da emocioj mi havis lastatempe. Eble alian fojon?”

*

Sed alia fojo ne estis. Veterŝanĝo alportis subitan malvarmon. F-inon Bolomaj kaptis pneŭmonio. Ŝia maljuna korpo ne vivis “trae”, kiel ŝi estus dirinta. Laŭ la opinio de la flegistinoj, ŝi ne vere deziris vivi plu. Ŝi forpasis serena.

24

“Venontfoje, uzu magnetofonon”, Jano diris incitete.

“Ne, ne, ne kaj ne! Tio por mi estus krimo”, Ĝoja indignis. “Sanktavalo eble estas la sola region' en la mondo, kie oni respektas la Homan Personon” – la grandliteroj percepteblis en ŝia tono – “kaj tia ĝi devas resti. Surbendigi la parolojn de iu, kiu ne suspektas vian faron, estas ... estas ...” ŝi ne trovis la vorton, “nu, mi kontraŭas plej firme. Estas hontinda trompo.”

“Sed vi diris, ke vi edziniĝis al kuzo. Ĉu tio ne estis trompo?”

“Grrr!” ŝi respondis kolere.

Li amis ŝin koleran. La okuloj brilis, la nazo tremetis kaj en la bele formitaj lipoj desegniĝis strecĥo tiel intensa, ke impresis, kvazaŭ trapasos fajro. Sed ĉefe la digna relevo de la brusto, la firma tonuso de la tuta korpo vekis lian aman admiron. Vidi ŝin kolera, li pensis, estas kvazaŭ

konkrete percepti fabelan koncentriĝon de energio. Ĝi enhavas kosman dimension.

“Ne estas same”, ŝi provis sin defendi. “Mi diris, ke mi radikas en Altafago, kaj tio estas ver'.

Mi diris, ke mi estas nepino de Hektór Farnadzo, kaj tio estas ver'. Mi diris: ‘kiu povus deziri ion malbonan al vi?’, kaj tio estis vere miaj penso kaj sento, ĉar mi trovis ŝin tre kara. Mi devis iom ruzi, efektive, kaj preferus ne, ĉar mi abomenas trompon. Sed inter tia eta-eta mensogeto kaj la spiona uzo de magnetofon' estas sojlo ne surpasenda. Se oni komencos tiel surbendigi senaverte, post kelka tempo oni aŭskultos privatajn konversaciojn ĉe telefono, aŭ

malfermos leterojn en polica oficej'. Tiel naskiĝas policaj ŝtatoj diktatoraj.”

“Ne koleru, kara, ĉu vi ne vidis, ke mi incitas vin pro la plezuro rigardi la fajron de via animo?”

“Stultulo!” ŝi respondis, duonkolere-duonindulge.

“Vi radias kosman belecon, dum vi koleras, kaj mi amegas vin tiam; sed se daŭras tro longe, mi ne ŝatas.”

“Ĉu vi ne povus amegi min, eĉ kiam mi estas trankvila?”

“Jes, certe, sed, vi scias, iom da vario, tio spicas.”

“Nun, pro via incita ludo, mia pensoĉen' estas des pli definitive rompita.”

“Nu, estus nehome postuli, ke vi memoru tian liston da nomoj. Ni eĉ ne scias, ĉu ŝi ne fanfaronis. Vi menciis Birnbaŭm, Kiŝ, Rubor, Durivér. Se aliaj revenos al via konscio, notu ilin. Se ne ... Nu, nu ... Mi provos ne bedaŭri la mankon de sonbendo.”

*

Jano malbone dormis. La sonĝo efikis turmente. Li sentis ion, serĉis, palpis, ne trovis. Voĉo virina ridaĉis ripetante: “Ĝin faris tiu, kiu per ĝi profitas ... ĝin faris tiu, kiu per ĝi profitas ...

ĝin faris tiu, kiu per ĝi profitas ... hahahahaha!” Kaj li sentis sin bubeto mokata de rondo el knabinoj. Poste la knabinoj venis al li kun pleto, sur kiu prezentiĝis abundaj beraroj.

“Vinberoj, vinbero, vinber' ...” ili diris, kun la sama moka rido. Sed kiam li volis kapti la fruktojn, la knabinoj fuĝis for, dum reeĥis longe en li, kvazaŭ mistika melopeo, la konstante ripetata trivorto: “vinberoj-vinbero-vinber', vinberoj-vinbero-vinber' ...”

*

En preskaŭ ĉiu enketo de Jano Karal, okazis nokto, kiam li faris speciale vivajn sonĝojn, ĉirkaŭatajn de neordinara etoso, kun impreso, ke gravas memori kiel eble plej multe da detaloj.

Kutimo establiĝis ĉe la geedzoj tiurilate: tuj kiam estis oportune, Jano rakontis sian sonĝon, kaj Ĝoja lin helpis pritrakti ĝin. Tiun pritrakton ili nomis ‘akuŝado’, kaj ĝi efektive ĝenerale kondukis al interesaj ideoj.

Laŭ Ĝoja, sonĝo havas plurajn signifo-nivelojn. Ekzemple en la ĵus farita de Jano, ŝi rekonus, kiel unuan nivelon, memorojn el infanaĝo: sentojn de eta bubo malsupera al pligranduloj aŭ

malkontenton de knabo, kiu ne povas ĝui tuj, kion li deziras. Oni ankaŭ povus vidi, kiel alian nivelon, la malagrablan senton de l' plenkreska detektivo provanta sensukcese solvi misteran problemon. Sed – kaj pro tio Ĝoja volonte rolis kiel akuŝistino – oni ankaŭ povas distingi nivelon de problem-ellaboro.

“Ŝajnas, ke vi ne sufiĉe atentis la profitanton, en tiu ĉi enketo”, ŝi afable diris. “Via dorma konscienco tion riproĉas al via taga rolul'.”

“Efektive, nun, kiam vi diras tion, mi ekkonscias, ke en mia pensa serĉado pri l' krimulo, mi zorgis praktike nur pri personoj ne kun materia, sed kun *senta* motivo: amo, ĵaluzo, samseksemo, aŭ kun *politika*. Tiaj motivoj ofte agas reale. Ĉi-kaze, Marta Bolomaj mem konfesis al vi, ke ŝi mortigis Paŭlon pro duobla timo: timo al li pro komplotado, timo al la propraj sentoj, al la fakto senti sin logata al neakceptebla junulo. Sed mi efektive ne pensis, ke iu povus ricevi pure materian gajnon el la morto de Jorli. Unuavide, tio ŝajnas neebla. Sed povas esti, ke mi ne sufiĉe konsideris tiun eblon.”

“Alia eblo, kiun vi ĉifoje tute ne konsideris, estas ĉantaĝo. Ĉu ne povus esti, ke Paŭlo Jorli ĉantaĝis iun, pri kiu li sciis ion kulpigan, kaj tiu decidis ĉesigi lian vivon?”

“Tion mi pripensis, sed mi forĵetis la ideon: se Paŭlo ĉantaĝus, li ricevus monon, kaj tiu mono estus *ie*. Materie li ne estis tre sukcesa homo.”

“Ĉu li ne donus la monon al sia revolucia grupo?”

“Eble, jes. Ni eksciis, ke tiu aŭ alia agado, verŝajne farita de lia grupo, postulis pli da mono ol ĝi normale havus. Ĉu vi pravus, finfine?”

“Kaj kion signifas por vi ‘ *vinberoj*’? Estas ja vinberoj, kiujn vi provas kapti sensukcese en la sonĝo.”

“Vinberoj? Mi havas neniun ideon. Vinbero estas bero por vino. Sed tio elvokas nenion, kvankam ... Ideo trafulmis tra mia cerbo, sed mi tuj perdis ĝin. Incita afero. Nu, mi esperas, ke mi retrafos ĝin pli poste. Ĝi ŝajnis valora.”

25

“Leŭtenanto Remon petas vin iri tuj al lia oficejo”, Izabela diris, tuj kiam Karal revenis en la ĉefpolicejon.

Remon estis, kiel kutime, plej afabla.

“Mi ĝojas, ke vi jam revenis. Mi timis, ke mi devos sendi iun alian, kio ne tre taŭgus, ĉar vi ja okupiĝas pri ĉi tiu enketo.”

“Sendi kien?”

“Al interesa tasko. Ĉu via privata aŭto estas en la korto?”

“Jes.”

“Bone, vi uzos ĝin. Sur la voj' al Kastelnova, post la fervoja ponto, troviĝas granda benzinejo.

Estas sur la dekstra flanko, kiam oni eliras el Valĉefa. Ĉu vi konas?”

“Jes.”

“Laŭlonge de la vojo post la benzinej' staras vico da platanoj. Je la 10.30 ĉe la tria platano, vi vidos junulon altan 172 centimetrojn, kun nigraj buklaj haroj. Li havos brunan pseŭdo-svedledan jakon, brunan pantalonon, nigrajn ŝuojn. El la jakpoŝo eliĝos ekzemplero de *Tribún*. Li havos nigran dikan ledan sakon kaj gitaron, tenos mane kartonon, sur kiu grandlitere skribiĝis VALĈEFA kaj dikfingre veturpetos. Vi ne povas mistrafi lin, ĉar la indiko ‘Valĉefa’ estas absurda por iu, kiu forlasas la urbon. Li konas la priskribon kaj platonumeron de via aŭto, kaj de tiu de Izidoro, sed mi diris, ke plej probable venos vi, ne la kolego. Kiam li vidos vin proksimiĝi, li elmetos la kartonon. Vi haltigos la veturilon. Li venos al vi kaj diros: ‘Ĉu vi povas konduki min al Valĉefa?’ Vi respondos: ‘Al Valĉefa, sendube, ĉu tra Kastelnova aŭ tra Mirjago?’ Li respondos: ‘Stulta mi estas, ne al Valĉefa mi iras, sed al Kastelnova.’”

“Kun tia precizo, ne estas risko trafi iun malĝustan.”

“Efektive. Tion petis li. Li tre timas fuŝon.”

“Bone. Fuŝo ne okazos. Kiu li estas?”

“Trovaĵo de Izabela. Vi petis ŝin trovi manieron ekscii pri la

ekstremdekstra grupo, kontraŭ

kiu Jorli fojfoje agis. Ne estis facile. Sed vi konas Izabelan. Ŝi konas ĉiun kaj ĉion ĉi-urbe. Se ŝi ne konas rekte, ŝi konas iun, kiu konas iun, kiu konas iun. Aŭ ŝi scias, kie oni trovos informon pri loko, kie oni trovos informon pri ... ktp. Tiu junulo estas membro de la komitato de *Ordo kaj Disciplín*."

Telefono sonis. Antaŭ ol ĝin preni, Remon rapide vortis:

"Mi ne havas tempon diri pli. Iru. Li klarigos mem."

*

La vojo al Kastelnova, la fervoja ponto, la benzinejo, la tria platano: jen li estas. "Ĉu vi povas konduki min ...?" Ĉio okazis laŭplane.

Kiam la junulo sidis en la aŭto apud Karal, ĉi-lasta demandis:

"Kien ni iru?"

"Egale", diris bela basa voĉo. "Nur gravis, ke neniu sciu, ke okazas kontakto inter mi kaj la polico, kaj ke neniu aŭdu nin."

"Bone, ni iru direkte al Kastelnova. Mi aŭskultas vin."

"Ne estos longe. Ĉu vi scias, kiu kaj kio mi estas?"

"La ĉefo ne havis tempon klarigi."

"Jen. Kiam fondiĝis la faŝisma movado *Ordo kaj Disciplín*, la ĉi-tiea judaro ektimis. La memoro pri Hitler kaj liaj similuloj ankoraŭ tro freŝas. Juda organizo do decidis loki iun kiel eble plej alte en la hierarkion de la movado, por informi pri ĉia eventuala plano kontraŭjuda."

"Ĉu *Ordo kaj Disciplín* estas kontraŭjuda?"

"Fakte ne. Almenaŭ ĝis nun. Mi dubas, ke ĝi iĝos tia. Tiu faŝismo similas la nazian nur parte.

Sed estas nature sin gardi kontraŭ tia evoluo, ĉiam ebla."

"Kaj vi ..."

"Mi estas la judo, kiun oni sukcesis sekrete elektigi al la komitato. Malagrabla pozicio, kredu min. Mi estas spiono, kun ĉiuj danĝeroj

ligitaj al tiu rolo.”

“Jes, mi komprenas. Ĉu vi scias ion pri Jorli?”

“Nia movado ne prenis lin serioze, ĝis la tago, kiam evidentiĝis, ke lia revolucia grupo havas monon, kiun ĝi kapablas uzi kontraŭ ni. *Ordo kaj Disciplín* estas bone organizita, kun mensostrukturoj indaj je polica ŝtato. Ĝi decidis enketi pri tio. Mi resumos al vi la malkovrojn: 1) La grupo de Jorli estas ligita al internacia organizo de samaj grupetoj; 2) ĝi ricevis monon de tiu organizo; 3) ili funkcias laŭ la sistemo: nur unu persono rilatas kun aliaj ĉeloj, time, ke la sekretoj diskoniĝos; 4) Jorli estis la peranto kun la organizaĵo; 5) li regule renkontis viron, kiu transdonis al li monon, kaj verŝajne instrukciojn.

“Mi donos tuj al vi fotokopion: folion kun listo, bedaŭrinde nekompleta, de tiuj renkontoj, kaj foton de la koncerna viro kun Jorli; ilin sukcesis foti unu el niaj enketantoj.”

“Diable! Vi estas pli bone organizitaj ol la polico!”

“Estas ekzakte tio, kion diras niaj membroj. Ili rigardas la policon aro da ripozemuloj, kaj decidis trejni sin por la tago, kiam sukcesos la maldekstremuloj kaj demokratia polico disrompiĝos. Eble la polico devus pli okupi sin pri tia grupo, kia *Ordo kaj Disciplín*.”

“Ne ekzistas politika polico ĉe ni, kaj ni jam havas sufiĉe por fari sen tio. Sed la polica ludo de viaj kamaradoj tre utilas ĉi-kaze. Kvankam la ideo, ke nin helpas faŝista bando al mi ne plaĉas.”

“Ne faŝista bando vin helpas, sed kontraŭfaŝista judo, kiu spionas ĉe ĝi. Sen mi, vi scius nenion. Ĉar ili transdonus nenian informon al la polico, kredu min.”

“Kiel ili eksciis pri tio, ke la grupo de Jorli estas ligita al pli vasta organizo?”

“Per la fanfaronado de kelkaj anoj de la ‘revolucia grupo’. Ili supozis, pro diversaj faktoj, ke la grupo disponas pli da mono ol tiuj junuloj povus kotizi, kaj iĝis verŝajne, ke Jorli estas la

haviganto. La knaboj, kiuj ŝatas ludi detektivojn, decidis sekvi lin ĉien. Ili asertas, ke ili propraokule vidis la fotitan longharulon transdoni monbiletojn al Jorli.”

“Interesege. Kie ili renkontiĝis?”

“Diversloke. Lokolisto estas sur tiu ĉi folio.”

“Jorli do aperis por via movado kiel danĝera. Ĉu eblus, ke *Ordo kaj Disciplín* kaŭzis lian morton?”

“Absolute ne. Tion mi scius. Mi sidas en la komitato.”

“Sed aparta membro, proprainiciate?”

“Ne. Disciplin' en tiu movado estas ne nur vorto, sed realaĵo. Mi ne ŝatas tiun movadon, sed mi povas garantii, ke neniu membro de ĝi iam ajn murdis.”

“Ĉu viaj enketantoj eksciis ion pri la longharulo, kun kiu Jorli rendevuis?”

“Ne, ili ne sukcesis. Li estas nekredeble lerta por forvojigi sekvanton. Nur spurante Jorlin ili vidis lin kelkfoje.”

*

Karal lasis la junulon en Kastelnova, ĉar tiu preferis reveni trajne ol riski esti vidata, dum li eliras el la aŭto. La detektivo tre ĝojis. Tiuj informoj malfermis al li novajn perspektivojn.

Reveninte oficejen, li longe kontemplis la foton. Kvankam ĝi ne estis bona, ĉar farita de tro malproksime, Jorli tuj rekoneblis. Apud li staris viro eble kvardekjara, kun longaj haroj falantaj ĝisŝultre. La trajtoj ne estis facile distingeblaj. ‘Espereble’, pensis Jano, ‘la polica fotisto sukcesos fari el tio uzeblan portreton. Tiam ni dissendos ĝin al ĉiuj policejoj kaj ni iam kaptos la ulon, kaj per li multon pli scios.’

Komisiinte la polican fotiston fari sian plejon, Karal ekstudis la liston de la renkontoj inter Paŭlo kaj la viro longhara. Li komparis ĝin kun la notlibro trovita ĉe Jorli: je ĉiu rendevua dato, la libreto enhavis la horon plus triangulon, pri kiu la detektivo miris komence de sia enketo.

Bedaŭrinde, la lokoj menciitaj sur la listo estis ĉiam tre izolitaj. Estos malfacile trovi vidintojn, kiuj povos doni indikaĵojn taŭgajn por identigi la serĉaton. Oni devos ree fidi al rutino: pacienca serĉado fare de tuta taĉmento da policanoj. Ĝenerale procedo finfine efika, sed longa, longa, longa ...

26

Longa ĝi ne estis, fakte.

Kiel ofte okazas ĉe vere harmoniaj paroj, la mensoj edza kaj edzina trafis sammomente la saman ideon. Tio okazis, dum la detektivo reveturis hejmen. Ĉesojle, lin akceptis Ĝoja kun rimarkinde brila rigardo.

“Jano! Imagu! Mi ekkomprenis, kial mi tiom perturbiĝis, aŭskultante Martan Bolomaj ...!”

“Ĝoja! ‘Vinberoj-vinbero-vinber' ...’! Mi opinias, ke mi fine sukcesis kompreni!”

Ŝi rakontis al li, kaj ankaŭ li al ŝi klarigis. Longe ili pridiskutis la aferon tiuvespere, en la plaĉe varma etoso, kiun kuna pensado kreas, feliĉige.

*

La sekvantan matenon, Jano frue alvenis en la ĉefpolicejon. Izabela sekvis post kelkaj minutoj, jarcente longegaj por la detektivo, kiu malfacile povus, sen ŝi, trovi la foton, kiun li bezonis ...

Ŝi rapide trovis ĝin. Karal ĝin komparis kun tiu farita de la amatora detektivo ekstremdekstra.

Ĉu estis *li*, ĉu iu alia? Estis malfacile juĝi, ĉar al la amatora foto precizeco mankis. Tamen ...

Li petis la opinion de la polica fotisto. Ĉi tiu konfirmis:

“Oni ne povas esti certa ... Tamen, se ne estas la sama persono, ili multe similas unu la alian.

Kompreneble, la longaj haroj estas nur peruko; se mi kaŝas ilin, rigardu! Ĉu ne estas la sama viro?”

“Probable jes. Eble de la perukvendistoj kaj haristoj ni ricevos certecon.”

*

Leŭtenanto Remon, aŭdinte Karal raporti pri sia nuna suspekto,

decidis organizi multvojan kontrolon.

“Estas relative kviete ĉi tie en la nuna tempo”, li diris. “Pli bone laborigi multajn super tiu kontrolado kaj rapide fini ĉi tiun aferon, ol lasi la tutan laboron al vi. Des pli, ke, se li fuĝus eksterlanden ... Ni ne perdu tempon.”

Li do dividis inter la membroj de la sekcio la diversajn taskojn: viziti la haristojn-perukistojn kaj en Valĉefa kaj en la ĉefurbo; studi la financan aspekton; esplori la pasintan historion de l'

suspektato; ekscii pri lia maniero akiri Ĥalkomfalinon; pliprofundiĝi en liaj rilatoj kun Marta Bolomaj, ktp.

Estis grandioza diskomisiado. Oni pridemandis najbarojn, servistojn, dungitojn, amikojn, perukistojn. Oni traserĉis – laŭ juĝista ordono – la bankajn kontojn. Oni informiĝis ĉe vojaĝagentejoj kaj aviadkompanioj. Oni konsultis ĉe la armeo la koncernan dosieron. Oni foliumis gazetojn serĉe al konfirmo pri tiu aŭ alia punkto.

Finfine, oni arestis *lin*. Sed *li* indigne deklaris.

“Mi faris nenion neleĝan. Mi tuj konfidos la aferon al mia advokato, kaj tiu submetos al tribunalo mian plendon pri neleĝa aresto kun grava misfamigo.”

Kun supereca mieno li sekvis la policistojn.

27

“Klarigu do detale, sinjoroj”, la altoficisto el la prokurorejo petis kun afabla rideto.

Leŭtenanto Remon gestis al Karal:

“Vi enketis kaj trovis. Estas via rolo raporti.”

Karal tusetis, prepare al longa raportado. Kvankam ĉio klaris liamense, li ne sciis, kiel komenci.

“Jure, povas esti tikla problemo”, li fine diris. “Sed ĝi ne koncernas min. Ĉiujn dirotajn faktojn ni povas pruvi, sed kiel niaj leĝoj pritraktas tian kazon, pri tio mi tute ne kleras. Jen kiel ni rekunmetis la tutan aferon.

“Eble la plej gravan eraron kulpis la armeo, kiam ĝi decidis specialigi junan brilan oficiron pri psikologia milito. Ĉi-lasta fako estis vera modo tiutempe. Mi ne scias, ĉu ĝi ankoraŭ

gravas nun. Estu kiel ajn, li multe legis kaj studis tiutempe pri la maniero influi la homojn, aŭ

ekspluati iliajn latentaĵojn. Ni cetere trovis sur liaj librobretoj tutan kolekton da verkoj pri tiu temo.

“Laŭ mia ...” (Jano Karal sin interrompis sekundeton. Li unue intencis diri ‘edzino’, sed iĝis necerta, ĉu la prokurorejo aprobos ŝian enmiksiĝon) “... opinio, li tiel lernis, ke se oni volas bone farigi taskon, plej grave estas ĝin konfidi al persono kun taŭga psika motivo por ĝin plenumi. Ke, se la psika profunda motivo estas sufiĉe forta, eĉ ne necesas *peti* la personon, sed ke eblas lin iom post iom gvidi al la deziro de la celata ago kaj al ties plenumo, tion bone komprenis la iama fakulo pri psikologia milito.

“La Gigant-magazeno estas, kiel vi scias, la plej malnova ĉiovendejo de Valĉefa. Petro Ervin, post la morto de la familianoj, retroviĝis sola posedanto de tiu grandega magazeno, kies direktoro li ankaŭ fariĝis. Inteligenta, sed diletanta, kaj kun multaj deziroj, kiujn li ne sciis superi, li malbone mastrumis sian posedaĵon. Li ne distingis sian privatan monon de la kaso magazena, kaj kiam li bezonis ion, li simple ĉerpis el ĝi, tiagrade ke, iom post iom, bankroto proksimiĝis neeviteble. Bone konata en Valĉefa, preskaŭ elektita urbestro, li estis

unu el tiuj ambiciaj personoj, kiuj ne tolerus malbonan famon. Kiam evidentiĝis, ke lia konto pli ol malplenas, kaj li ne povas repagi impresajn ŝuldojn, li sentis panikon.

“Por elturni sin el ĝi, li repensis al sia militpsikologia trejno kaj al la posta homstudado, en kiun li siatempe profundiĝis. Kaj psikologie kaj ekonomike, lia kalkulo montriĝis ĝusta.

Ekonomike, li notis, ke Gigánt des pli malprosperas, ju pli progresas la vendoj ĉe la sola vere konkura firmao: Alta Turo, pli nova magazeno, kiu, per modernaj metodoj, inteligenta prezpolitiko kaj direktado dinamika, laŭgrade logis al si klientaron antaŭe fidelan al la malnova valĉefa domo. Tiam li pensis: ‘en la nuna situacio ĉi-urbe, se Alta Turo forbrulus, dum du-tri monatoj, eble pli, – antaŭ ol ĝia direkcio povos restarigi la vendadon sur la antaŭa

nivelo – ĝia klientaro por multaj aĉetoj sin turnos al Gigánt, kaj tio sufiĉos por replenigi nian kason’.

“Ni studis la kontojn, kaj tio efektive okazis. Post la fajrego, kiu detruis Altan Turon, la vendado pli ol kvinobliĝis en Gigánt.

“Sed kiel fari, por ke la flamoj voru konkurantan magazenon, sen riski kompromitiĝon? Ervin trovis ne stultan solvon al tiu problemo: en tempo, kiam revoluciaj junuloj emas forĵeti la socion, trovi unu kun nestabila psiko, kiun li per lerta psika manipulado iom post iom kondukos al krima fajrigo.

“Kiel li organizis sian serĉon, ni scios nur, se li foje konfesos. Verŝajne por tiu serĉo li aĉetis (ne ĉi tie, sed en la ĉefurbo: li estis singarda) la perukon longharan, kiu, kaŝante lian kalvecon, komplete ŝanĝis lian aspekton. Li fine trovis la grupon de Jorli kaj la juna farbisto montriĝis por li perfekta krimperanto. Li aliris lin, sin prezentante kiel delegiton de ia internacia kaŝa organizo revolucia, kaj proponis aligi la jorlian grupon al ĝi, emfazante, ke pro sekurecaj kialoj, ne devus esti kontakto kun iu alia ol li. Post kelka tempo, li komencis doni monon al la grupo, kaj la naiva Paŭlo rigardis tion pruvo pri la aŭtenteco de la internacia organizo, rezonante, ke neniu donus monon por revolucia agado sen partopreni sur iu aŭ alia nivelo en la lukto kontraŭsocia.

“Ni ankaŭ ne scias, kiel li persvadis la knabon bruligi Altan Turon. Eble li diris, ke tiu estas faŝisma magazeno, aŭ ke ĝi estas simbolo de abomeninda konsuma socio. Restas la fakto, ke post serio da renkontoj kun Paŭlo aperis la ŝmirskribo ‘BOJKOTU Ĉ-T’, t.e., por ĉiu valĉefano,

Altan Turon, kaj iom poste okazis la fajrego, en kiu la magazeno pereis.

“Paŭlo tiam prezentis per si danĝeron. Unue, ĉar li povus al iu paroli pri la instiginto-kuraĝiginto. Kvankam Jorli certe ne sciis la nomon de Ervin, tamen ekzistis ia risko, des pli ke la knabo, kiel multaj en tiu grupo, estis pli fanfarona ol diskreta. Due, kiu garantios, ke la revolucia flamo ne atingos ankaŭ la Gigant-magazenon? Krome, montriĝis, ke Paŭlon vidis tri atestantoj, kion la gazetoj menciis.

“Sed kiel seniĝi je Paŭlo prenante sur sin nek riskon, nek respondecon? La sama metodo taŭgis, kaj Ervin planis ĝin antaŭe. Sammomente kiam li komencis renkontadi Paŭlon, li ankaŭ komencis la vizitojn al Marta Bolomaj.

“Pretekste, ke ŝi por li kartodivenu, li iradis al ŝi, kaj ni povas imagi, ke li bone pagis ŝin.

Estas facile paroligi personon en tiaj kondiĉoj, kaj influi tian malsanan menson per diskretaj aludoj. Konvinki f-inon Bolomaj pri la danĝero de la junaj revoluciemuloj ne necesis: ŝi tion jam kredis firme. Sed li iom post iom (ni supozas) persvadis ŝin pri ŝia misio bari ilian progreson. Ni emas pensi, ke li foje diris al ŝi, ke Jorli havas grandegan respondecon en revolucia grupo, kaj ke tiu, kiu lin mortigos, agos liberige por la tuta socio.

“Mi devas precizigi, ke kiam ni kolektis ĉiujn pruvojn pri Ervin, ni ilin prezentis al Lejla Gorazdo, la amatino de Jorli. Ŝi furiozis pri la maniero, laŭ kiu okazis la psikoinfluado, kaj donis al ni pliajn informojn. Tiel ni eksciis, ke Ervin sendis Paŭlon al la kurso pri ĉina kuirarto, pretekste ke li tie foje havos kontakton kun la ĉinaj aŭtoritatoj pere de iu, kies identeco riveliĝos nur post pluraj monatoj. Tiu kurso prezentis por Ervin du avantaĝojn: la ĉineco allogis Paŭlon, kaj la ejo najbaris al la apartamento de Marta Bolomaj.

“Ervin diris al Marta Bolomaj, ke Jorli vizitadas tiun kurson. Eble li montris lin al ŝi. Li insistis pri lia ‘diabla beleco’, reliefigante la ‘diablan’ aspekton, kio estis psikologie tre trafa kun persono havanta la mensostrukturon de tiu maljuna fraŭlino. Verŝajne, ĉiufoje kiam li vizitis ŝin por kartodiveno, li pli kaj pli inside encerbigis al ŝi la ideon savi la socion per likvido de l' defalinta anĝelo.

“Nun pri la metodo. Dum traserĉo ĉe Ervin, ni trovis tutan dosieron pri diversaj venenoj. En ĝi troviĝis la artikoloj menciitaj de la Internacia Referenca Centro. Ke Ervin konservis tiun dosieron

montras, ke li sentis sin nesuspektebla.

“Eble vi memoras, ke en septembro lastjara – nelonge antaŭ ol komenciĝis la ĉinkuira kurso –

la Gigant-magazeno starigis kun granda reklamado ‘Afrikan Dusemajnon’, dum kiu oni povis aĉeti tie ĉiaspecajn raraĵojn el Afriko. Ervin mem travojaĝis Afrikon por organizi la aĉetadon de la produktoj vendotaj dum tiu dusemajno. Ĉar li estas konata homo kun multaj kontaktoj, li verŝajne sukcesis viziti la koncernajn tribojn kaj akiri de ili – aŭ de iu blankulo vivanta tie –

la uzotan venenon. Ni scias, ke dum tiu vojaĝo li hazarde renkontis d-ron Gutmanis. La du valĉefanoj konis unu la alian laŭvide, kaj ĝojante renkontiĝi tie fore, ili kune vespermanĝis.

Tiam Gutmanis rakontis pri la detaloj de sia veturado, dum Ervin klarigis pri la baldaŭa

‘Afrika Dusemajno’.

“Verŝajne Ervin havis diversajn planojn por la venenado kaj projektis uzi tiun, kiun la cirkonstancoj plej favoros. Se Ĥalkomfalino ne estus uzebla, li prenus ion alian. Kiam li eksciis pri la kardia medikamento, li pensis, ke gelatena kapsulo ideale solvus la problemon, kiun starigas la forte perceptebla gusto de Ĥalkomfalino.

“Li tiam komencis inviti Martan Bolomaj al sia hejmo, pretekste, ke ŝi kartodivenu. Ĉar la maljunulino multrilate estis komika gasto, en tiu grandburĝa medio, ŝi estis allogo por la geamikoj de familio Ervin. Ni scias, ateste de servistoj, invititoj aŭ familianoj, ke du-aŭ

trifoje, Petro Ervin montris al Marta Bolomaj, kiel oni povas malfermi gelatenan kapsulon por eltiri el ĝi la enan substancon. Li faris tion ŝerce, dirante ekzemple: ‘oni volas glutigi al mi tiun longan gelatenan tubon, sed mi preferas miksi la kuracilon kun mia manĝo’, kaj li aldonis: ‘kompreneble, se estus amara gusto, mi ĝin lasus en ĝi, ĉar kapsulo precize ebligas gluti malbongustan medikamenton sen percepti la guston’.

“Alian fojon, kiam li invitis ŝin hejmen por kartodiveni al amikoj, li montris al ĉiuj fiere sian kolekton da ‘afrikaj mirindaĵoj’, inter kiuj troviĝis poteto da pulvoro ‘da kiu la enhavo de duona aspirin-premaĵo sufiĉus por sendi homon inferen sendolore per simpla korhaltigo’. Iu gasto tiam spontane kaj sensuspekte komentis: ‘vi devas ne diri tion, se mia edzino volus min murdi, ŝi ŝtelus iom da ĝi, kaj ek! diablen mi

forsvenus’. Al kio li respondis: ‘Neeble, vi perceptus ĝin, ĉar la gusto estas treege forta kaj repuŝa. Vi tuj vomus la manĝon aŭ trinkon, en kiu ĝi estus. Tial verŝajne tiu veneno neniam disvastiĝis. Eĉ bestoj ĝin rifuzas.’

“Tiel agis Petro Ervin. Per subtila penstrudado al malfortaj psikoj, li kondukis unu personon al bruligo de granda magazeno kaj alian al murdo de la unua ...”

Regis impresa silento, dum kiu la lastaj vortoj de Karal reeĥis en ĉies menso. Fine la oficisto prokuroreja esprimis sian dubon:

“Ĉu vi estas tute certaj? Tiu maniero procedi ŝajnas al mi malfacile kredebla. Ĉu vere oni povas realigi krimon per persono, kiu, eble senscie, fundfunde deziras ĝin?”

“La realo ofte ŝajnas nekredebla”, Jano respondis mildavoĉe. “Pripensu minuton. Ĉu vi nepre forpuŝas la ideon, ke la usonan prezidenton John Kennedy kaj lian fraton Bob oni likvidis tiumetode?”

La alta oficisto restis momente silenta, kun rigardo fiksita al Karal. Liaj lipoj rondiĝis por fajfo, sed neniu sono venis. Kuntirante la brovojn, li diris:

“Tamen, Ervin ne povis havi certecon, ke Jorli kaj Bolomaj agos laŭ lia plano ...”

“Ne”, respondis la detektivo. “Tial la tribunalo ne facile verdiktos. Li fidis je ŝanco. Povas esti, ke li antaŭvidis aliajn eblecojn, ekzemple, ke se ne agos Jorli, iu alia faros la saman laboron. Eble li eĉ kontaktis tiun alian personon.”

“Nu, kion, se Jorli agus, sed ne Marta Bolomaj?”

“Estis risko. Li preferis, ke li mortu. Sed se ŝi rezistus kaj li ne trovis alian malfortan menson, li igus sin senkulpa dirante – se supozi, ke la polico malkovris liajn kontaktojn kun Paŭlo –

‘Mi faris nenion. Estas tiu junulo. Li estas obsedata pri fajro, toksata de revolucia propagando’, kaj li verŝajne havis ian pretan klarigon pri la rendevuoj kun la junulo.

“Tial li diferencas de la ordinara krimulo. Ĝenerale, murdonto planas sian agon tre detale, por ke ĝi nepre sukcesu. Ervin kalkulis je ŝanco. Estas murdo bazita sur psikologia probableco.

Neordinara, ĉu?”

“Ion vi ne klarigis”, diris leŭtenanto Remon. “Kial li sendis tiun sennomulan leteron?”

“Tiu estas la mistero, al kiu respondon ni ne trovis. Ĉu eĉ li scias mem?”

28

Ĝoja kaj Jano kuŝis surlite, revuante, antaŭ ol endormiĝi, la diversajn fazojn de la enketo.

“Danku la ĉielon,” ŝi diris, “ke tiu juna juda spiono donis tiujn valorajn informojn. Sen li, vi neniam estus trovinta la kulpulon.”

“Ho jes”, li trankvile respondis. “La konfirmo estus pli komplika, sed ne la enfokusigo de la suspektoj. Kiam mi faris tiun sonĝon, mi nekonscie (aŭ io nekonscia en mi, se vi preferas) jam sciis la solvon. Vi memoras, kion mi diris al vi poste, ĉu ne? Se la trivorto “vinberoj-vinbero-vinber'” estas ripetata, la silaboj *er-vin* aperas en sinsekvo. Ne hazarde mi tion sonĝis.”

“Jes, verŝajne ankaŭ mi intuis tion, ĉar lia nomo revenis al mia memor' tuj post kiam vi raportis la sonĝon. Kiam vi diris ‘bero por vino’ aŭ ion similan, tio frapis min, ankaŭ

subkonscie. Dum vi estis for, kaj mi preparis la manĝon, mi ripetis al mi tiun esprimon laŭ

sanktavala maniero: bero por vin', kaj tio asociiĝis mense kun la rima nomo Ervin. Mi pense reiris al mia konversacio kun Marta Bolomaj, min demandante, kial mi forgesis precize tiun nomon, dum ĝi estas unu el la plej konataj el ĉiuj, kiujn ŝi menciis. Tiam mi memoris la specialan vizaĝ-esprimon, kiun ŝi havis prononcante ‘Ervin’. La egan perturbon, kiun mi

priskribis al vi, verŝajne kaŭzis tiu apenaŭ perceptebla ŝanĝeto en ŝiaj trajtoj, kiu eĉ ne daŭris sekundeton.

“Familio Ervin ja estis tre admirata en mia familio. Mi mem sentis fortan tenton voĉdoni por li, kiam li kandidatiĝis al la parlamento, kvankam liaj politikaj ideoj ne kongruis kun la miaj, nur pro lia famo de bona, simpatia, iel familiara valĉefano. Kiam dumsekunde streĉiĝis la vizaĝaj trajtoj de Marta Bolomaj, io en mia cerbo eksciis, ke Ervin ludis apartan rolon en ŝia vivo. Sed alia parto de mi rifuzis konsciiĝi pri la konsekvencoj de tiu malkovro, ĉar tio tuŝis la miksajn kaj konfuzajn sentojn, kiujn mi havis al li. Mi tute ne deziris vidi en li krimulon.

Kiel lerte homa psiko nin eskapigas el la vido de io, kion vidi ni malvolas! Mi eĉ ne konsciis, ke la mencio de Ervin faras ion al mi. Mi

nur spertis fortan perturbon kun ĉiaspecaj raciecigoj por ĝin klarigi ... Feliĉe, ke dank' al via sonĝo, mi rememoris pri la timata nomo!"

"Tiu via indiko eble helpis min pli ol la juna judo," Jano komentis, "ĉar ĝi suspektigis, ke Marta Bolomaj pensis pri Ervin menciante la diron pri la diabla beleco. Kaj tiuj vortoj ja pruvis, ke iu ŝia kliento rilatis ambaŭe kun Jorli kaj kun ŝi. Tial eĉ sen la konfidencoj de la juda spiono mi enketus pri Ervin, kaj finfine mi ekscius pri la vojaĝo al Afriko, la financaj malfacilaĵoj, la invitoj al Marta Bolomaj, ktp."

"Kaj se mi ne rakontus pri la esprimŝanĝo de Marta Bolomaj?"

"Mi tamen esplorus pri Ervin. Mi sonĝis pri "vinber'" kaj pri 'kiu per ĝi profitas?' antaŭ ol vi lin suspektis. Tuta nekonscia sintezo de multaj faktoj okazis en mi kaj montris tiun direkton.

La fakto, ke oni murdis precize la bruliginton de magazeno, malfacile ŝuldiĝus al hazardo.

Kaj la sennomula letero pruvis, ke iu krom Marta Bolomaj sciis pri la afrikeco de la veneno uzita."

"Kiel vi klarigas tiun tute nenecesan leteron?"

"Paniko, verŝajne. Subita fortega timo, ke oni ekscios, ke li invitadis Martan Bolomaj."

"Tamen ..."

"Eble li eksciis, ke la maljunulino konsultis d-ron Gutmanis, kaj subite memorante la renkonton kun tiu en Afriko, li opiniis, ke jen ŝanco regalas per ideala koincido por misdirekti la suspekton. Ne forgesu, ke li multe fidis ŝancon en la tuta afero."

"Povas esti, jes", dube diris la edzino.

"Vi ŝajnas nekonvinkita."

"Mi havas alian hipotezon. Petro Ervin ne estas malvarma krimulo. Lia maniero procedi pere de aliuloj signas timeman, nememfidan karakteron. Tiaj homoj ofte suferas pro nekonscia profunda kulposento. Krome, li estis edukita en malnova valĉefa familio kun la tuta emfaz'

pri respekto al aliuloj, kiu karakterizas nian regionan kulturon. Tia edukiĝo ne preparas al vivo kun konstanta konsci' pri krimoj

nepagitaj. Eble li ne povis toleri la kulpoturmenton, kaj li – sen scii ĝin klare, kompreneble – deziris, ke la polico lin trovu kaj li pagu sian ŝuldon al la socio. Sed ĉar li ne kuraĝis fronti rekte sian respondecon, li agis kiel por la murdo: li lasis la elekton al ŝanc' ...”

“Oj! Vi psikologoj!” diris Jano.

Kaj li estingis la lumon.

GLOSARO

La ĉi-sekvaj vortoj ne troviĝas en Plena Vortaro, aŭ ne troviĝas en ĝi kun la ĉi-sube indikita signifo. La plimulto estas registrita en Plena Ilustrita Vortaro.

kardio

koro, rigardata el medicina vidpunkto

koregrafio

baletkomponaĵo

merdo

fekaĵo, (f) aĉa afero (triviallingve)

mg

mallongigo de *miligramo*

minuskomplekso

komplekso de malplivaloro, komplekso de malsupereco (kombinaĵo el sentoj kaj ideoj, laŭ kiu homo neobjektive sentas sin multrilate malsupera al la aliaj aŭ

malplivalora ol li devus esti)

pavlova hundo

hundo de Pavlov. Pavlov estas la rusa fiziologiisto (1848–1936), kiu eltrovis la kondiĉitajn refleksojn, i.a. studante la salivajn reagojn de hundoj **perceptivo**

kapablo percepti (el *percept-* kaj sufikso *-iv-*, indikanta kapablon)

pilipilio

afrika tre forta pimenta saŭco

poluado

malpurigado de viv-esenca elemento, kiu fariĝas malsaniga por la uzantoj (PIV: *polucio*)

predo

ĉio, kion oni kaptakiras perforte aŭ perruze

psikosomata

rilata al la unuo, kiun kunformas psiko kaj korpo

raciecigo

racie kohera, sed fakte malĝusta rezonaĵo, kiun homo senkonscie uzas por klarigi al si ion, kion li malinklinas vidi ekzakte, ĝenerale pri si mem (psikanaliza fakvorto) **spektaĵo**

spektaklo

spontana

spontanea

ŝoko

fortega abrupta emocio, kiu lasas homon dummomente senreaga, kvazaŭ senigita je regebla nerva energio

tonuso

muskola tonio; stato de konstanta malforta streĉiteco de vivanta muskolo

univ', univo

universitato (en la slango de la studentoj)

Rimarkigo

La aŭtoro uzas la vorton *ŝati* en la senco, kiun ĝi havas en la parola lingvo, kiam ori diras *mi ŝatas kafon*, *li ŝatas naĝi* (t.e. al mi plaĉas kafo, mi volonte trinkas kafon; li trovas plezuron en naĝado, li volonte naĝas). Laŭ PIV kaj malmultaj lernolibroj tiakaze oni devus diri: *mi amas kafon*, *li amas naĝi*. La aŭtoro, kiu multjare uzis esperanton en la kvin mondpartoj, neniam *aŭdis* la verbon *ami* uzata tiusence, sed oftege *aŭdis* en similaj okazoj la verbon *ŝati*.

Verŝajne do okazis drasta semantika evoluo de tiuj du vortoj. La verbon *malŝati* li kompreneble uzas en la kontraŭa senco: *forte malinklini al io*, konforme al la ĝenerala uzado de la hodiaŭa parola lingvo.

* Kelkaj – ho horore! – eĉ pli akcentas la sanktavalecon de la formulo dirante: por kleri kaj klari, ĝin uzi kun ŝpari!

Publika rajtigilo

Vi rajtas kopii kaj redistribui la neŝanĝitan tekston de *Ĉu vi kuiras ĉine?* , komplete aŭ parte, en iu ajn formo, inkluzive de komputilaj dosieroj kaj sonregistraĵoj, sub la sekvaj kondiĉoj: (1) Vi liveru ĉi tiun rajtigilon kun ĉiu kopio. (2) La originala teksto estu klare distingita de ĉia aldonaĵo, komento aŭ klarigo, kaj, se la teksto estas nur parte reproduktita, la lokoj, kie tekstoparto estis forprenita, estu klare indikitaj.